

Beletra Edeno

neregula beletra bit-revuo n-ro 9 (oktobro 2024)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

Kontribuis Luiza Carol, Juan Trepiana, Laimundas Abromas, Hong Jia, Yin Jiaxin, Liu Hongyuan, Leming Lin, Bardhyl Selimi, Lu Song, Minosun, Semio, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, Serpo, Zang Jun, Vejdo, Jatino, Fang Fang, Guozhu, Mikaelo Bronŝtejn, Rita Mkrťĉjan, Maria Nazaré Laroca, Yi Qiao, Eto, Flageto, Erika Godó, Stanislao M Esposito, Sabin Maruhe, Rovere Emanuele, Ven Don, Mu Ke, Viktoro Mu, Rafael Henrique Zerbetto, Bogusław Ubik-Perski, John Huang

AI-ilustris John Huang, karikatur-esperantigis Paula Ad úriz

Enhavo

Originala Prozo

| | |
|---|-----|
| Luiza Carol: Mjaja kaj la fiŝo, Kiel oni esperantistigis fiŝon..... | 003 |
| Juan Trepiana: Ŝlosileto..... | 008 |
| Laimundas Abromas: La savado de animoj..... | 009 |
| Hong Jia: La amo de Malbela Panjo..... | 012 |
| Yin Jiaxin: Ridetema soldato..... | 015 |

Tradukita prozo

| | |
|--|-----|
| Lao She: Printempa festo en Pekino (trad. Liu Hongyuan)..... | 017 |
| Guy de Maupassant: Unu duelo (trad. Leming Lin)..... | 022 |
| Iljet Alička: La patrino (trad. Bardhyl Selimi)..... | 026 |
| Daphne du Maurier: La destinita sorto (trad. Lu Song)..... | 030 |
| Anonima: Mendi frapon je pordo (trad. Minosun)..... | 035 |
| Bai Xiaoyi: Eksplozoj en la salono (trad. Semio)..... | 036 |
| Fratoj Grimm: Valerinjo k.a. (trad. Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser)..... | 037 |
| Lu Jinchong: Intrigo en la aero (trad. Serpo)..... | 045 |
| Tong Shumei: La vera kaŭzo de morto (trad. Zang Jun)..... | 049 |
| Chiung Yao: En profunda korto (9) (trad. Vejdo)..... | 053 |
| Lin Qingxuan: Granda aŭ malgranda k.a. (trad. Jatina)..... | 061 |
| Bi Shunmin: La juna petveturanto k.a. (trad. Fang Fang)..... | 064 |
| Li Fuyan: Antaŭdirita geedziĝo (trad. Guozhu)..... | 070 |

Originala poezio

| | |
|---|-----|
| Mikaelo Bronŝtejn: Kelkaj laŭokazaj poemoj..... | 073 |
| Rita Mkrtĉjan: Bonan Esperanto-Tagon..... | 077 |
| Maria Nazaré Laroca: Printempe k.a..... | 079 |
| Vejdo: Nuna diluvo k.a..... | 083 |
| Yi Qiao: Papavfloroj k.a..... | 089 |
| Eto: Ĝui solecon k.a..... | 093 |

| | |
|---|-----|
| Flageto: Se mi estus... k.a..... | 099 |
| Erika Godó: Papera mondo k.a..... | 102 |
| Stanislao M Esposito: Lecionoj k.a..... | 103 |
| Sabin Maruhe: Orfo k.a..... | 106 |
| Tradukita poezio | |
| Rovere Emanüele: Kvazaŭ kolombo blanka k.a..... | 107 |
| Xue Fenggu: La luno (trad. Minosun)..... | 111 |
| Zhu Huang: Surtera paradizo (trad. Minosun)..... | 112 |
| Mao Zedong: Neĝo (trad. Ven Don)..... | 114 |
| Guan Hanqing: Disiĝo k.a. (trad. Mu Ke)..... | 115 |
| Teatro | |
| Anonima: Ostaĝo (trad. Viktoro Mu)..... | 122 |
| Artikolo kaj eseoj | |
| Rafael Henrique Zerbetto: Pekina Biblioteko: Bela, konvena kaj altteknika!..... | 127 |
| Bogusław Ubik-Perski: Veganismo kaj Esperanto: Pli ol Ŝajnas..... | 132 |
| John Huang: Turisma vojaĝo tra Tanzamnio (1)..... | 135 |



John Huang, prezidanto de internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordamerika, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por du sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022 kaj 2024. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis multajn Esperanto-agadojn en la sekvaj jardekoj.

Foto sur la kovrilo: *La flughaveno de Shenzhen, Ĉinio*



Karikaturoj desegnitaj de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Luiza Carol (Israelo)



Mjaja kaj la fiŝo

Mjaja estas blanka juna kato, kiu apartenas al tiu aparta specio devenanta de alia planedo. Vi verŝajne scias, pri kiu specio mi

aŭtorino, Luiza Carol

parolas: la parolkapabla kaj sorĉokapabla specio. Niatempe, nur malmultaj ekzempleroj troviĝas sur la tero, kaj ili kutime kaŝas siajn kapablojn fronte de la homoj. Nur maloftege okazas, ke tiaj katoj tamen alparolas homojn, sed tiam temas pri aparte fidindaj personoj, kiuj ne malkaŝas tiun sekreton.

Ĝuste tia bonŝanca persono estas Prof. Epsilono, la gastiganto de Mjaja. Li estas maljuna vidvo, kiu pensiiĝis ĝuste antaŭ ol okazis la eksterordinaraj eventoj pri kiuj mi rakontos. Li estis vivanta tiam en bela urbo, kien la sala mara akvo enigis tra longaj kanaloj. Tra la kanaloj glitas lignaj boatoj, kaj inter la bordoj de la kanaloj estas belaspektaj pontoj el ŝtono. Prof. Epsilono estas sciencisto, kiu estis laborinta dum jardekoj en fama scienca instituto. En lia apartamento, Mjaja sentis sin tre bone. Tri foje tage, la Profesoro pretigis por ŝi teleron kun manĝaĵo kaj bovlon kun freŝa akvo. La katino pasigis multajn agrablajn horojn babilante kun la Profesoro. Ili ambaŭ ŝatis sidiĝi vespere sur brakseĝon, por kundividi pensojn kaj sentojn aŭ por aŭskulti muzikon. Mjaja havis ankaŭ pilkojn por ludi, sed se la vetero estis favora, ŝi preferis pasigi ekstere la tempon antaŭ la tagmezo. La Profesoro faris por ŝi pordeton, tra kiu ŝi povis eliri kaj reveni, kiam ajn ŝi deziris.

Dum iu printempa mateno, Mjaja eliris por ĝui la freŝan brizon kaj la sunon. Ŝi promenis senzorgeme sur ponto, gaje ronronante tiom laŭte, ke ŝi ne plu aŭdis kamionon kiu proksimiĝis malantaŭ ŝi. La stiristo de la kamiono hupis subite kaj surdige ĝuste apud la katino, kiu apenaŭ havis tempon salti flanken kaj... falis en la akvon. Neniu boato troviĝis proksime. Neniu homo. Mjaja abomenis akvon kaj ne scipovis naĝi. En akvo ŝi ne kapablis ronroni, kaj sen longa speciala ronronado ŝi ne kapablis fari sorĉojn. Ŝi estis terurita. Ŝi jam estis sinkanta. Ŝi baraktis senpove, despere.

Kaj tiam, ŝi sentis ke iu puŝas ŝin supren. Estis granda forta fiŝo. Ĝi naĝis kun Mjaja sur sia dorso kaj alportis ŝin al la bordo. Mjaja apenaŭ povis kredi siajn okulojn. Ŝi

dankis al la fiŝo. Ŝi konfesis al ĝi, ke ŝi kapablas fari sorĉojn. Ŝi demandis la fiŝon, kion ĝi dezirus, por ke ŝi provu montri al ĝi sian dankemon. Sed la fiŝo silentis. Ĝi malsupreniris profunden en la akvon kaj malproksimiĝis.

Tagmeze, Mjaja alvenis hejmen lacega, malseka, malsata. Ŝi iris rekte al sia telero por manĝi. Tie ŝi haltis kaj rezignis. Ŝi kuŝis sur sia kuseno kaj ekmeditis. Ŝi sciis, ke ĝuste tiu manĝaĵo estas farita el fiŝo. La Profesoro neniam fiŝkaptis. Li estis vegetarano. Sed por Mjaja, li ĉiam aĉetis skatolojn kun manĝaĵoj kiuj taŭgas por katoj. La bestkuracisto estis dirinta al li, ke vegetarana manĝaĵo ne taŭgas por katoj. Li diris: “Via kato ne mortus, se vi nutrus ĝin sen ajna viando. Dum kelkaj tagoj, eĉ semajnoj, ĝi povus manĝi sen viando. Sed post ankoraŭ kelka tempo, ĝi fariĝus senforta kaj ĝia sano iom post iom malpliboniĝus. Se vi volas vegetaranan dorlotbeston, prenu hamsteron aŭ papagon. Eventuale vi povus vegetarangi hundon, sen ajna risko por ties sano. Sed katoj bezonas manĝaĵojn por katoj.” Tamen la Profesoro volis nek hamsteron, nek papagon, nek hundon. Per neniu alia besto li volus anstataŭigi la katinon. Do li kutimiĝis aĉeti al ŝi skatolojn kun specialaj manĝaĵoj por katoj. Plej ofte ili manĝis samtempe, ĉiu kun sia propra telero. Mjaja estis scivola kaj ĉiam petis gustumi poiome el la manĝaĵoj de la Profesoro, do li metis en ŝian teleron poiom el preskaŭ ĉio. Li sciis, ke Mjaja ne ŝatas salon, cepon kaj spicojn, do li kuiris sen tiuj ingrediencoj, nur por plezurigi ŝin. Tamen, li ĉiam havis sur la tablo salon, cepon kaj multajn specojn de spicoj, kiujn li malavare aldonis nur en sian teleron. Glaciaĵojn kaj aliajn dolĉaĵojn Mjaja ne rajtis gustumi, ĉar la bestkuracisto al neniu kato permesas tion.

Do tiutage, Mjaja kuŝis sur sia kuseno kaj ekmeditis. Kiam la Profesoro revenis hejmen, ŝi rakontis al li pri kio okazis. Ŝi diris:

“Eĉ se la fiŝo petis nenion de mi, tamen mi volas fari ion, kio plezurigus ĝin: mi volas iĝi vegetarano, samkiel vi.”

“Sed vi estas kato! Vi ne estas homo!” kontraŭis la Profesoro.

“Jes, mi estas kato, sed apartenas al aliplanedana specio,” diris Mjaja. “Tion la bestkuracisto ne scias kaj eĉ ne devas scii. Tamen, eble mia korpo estas malsimila al aliaj katoj...”

La Profesoro rememorigis al Mjaja, ke ĝis tiam ŝi estis ricevinta vakcinojn kaj medikamentojn samkiel ĉiuj katoj, kaj ŝia korpo reagis tute normale. Li ankaŭ rememorigis al ŝi, ke iu amiko apotekisto parolis al li pri iuj piloloj, per kiuj oni povus suplementi la manĝaĵojn de katoj, se oni nepre volas vegetarangi ilin. Sed Mjaja abomenis pilolojn, ne volis provi ilin tiam kaj ankaŭ ĉi-foje ne volis.

Tiuvespere ili manĝis kune kinoan kaĉon kun sojlakto. Kaj ili interkonsilis longe, pri kiel solvi la problemon estonte.

Kiam la Profesoro enlitiĝis, Mjaja sidiĝis kiel kuseno sur la kovrilon apud liaj

piedoj. Ŝi ekronronis laŭ speciala maniero, kiun neniu instruis al ŝi iam ajn, sed ŝi iel naskiĝis kun tiu aliplanedana talento. Ŝi ronronis monotone kaj ritme la tutan nokton, dum la Profesoro dormis. Ŝi ronronis pensante kun amo kaj danko pri la bonkora fiŝo, pri la Profesoro, pri ĉi tiu bela planedo kie ŝi naskiĝis. Ŝi ronronis ĝis tagiĝis kaj la Profesoro vekigiĝis.

Tiumatene, Prof. Epsilono sentis sin eksterordinare vigla kaj memfida, plenplena je novaj ideoj, pri kiuj li sonĝis dum la nokto. Li preparis por Mjaja avenan kaĉon kun kokuslakto kaj forlasis la domon murmurante gajan melodion.

Prof. Epsilono vendis sian aŭton, por aliformi la garaĝon en laboratorion. Tie li laboris ĉiutage, dum Mjaja atendis pacience kaj esperoplene. La katino elpensis pli kaj pli prilaboritajn ritmojn de ronronado. Ju pli arteca fariĝis ŝiaj noktaj ronronadoj, des pli entuziasme kaj kreeme laboris la Profesoro dum la tagoj. Tiel pasis preskaŭ du semajnoj. Kaj jen iuvespere li diris al Mjaja:

“Ni sukcesis!”

Mjaja volis tuj enigi sian langon en la testotubon, sed la Profesoro petis, ke ŝi atendu lin en la salono. Tie ili kune festis la eventon. La Profesoro metis sur teleron flavecan fungon, ne pli grandan ol ovo de kokino. Li dividis ĝin en du egalajn pecojn. Mjaja manĝis sian pecon tuj, laŭtege ronronante pro feliĉo. La Profesoro rostis iom sian duonon sur krado, aldonis iom da citronosuko, olivoleon, selon kaj pipron... gustumis malrapide... kaj diris kontente:

“Vera frandaĵo!”

La Profesoro sukcesis obteni novan specion de fungo, en kiu ja troviĝis i.a. ĝuste tiu substanco, kiun katoj nepre bezonas por esti tute sanaj, sed kiu normale mankas en plantoj kaj fungoj. Tio signifis, ke Mjaja jam povis manĝi vegetarane sen ajna risko por sia sano. Kia ĝojo!

Post tiu evento, la Profesoro aliformis sian balkonon en fungejon. Li metis tien bretarojn, kie la fungoj povis kreski en ombro kaj malsekeco, je konvena temperaturo. Kiam la rikolto de fungoj estis sufiĉe granda, la Profesoro jam prezentis sian laboron ĉe la Akademio de Sciencoj.

Prof. Epsilono kaj Mjaja transloĝiĝis en alian urbon, kie la Profesoro aliĝis al granda teamo de sciencistoj eksperimentantaj novajn speciojn de fungoj. Ĉion kion mi rakontis al vi, mi scias de iu amikema parolanta katino, kiu fidis min kaj babilas kun mi foj-foje. Ŝi loĝis kelkan tempon en la sama kvartalo kun Mjaja kaj ili fariĝis bonaj amikinoj. Sed tiu katino ne plu havas novaĵojn pri Mjaja kaj la Profesoro. Aŭ eble ŝi ne volas diri tion, kion ŝi scias... Tiaj katoj estas kutime sekretemaj...

Kiel oni esperantistigis fiŝon

Marina, la avino de Peĉjo, estis entuziasma esperantistino kiu ege deziris, ke ŝiaj genepoj scipovu Esperanton. Foje, ŝi legis iun pedagogian artikolon asertantan, ke tre eta infano kapablas lerni Esperanton plej rapide kaj facile, kiam li aŭ ŝi aŭdas ĉiutage kaj la nacian lingvon de la familio, kaj Esperanton. Tamen, por ke la infano ne konfuziĝu, la aŭtoro de la artikolo konsilis, ke unu sola ano de la familio alparolu lin aŭ ŝin ekde komence nur Esperante, dum la aliaj uzu la nacian lingvon. “Kiom utila artikolo!” pensis Marina, kaj decidis provi la validecon de tiuj konsiloj.

Kiam Peĉjo estis du aŭ tri jaraĝa, li ne estis aparte babilema eĉ en la gepatra lingvo. Esperanton li tute ne parolis, tamen ja komprenis iomete. Marina kutimis elpreni lin de la infanĝardeno ĉiutagmeze kaj pasigi kun li la tempon ĝis la gepatroj revenis el siaj oficejoj. Tio signifis 4-5 horojn ĉiun labortagon, dum kiuj ŝi alparolis la infanon nur Esperante. Sed Peĉjo nenium vorton respondis. Li nur kapjesis aŭ kapneis, kelkfoje ridis kiam ŝajnis al li, ke Marina ŝercas...

Tamen li scipovis eldiri krivortojn de bestoj, sed... ĉu entute oni povas nomi tiujn “vortoj”? Fakte, Marina kutimis demandi: “Kion diras la kokino?” Kaj Peĉjo respondis: “Kluk! Kluk!”. Marina demandis: “Kion diras la bovino?” Kaj Peĉjo respondis: “Mu!! Mu!!” Tiu ludo fariĝis pli interesa, kiam Marina demandis: “Kion diras la fiŝo?” Tiam Peĉjo silentis kaj movis la lipojn, kvazaŭ por kisi iun. Li estis ĉarma kiam li faris tion, tial Marina demandis ree kaj ree: “Kion diras la fiŝo?”

Post kelka tempo, la avino provis inversigi la ludon. Ŝi demandis: “Kiu diras ‘Mu’?” Sed Peĉjo ne respondis, nur ridis. Li verŝajne pensis, ke Marina ŝercas, aŭ ke ŝi forgesis kiel oni ludas la ludon ĝuste.

Semajnoj pasis, monatoj pasis, sed Peĉjo nenium veran vorton eldiris en Esperanto. Li tamen ne adresiĝis al sia avino en la lingvo de siaj gepatroj. Eble li pensis, ke la avino ne scipovas ĝin. Kiam li estis kun la avino, li simple esprimis sin kiel simieto, pere de gestoj kaj mienoj. Kelkfoje Marina ŝajnigis, ke ŝi ne komprenas. Tiam li malpacienis, ekploris, piedbatis la plankon, sed nenium vorton eldiris.

Ĝis unu tagon, kiam ili promenis kune laŭ la riverbordo. Tiam, ili renkontis najbaron fiŝkaptantan. Tiu sidis sur eta seĝo kun sitelo apud li. Peĉjo rigardis la sitelon kaj vidis tie fiŝon en akvo. La fiŝo baraktis, saltetis kaj movis la buŝon kvazaŭ ĝi estus krianta, sed neniu krio aŭdeblis. Tiam Peĉjo proksimiĝis de ĝi tute fascina kaj kriis: “Iŝo! Iŝo!”

La najbaro nenion komprenis, sed Marina... estis ravita! Ŝi jam ekpensis, kiel ŝi baldaŭ telefonos al ĉiuj siaj geamikoj kaj fanfaronos (ho, fanfaronegos!) pri tio, ke ŝia nepo eldiris sian unuan Esperantan vorton... eĉ se li misprononcis ĝin, ĉar al li estis malfacile eldiri “fiŝo”... sed tio tute ne gravas, ĉu? Vorton li eldiris! Kaj veran

vorton, ne nuran “krivorton”!

Marina aĉetis la fiŝon de la najbaro kune kun la sitelo. Hejme, ŝi enmetis la fiŝon en larĝan kuvon, donis al ĝi herbojn kaj alportis al ĝi specialan manĝaĵon el la bestvendejo. La fiŝo iom post iom trankviliĝis kaj rigardis ĉirkaŭe. Oni nomis ĝin Iŝo.

Peĉjo iom post iom kutimiĝis babili Esperante kun Iŝo. Komence, li alvokis ĝin: “Venu Iŝo! Venu!” Li kuris ĉirkaŭ la kuvo kaj Iŝo sekvis lin ene de la kuvo, ŝanĝante direkton tuj post kiam Peĉjo ŝanĝis direkton. Marina donis al ili pilketon, por ke ili ludu kune. Peĉjo ĵetis la pilketon en la akvon kaj diris: “Kaptu! Kaptu!” Kaj Iŝo kaptis la pilketon por forpuŝi ĝin reen. Peĉjo tenis la pilketon super la akvo kaj diris: “Saltu, Iŝo! Saltu!” Kaj Iŝo saltis lerte, dum Marina aplaudis entuziasme...

Semajnoj pasis, kaj Peĉjo iĝis pli kaj pli babilema en ambaŭ lingvoj, kiujn li scipovis. En la infanĝardeno li parolis nacilingve, kun la gepatroj kaj aliaj personoj li parolis nacilingve, sed kun Marina kaj Iŝo li parolis Esperante. Li jam delonge kapablis prononci “fiŝo”, sed Iŝo restis la nomo de la fiŝo.

Printempe, kiam la akvo de la rivero ŝvelis, Marina demandis la nepon: “Kion vi pensas, Peĉjo? Ĉu vi ŝatus vivi en eta ĉambro kiel kuvo tiom longe?”

Peĉjo kapneis.

“Nu, mi supozas, ke ankaŭ Iŝo ne plu ŝatas tion. Ĝi verŝajne sopiras pri sia familio...”


Marina kaj Peĉjo alportis la fiŝon al la rivero kaj enmetis ĝin en la ondojn. Peĉjo ĵetis al ĝi pilketon. Iŝo gaje saltis kelkajn fojojn, kvazaŭ por saluti siajn eksajn gastigantojn. Poste, ĝi iris malproksimen kaj malaperis.

“Iŝo ĝojas...” diris Peĉjo kaj ridetis.



esperantigita de **Paula Adúrız** (Hispanio)

Juan Trepiana (Argentino)



Ŝlosileto

Ŝi havis antikvan ŝlosileton. Ĉiunokte ŝi malfermis la seruron de la pordo de sia kapkuseno.

Tiam ŝi eniris mondon, en kiu la aĵoj povis esti kaj ne esti samtempe. En tiu mondo, plena de labirintoj kaj koridoroj, estis rakontoj pri amoj kaj forgesoj, rakontoj pri teruro kaj senfinaj arbaroj.

aŭtoro, Juan Trepiana

Multajn fojojn ŝi timis perdi la ŝlosileton kaj ne plu povi eniri denove.

Nenio povis kompariĝi kun ŝiaj noktaj aventuroj, ŝiaj senfinaj vojaĝoj, ŝiaj rakontoj plenaj de herooj kaj nekredeblaj trezoroj. Alivorte, ŝi estis nur knabino!

Ŝi pensis, ke se ŝi perdus la ŝlosileton, ŝlosisto povos helpi ŝin. Li povus konstrui alian ŝlosilon aŭ malfermi la pordon per speciala ilo...

Ŝi neniam pensis, ke ŝi povus perdi la ŝlosileton interne de la kapkuseno. Mi denove diras ke ŝi estis nur knabino! Eble pro tio, ŝi kredis, ke ankaŭ en la interna flanko, ekzistas ŝlosilistoj.

La knabino plenkreskis kaj maljuniĝis. Ŝi ĉiam estis sola. Ŝia mondo estis atendi la horon por enlitiĝi kaj uzi la antikvan ŝlosileton.

Post multaj tagoj sen scioj pri ŝi, malfermiĝis ŝia ĉambro. Oni malkovris malplanan liton kaj, sur la kapkuseno, antikvan ŝlosileton.



esperantigita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Laimundas Abromas (Litovio)



La savado de animoj

Unufoje, vespere por mi iĝis malbone, malgaje. Trans la fenestro pluvis kaj furiozis vento. Mia edzino perfidis min kaj foriris al alia viro, mia amorantino – ankaŭ al alia. Mi rimarkis – televidilo difektita, fridujo malplenas kaj ne funkcias.

aŭtoro, Laimundas Abromas

Radoricevilo disaŭdigas la funebrajn marŝojn. Ĉu intence? Do, kio restis por mi? Serioze pripensinte – restis nur sinmortigi. Ni, ĉiuj en tiu ĉi mondo estas nur gastoj. Do, jen, mi komencos – unu, du! – kaj solvos la problemon. Finfine litovoj estas agnoskitaj kaj konsiderataj kiel popolo de sinmortigantoj. Se estos unu pli multe aŭ malplimulte, ĉu gravos? Do. Kion fari? Mi dronigis min en la kaliketo da brando, tamen mi ĉiam elnaĝis supren. Alnaĝinte la randon de la kaliketo, mi surrampis ĝin, fleksis min trans la randon kaj falis sur la ferdekon-ĉambran plankon.

Mi mallongdaŭre kuŝis surplanke. Kiomlonge – mi ne memoras.... Eksonis telefono – ĝi sola funkciis. Afabla virina voĉo informiĝis, ĉu mi estas vere Dominiko.

–Jes, – mi respondis, – mi estas Dominiko.

– Mi telefonas el la Ofico de Animosavado, – prezentis sin tiu afabla virina voĉo de la alia fino de linio. – Oni nomas nin la Porkonsola aŭ Konfida telefonlinio. Ĉu vi aŭdis pri ĝi?

– Jes, – mi respondis. – Sed kia utilo de tio? Mi ne komprenas.

– Surbaze de anticipaj sciigoj, vi volas vin mortigi! Vi volas rompi vian vivfadenon, – aŭdiĝis en la telefono.

–Jes, vere, – mi konsentis. – Mi agnoskas vian servon, sed kiu utilas de tio?

–Nu, – aŭdiĝis jam kolereta voĉo, – vi ĉesu afekti! Diru, kio turmentas vin, kio ĝenas! Nur kurte! Tiaj, kiel vi, ĉe ni abundas kaj ĉiuj atendas! Ni simple ne povas ĉiujn priservi, do!

–Mi eĉ ne scias, de kio komenci.. .La vivfadeno apenaŭ sin tenas... – parolis mi.

–Vi finu ŝerci! – ekkriis voĉo en telefono. – Ni ne havas tempon por ŝerci, vi komprenu! Ni malaltigis salajrojn, eksigis kelkajn personojn. Ni restis nur duope – mi kaj unu maljunulino.

–Sed mi restis sola, – respondis mi.

– Ĉe ni frostas, eĉ la animoj de estintaj klientoj tremas pro la frosto, –aŭdiĝis tremanta voĉo en telefono.

–Animoj? – mi ekmiris. – Kion oni faras ĉe vi?

–Ĉu estas via afero?! –kurte kaj firme hakis la voĉo en telefono kaj iom poste pli milde aldonis. – Nu... ili riproĉas, ke ni ne savis ilin, ke estas sentaŭga nia Animosava ofico.

–Tre malbonas... Mi tre bedaŭras, ke vi tiel malsukcesas..., –mi provis konsoli la voĉon en telefono.

Vi sciu...! –ekkriis tiu voĉo en telefono. –Vi tutegale vin mortigos! Ĉiuj donitaĵoj, kiujn ni ricevis, tion atestas. Mi sentas, ke mi vane perdas la tempon.

Tiumomente en mia pereanta animo io ekstremis, ekvibris. Kiel? Pro kio? Ili eĉ ne provas min forinstigi! Savi! Kiam en la lando estas tiom malbona demografia situacio! Kiam ĉiutage mortas pli ol naskiĝas! Nu ne! Ne estu tiel!

–Vi provu min persvadi, – mi parolis. – Eble mi ne mortigos min!

–Ĥe, –respondis virina voĉo. – Nur pro via kaprico? Prefere vi ne perdu tempon, ne prokrastu. Vi sciu, ĉio vanas. El nia laboratorio oni portis al ni peceton da via hepato... Tiu peceto krias – „mi ne volas vivi!“.

–Hepato eble ne volas, sed mi volas! – mi komencis nervoziĝi.

–Sen hepato?

–Sen hepato!

–Vi estas stranga paciento... , – nervoziĝis virina voĉo en telefono. – Multaj, similaj al vi, senhezite konsentas morti. Sed kiam ni mencias hepaton...

–Eble tiu hepatpeceto estas ne mia? Jes, jes. Mi eĉ ne dubas – ĝi ne estas mia! – mi ne cedis.

–Do, ĉu vi mortigos vin aŭ ne?! – scivolis ŝi.

–Mi ankoraŭ ne decidis, – dubis mi. –Mi portos al vi mian renon. Tiam ni decidos! Surloke!

–Ni havigas la servojn nur telefone! –ŝi kontraŭatakis min.

–Ne gravas, vi faru escepton. Kiu scias, eble lastan fojon mi trairos la stratojn de mia amata urbo... sub la balancantaj lanternoj, karesata de aŭtuna vento kaj pluvo... Kiu scias? –kaj metis mi telefonon.

Veninte al Animosava Servo, mi trovis tie du plorantajn virinojn. Maljunulino provis konsoli fraŭlinon, kiu telefonis al mi, ripetante: „Simona, ne sinmortigu vi. Kion oni pensos pri ni, pri nia servo? Ĉio pasos, ĉio preterpasos...“

–Mi renon portis, –mi sciigis ilin. –Jen.

Kaj metis mi sur la tablon rensimilan ŝtonon, trovitan sur la pavimo.

–Do, tiu estas vi? –ekkriis Simona. –Vi, prenu vin diablo, ankoraŭ vivas?!

–Ŝi pro vi freneziĝas, –klarigis al mi maljunulino, – ŝin forlasas prudento. Ŝi volas sinmortigi.

–Dum vi iris ĉi tien, –ploris Simona kaj parolis al mi, –kvin personoj forlasis nian mondon. Sed vi?

–Oni malaltigas niajn premiojn, –klarigis al mi maljunulino, –se ni ne sukcesas savi antaŭviditan kvanton da animoj.

Mi komprenis nenion. Ho, dio, kiom mizeras tiu servo?! Malordo!

–Simonjo, –mi ĉirkaŭbrakis ŝiajn mallarĝajn ŝultrojn, –vi iru kun mi. Vi ja ne mortigos vin nun kiel gapulino, ĉu ne? La vivo belas – post la ŝtormo la suno denove aperas! Ĉio rondiras – feliĉo, malfeliĉo...

Ŝi levis supren larmoplenajn okulojn, ili estis bluaj kaj belaj, kaj demandis:
–Ĉu vere?

–Vere, –respondis mi. –Krome mi estas tute sola. Tiel same kiel vi. Vi iru kun mi, ni trinkos kafon. Vi sciu, – mi plene malfermis mian koron, –verŝajne mi edzinigos vin.

Simona sereniĝis kiel ĉielarko. Ŝi kolektis siajn personajn aĵojn, ekkriis al maljunulino „adiaŭ“ kaj ni foriris... Jen ni vivas duope. Ŝi savis min. Mi iusence savis ŝin.

–Nun ni estas senmortaj, –diras Simona. –Ĉar ni ambaŭ jam staris sur la sojlo al la aliflanka mondo. Kiam ni geedziĝos?

–Diru vi, –mi demandis ŝin, – pri tiu hepato. De kie vi prenis ĝin?

–Ĥa, Ĥa, –ridis Simona. – La trompo! Ni nur provis novan metodon.

–Jen, kiel?! Tiam mi preskaŭ ekfidis! Simona, – mi diris serioze, – tio estas kruele!

–Jes, vi pravas, –konsentis ŝi, –tamen vivi ankaŭ necesas.

Pro tio ni duope organizis Animosavan servon. Ni laboras nur duope. Ni jam savis kelkajn animojn – ili nun estas senmortaj. Ĉefe per la hepato-rena metodo, tre rezultodona. Ĉar la homa korpo estas nesto de animo.

Tio estas kruele, jes, tamen vivi ja necesas.



esperantigita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Hong Jia (Ĉinio)

La amo de Malbela Panjo

1.

En la urbeto, kie mi laboras kiel ginekologo, vivas kolektantino de forĵetaĵoj. Pro ties malbeleco oni nomas ŝin Malbela Panjo. Dum ordinaraĵoj tagoj oni ĉiam vidas maljunulinon porti grapolon da forĵetitaj plastaj boteloj, aluminiaj ladskatoloj kaj malnovajn paperojn. Ŝi estas Malbela Panjo. Ŝi malhavas rimedojn aliajn ol kolekti tiujn forĵetitajn aĵojn por sin vivteni, kaj loĝas en apenaŭ pluvoŝirmebla apogŝedo. En la okuloj de urbanoj ŝi estas nenio alia ol povrindaĵo. Malmulte da homoj montras kompaton al ŝi kaj buboj ofte ŝin ĉasas, ĵetante ŝtonpecojn al ŝi. Sed ŝi ŝatas kaŝe observi la ludadon de gajaj infanoj sur stratoj. Iufoje bubo trovis ŝin ĉe stratangulo kaj ĵetis al ŝi ŝtonpecon. Ĝi flugis rekte sur ŝian kapon kaj frapiĝis kontraŭ ĝi, kaj la sango tuj ŝprucis disen el ĝi. Ŝi freneze kuris kiel vento al sia ŝedo.

Post kelkaj tagoj mi vidis ŝin fari aĉetojn kun blanka bandaĝo sur la kapo. Ŝi ŝancelpaŝe iris sur strato, tenante irbastonon en la mano. Tamen neniu volis doni al ŝi helpan manon, kvazaŭ ŝi tute ne ekzistus sub la onia vido. Mi iris antaŭen kaj demandis al ŝi, ĉu ŝi bezonas helpon, sed ŝi tenis sin senparola kaj ignoris min.

Kiam mi revenis hejmen post laboro, mi babilis pri ŝi kun mia patrino. Tiu diris, ke ŝi volvis bandaĝon por ŝi. Mia patrino ankaŭ laboris kiel kuracistino en la urbeto kaj kuracis multajn malsanulojn, riĉajn kaj malriĉajn. Ŝi diris, ke Malbela Panjo estas la plej povra malsanulino kaj ŝi eĉ senigis ŝin je kurackosto.

Post diplomigo el universitato mi fariĝis ginekologo en la urbeto. Krom regula laboro en la hospitalo, mi iras eksteren akuŝigi la gravedulinojn laŭ la peto de ties familianoj.

2.

Dum iu vintra nokto mi estis petata akuŝigi virinon ekster la urbeto. Kiel kutime mi piediris kun la medikamenta kesto sur la dorso al la celloko. Pro manko de virina mano mi multokupiĝis ĝis profundaj horoj de la nokto. Post akuŝigo mi iris sola al la urbeto. Mi malfacile min trenis en la frosta nokto. Kiam mi proksimiĝis al la hejmo, mi devis trairi malluman strateton. Komence mi ne sentis timon en la koro, sed pro tio, ke la frosta vento susurigas la velkintajn foliojn kaj videblas nenio signo de homo, mi trovis la obskuron iom makabra. Apud la vojo staris kelkaj kadukaj kabanaj, kiuj krake skuigis en ventpelo, kaj okaze falis tegolpeco el la tegmento. Tio pliigis al mi nervozecon. Mi aŭtomate rapidigis miajn paŝojn. Ĉe strateta turniĝo nigra ombro subite sin ĵetis sur min kaj strikte brakumis miajn brakojn. Mi tuj

konsciiĝis, ke malbonulo atakas min. Mi forte baraktis por liberiĝi el la vira brakumo. Tamen la brakumado estis strikta kiel tenajlo kaj la viraj spiroj siblis ĉe mia orelo. Abrupte li svingis sian pugnon kaj batis mian kapon. Kiam mi peze falis sur la teron, mi malklare vidis nigre vestitan figuron frapi lin per klabo. Kaj li, eliginte ĝemegon, falis teren. La figuro nigre vestitan surdorsigis min kaj pene trenis sin sur la malglata vojo. Kelkfoje li preskaŭ stumbe falis, sed li forte puŝis la teron per mano kaj pene leviĝis. Li ŝancelpaŝe iris senhalte antaŭen. Sur lia iom ĝiba dorso mi sentis varmon fluantan al mia brusto. Mia imago aktivis: Kiu finfine li estas? Kiel li scias, ke mi iras sur ĉi tiu strateto? Kial li savis min? Post kelka tempo ni atingis la pordon de mia hejmo. Li demetis min ĉe la sojlo, faris kelkajn frapojn je la pordo kaj fulme foriris.

Kiam mi vekiĝis, mi trovis min sur la lito de mia ĉambro. Sidante apud la lito, mia patrino suspire diris, “Feliĉe iu savis vin, alie la rezulto estas neimagebla! Mi aŭdis, ke hodiaŭ matene policanoj trovis la svenintan viron, sur la strateto, kiun vi trairis. Li estas la fifama fripono en la urbeto. Policanoj jam retenis lin en la karcero. Iu sin denunciis en la policejo, dirante, ke estas ŝi, kiu batis la viron ĝis sveno. Oni neniel imagas, ke ŝi estas Malbela Panjo. Nu, ripozu bone dum kelkaj tagoj. Mi jam petis por vi forpermeson de la hospitalo.” Mi senforte ekbalancis la kapon kaj ree falis en dormon.

3.

Post kelkaj jaroj la incidenton mi preskaŭ forgesis, sed de tiam mi ne kuraĝis iri sola por kuracado dum nokto.

Post nelonge venis al nia hospitalo juna kuracisto, kiu laboris antaŭe en alia hospitalo. Post dujara kunlaboro ni familiariĝis kaj mi enamiĝis al li. Tiuprintempe ni okazigis solenan nupton en lia hejmo, kiu situis nemalproksime de la urbeto. Ni varme akceptis gastojn kaj ties donacojn. Ĉar ni ambaŭ estis kuracistoj, multaj el la gastoj estis tiuj, kiujn ni kuracis. Ili malavare prezentis al ni laŭtradiciajn donacojn, kiaj ovoj, fumaĵitaj viandpecoj, koloraj toloj k.a. kaj samtempe bonaŭgurajn vortojn kaj bondezirojn.

Sub alta platano ni aranĝis festenon. La tabloj estis ŝarĝitaj plene de diversaj frandaĵoj. Mantenante vintason, ni novgeedzoj rondiris al ĉiuj tabloj por esprimi dankon al gratuloj de gastoj. Oni ĝoje ĝuis la frandaĵojn, ridete babilante. La infanoj ĝoje kriante ĉasis unu la alian tien kaj ĉi tien. Fronte al tiu ĉi sceno mi eksentis grandan feliĉon en la koro. Mi brakumis mian edzon, murmurante, “Mi amas vin el la tuta koro. Ni amu unu la alian dum la tuta vivo, ĉu bone?” Rigardante min, li ameme ekbalancis la kapon. La ĝoja etoso regis dum manĝado kaj babilado.

Subite oni eksplodis de surprizita klamado. Jen ĉe murangulo de la festenejo aperis fremdulino vestita en nova brilkolora kostumo, tenante fajne faritan kesteton en la

manoj. Jen ŝi estis Malbela Panjo. Laŭ la loka moro estis tabuo akcepti la neinvitan gaston, precipe tiam estaĵon primokitan kaj malestimitan de ĉiuj partoprenantoj. Ankaŭ mi ege surpriziĝis. Ŝi rigardis en mian vizaĝon kaj rekte paŝis al mi. Ŝi ridete diris, “Jen estas mia donaco al vi pro via edziniĝo.” Ŝi malfermis la kesteton kaj videblis brilanta braceleto. Mia edzo montris malkontentecon pri ŝia ago. Kelkaj buboj jam levis el la tero ŝtonpecojn por ĵeti ilin al ŝi. Tiumomente mia patrino haste iris antaŭen kaj haltigis la ĵetadon. Per laŭta voĉo ŝi diris, “Trankviliĝu, vi ĉiuj. Mi invitis ŝin al la nupto. Mi volas malkaŝi al vi sekreton, kiun neniu scias krom mi.”

4.

Mia patrino rakontis, “Antaŭ pli ol du dek jaroj okazis incendio en nia vilaĝo. La fajrego ruinigis multajn domoj kaj multaj homoj pereis en la katastrofo. Tiam ankaŭ la kabano de Malbela Panjo troviĝis en brulado. Trabo falis kaj mortigis ŝian edzon. Kaj ŝi strikte sin volvis en angulo de la kabano. Kiam oni elsavis ŝin, oni trovis, ke ŝi brakumas bebon en la sino, kvankam ŝiaj vizaĝo kaj korpo grave vundita de la fajrego. Oni tuj sendis ŝin al la hospitalo, kie mi laboris. Tre kompatinde! Ŝia vizaĝo serioze deformiĝis, tiel ke oni ne povis distingi ŝiajn verajn vizaĝtraĵojn. La bebon oni ankaŭ savis. Pro la grava vundiĝo ŝi ne plu kapablis ĝin vivteni. Do, mi adoptis la bebinon. Post elhospitaliĝo ŝi jam ne havis domon por loĝi. Oni helpis al ŝi konstrui malgrandan ŝedon ĉe muro kaj ŝi okupiĝas pri kolektado de forĵetaĵoj por vivteno. De tiam ŝi kaŝas sian veran identecon kaj vivas tute sola. Tamen ŝi ĉiam tenas sian filinon en la koro. Kvankam ŝia vizaĝo estas terure malbela, ŝi ĉiam kovas, kiel aliaj patrinoj, amon al sia filino. Fakte ŝi kaŝe observas kaj protektas ŝian plenkreskiĝon. Okazis, ke unu nokton, kiam ŝia filino revenis hejmen post akuŝigo de virino, ŝi trafis friponon, kiu volis seksatenci ŝin. Feliĉe Malbela Panjo kaŝe sekvis sian filinon por protekti ŝin. Ŝi batis la friponon per klabo kaj savis sian filinon. Ŝia filino estas neniu alia ol mia filino. Ĉe la nupto de mia filino mi invitis ŝin veni al la festeno. Jes, mi esprimu al ŝi mian profundan dankemon. Ŝi estas granda patrino por mia filino! Kvankam ŝi travivis multajn suferojn, ŝi firme plenumas la devojn de patrino!”

Aŭdinte tion, mi ege surpriziĝis. Diversaj sentoj kirliĝis en mia koro. Ŝi estas eĉ mia propra sanga patrino! Mi devas peti pardonon de ŝi, ĉar infanece mi primokis ŝin kune kun aliaj infanoj kaj plenaĝe mi ankaŭ havas strion da abomeno al ŝi. Kun varmaj larmoj mi min ĵetis al ŝi kaj firme ŝin brakumis. Ŝi donis al mi la braceleton, kiun, mi scias, ŝi aĉetis per la mono ŝparita dekelkajn jarojn. Tio ja estas la valora donaco plena je patrina amo. Malbela Panjo, mi vin amas! *

Yin Jiaxin (Ĉinio)



Ridetema soldato

En 1938, la kontraŭjapana rezistmilito jam atingis blankardan staton. Komence de junio la japana armeo ekatakis Wuhan-urbon en la centra Ĉinio. Post pli ol ducent bataloj dum du monatoj, mortis aŭ vundiĝis multe da soldatoj de ambaŭ flankoj. Por kompletigi la soldatokvanton de la frontlinio, la ĉina registaro urĝe varbis novajn soldatojn el proksimaj urbetoj kaj vilaĝoj.

Iutage de Julio, komisiite de la redakcio, mi kun fotilo veturis al Maĉen-urbeto por fari

aŭtoro, Yin Jiaxin

raportadon pri tiea soldatvarbado. Inter vicoj da marŝantaj varbitoj mi ekvidis infanecan vizaĝon, sur kiu ludas rideto tiel brila kiel maja floro.

Mi retenis la knabon: “Saluton, eta soldato! Mi estas raportisto el Ĵurnalo de Wuhan. Ĉu mi rajtas scii viajn nomon kaj aĝon?”

Li ridetante respondis: “Saluton! Mi nomiĝas Lu Bisen kaj aĝas dek kvar jarojn.” “Ah!” mirigite mi aldonis: “Tiom juna, vi devus viziti lernejon.”

“Lernejo?” Malĝoja rigardo ekfulmis en liaj okuloj. Li daŭrigis: “Ni jam ne havas lernejon.”

Antaŭ ol mi malfermis la buŝon, la knabo diris: “Ĝin ruinigis bombado de japanaj diabloj.”

Mi ŝanĝis la paroltemon: “Ĉu viaj gepatroj konsentas vian soldatiĝon en tiom juna aĝo?”

“Certe! Ili ĉiuj konsentas kun mi, la gepatroj kaj pli juna fratino. Ili rigardas min en paradizo, atendante ke mi venĝu ilin kontraŭ japanaj diabloj.” Dirante, la knabo kun amara rideto suprenrigardis la ĉielon kvazaŭ vere vidante siaj familianojn.

Mi ne sciis kion paroli kaj proponis fari fotadon por li.

“Bonege! Mi neniam fotigis min.” Gaja mieno montriĝis sur lia vizaĝo.

Mi emis plori en tiu momento, kiam mi direktis la objektivon al la knabo, kiu pozis rigide kun radia rideto.

Fotite, li scivole demandis al mi: “Ĉu mia foto povos aperi sur la ĵurnalo?”

“Jes, nepre,” mi respondis afable.

“Tre bone!” Li ridis elkore kaj preskaŭ ekdancis de ĝojo farante grandajn gestojn.

“Mi intencas doni al vi la foton post la milito kaj denove intervui vin, kie mi povos serĉi vin?”

Aŭdinte mian demandon, li mirstultiĝis unue kaj tuj respondis: “Eble vi povos eltrovi min je numero 1, Paco-avenuo, Maĉen-urbeto.” Dirinte, li forkuris al la vicoj kaj ĉeno da liaj ridegoj sonoris ĉe miaj oreloj por iom da tempo.

Je la 14-a de aŭgusto 1945 Japanio senkondiĉe kapitulacis, kaj la milito finiĝis finfine.

Laŭ la promeso, mi kun la foto veturis al Maĉen-urbeto por intervui la soldateton Lu Bisen. Elirinte la busostacion, mi alvokis rikiŝon kaj al la koĉero diris: “Bonvole iru al numero 1, Paco-avenuo.”

La koĉero iom konfuzite demandis min: “Ĉu via moŝto vere deziras iri al numero 1, Paco-avenuo?”

Mi jesis.

“Tiu loko estas tre malproksima,” li daŭre diris.

“Ne gravas. Mi pagos vin. Mi volas renkonti konaton.”



Ĵetinte strangan rigardon al mi, li sin returnis kaj ektrenis la timonetojn de la rikiŝo.

Atinginte la cellokon, ekster mia atendo mi trovis, ke tie estas martira tombejo.

Gvidate de laboranto, mi elserĉis la tombon de Lu Bisen. Ne troviĝis foto sur la tomba ŝtono. Mi eligis lian foton el mia teko kaj metis ĝin en la fotokadron sur la ŝtono. Vizaĝe al la naiva vizaĝo, mi deziris paroli ion sed nenion diris. La ridetanta vizaĝo estas tiel dolĉa kaj pura, ke mi ne forgesos por ĉiam.✘

Lao She (1899-1966)



Printempa Festo en Pekino

aŭtoro, Lao She

Laŭ la malnova kutimo en Pekino, la Luna Novjaro aŭ la Printempa Festo komenciĝas ĉirkaŭ la unua tagdeko de la dekdua lunmonato. “Je la sepa aŭ oka de lunmonato, ĝismorte frostiĝas monedoj.” Tio estas la kulmino de frosta sezono de la jaro. Tamen la frosta vintro baldaŭ cedos al printempo, tial la homoj ne malpliigos pro la frosto sian entuziasmon celebri la Novjaron kaj akcepti printempon. En la tago Laba¹ oni kuiras Laba-kaĉon kiel hejme tiel ankaŭ en temploj. Tia kaĉo estas uzata speciale por fari oferadon al prapatroj kaj al dioj, sed aliflanke en mia penso ĝi estas fiera esprimo de la agrikultura socio – tia kaĉo estas kuirita el ĉiuspecaj rizoj, fazeoloj kaj sekaj fruktoj, kiaj amandoj, kerno de nuksoj, melonsemoj, pulpo de liĉio, lotus-semoj, arakidoj, rosinoj, pulpo de trapoj, k.a. Tio ja ne estas kaĉo, sed malgranda agrikultura ekspozicio.

En la tago Laba oni ankaŭ faras Laba-ajlojn. Oni metas la ajlobulberojn en altklasan vinagron tiutage kaj sigele konservas ilin por akompani manĝadon de ĝjaŭzioj² dum la Ĉina Novjaro. Je la fino de la jaro, la ajloj maceritaj en la vinagro koloriĝas kiel smeraldo kaj la vinagro havas spican guston – ambaŭ tiel belas kaj kolore kaj guste, ke oni ne povas sin deteni manĝi pli da ĝjaŭzioj. En Pekino preskaŭ ĉiuj familioj gustumas ĝjaŭziojn dum la Ĉina Novjaro.

Ekde la tago Laba, en la butikoj oni estis okupita prepari la vendaĵojn por la Novjaro. Surstrate multiĝas vendostandoj, kiuj vendas respektive novjarajn versduojn, novjarajn pentraĵojn, mielajn oferaĵojn, narcisojn kaj tiel plu, ĉiuj tiuj vidiĝas nur dum ĉi tiu sezono. Tiuj standoj, kiuj postkuras la Novjaron, instigas la infanojn havi pli rapidan korbato. En la stratetoj oni prikras siajn vendaĵojn pli diversmaniere ol kutime. Iuj el tiaj krioj, kiaj por vendi almanakojn, pinobranĉojn, la semojn de koikso, kukojn el glua rizo, ktp, aperas nur en la lasta lunmonato de la jaro.

En la regado de la imperiestro, lernejanoj havis unumonatan feriaron ekde la dek-

naŭa de la lasta lunmonato de la jaro. La infanoj preparas sin por celebri la Novjaron, kaj la unua afero farota estas aĉeti miksitajn manĝetaĵojn, kiujn oni faris per diversaj sekigitaj fruktoj (arakidoj, jujuboj, aveloj, kaŝtanoj, ktp) miksitaj kun konfitaĵoj. Ĝenerale la miksaĵoj havas sur si ŝelon, dum tiuj altkvalitaj ne, ekzemple, por la ĝeneralaj miksaĵoj oni uzas avelojn kun ŝelo, kaj por la altkvalitaj oni uzas nur la karnon. Al la infanoj plaĉas tiuj diversaĵoj kaj, eĉ se mankas al ili ĝiaŭzioj, ili nepre aĉetas la miksaĵojn. La dua afero, kiun la infanoj, precipe knaboj, faros, estas aĉeti petardojn. Kaj probable la tria afero estas aĉeti ludilojn – kiaj kajtoj, diabloj, buŝharmonikoj, ktp – kaj ankaŭ novjarajn pentraĵojn.

Infanoj hasteme umas dum plenaĝuloj intense laboras. Ili devas pretigi ĉion, kion oni manĝas, trinkas kaj uzas dum la Novjaro. Ili devas ankaŭ rapidi fari novajn ŝuojn kaj vestojn por la infanoj, por ke ĉi tiuj povu aspekti freŝaj kaj gajaj dum la Novjaro.

La 23-an de la lasta lunmonato oni havas Antaŭfeston (aŭ Minoran Feston), kio preskaŭ egalas al la provludo por la luna novjaro. En la pasinteco, ĝuste en tiu nokto, oni faras oferadon al la Kuirforna Dio de domo al domo. Tuj kiam falas la krepusko ekkrakas la petardoj. Kun la krakoj oni bruligas paperan figuron de la Kuirforna Dio, kion oni eŭfemisme nomas “sendi la Kuirfornan Dion ĉielen”. Antaŭ kelkaj tagoj, sur la statoj ekŝvelis homoj vendantaj maltozojn kaj sukeraĵojn el glueca rizo. La sukeraĵoj estas longaj aŭ melonformaj. Oni diris en la pasinteco ke, se la buŝo de la Kuirforna Dio gluiĝus per la sukeraĵoj, li perdos kapablon klaĉi antaŭ la Jada Imperiestro pri la familiaj bagatelaĵoj. Hodiaŭ estas ankoraŭ sukeraĵovendantoj, kiuj tamen alportas la sukeraĵojn por ke oni ĝin nur gustumu kaj ne plu gluu la buŝon de la Kuirforna Dio.

Post Antaŭfesto oni fariĝas ankoraŭ pli okupitaj, ĉar la Ĉina Novjaro alvenos en palpebruma daŭro. Antaŭ la Jarfina Vespero, ĉiuj familioj ornamas sian domon per gluado de versduoj al la pordego, kaj krome faras necesan plenan purigon al sia domo, kion oni nomas “balai la domon”. Estas necese, ke oni ankaŭ sufiĉe pretigas manĝaĵojn, kiaj viando, kokaĵo, fiŝviando, legomoj, novjaraj kukoj ktp – ĉio ĉi sufiĉas por unusemajna manĝo. Laŭ malnova kutimo plimulto da butikoj estis fermitaj por kvin tagoj kaj ne akceptas klientojn denove ĝis la sesa de la unua lunmonato. Se oni ne pretigus manĝaĵojn sufiĉajn por kelke da tagoj, estus malfacile rehavigi ilin provizore. Plie, laŭ la malnova virina diro, oni nepre eltranĉis ĉion, kion estas eltranĉenda en la Jarfina Vespero, por ne uzi tranĉilon inter la unua ĝis la kvina de la unua lunmonato, ĉar tio alportas malfeliĉon. Kvankam tio enhavas iom da superstiĉo, tamen ĝi montras, ke ni vere tiel amas pacon, ke ni eĉ ne volas uzi kuirejan tranĉilon en la komenco de la jaro.

Kia movoplena Jarfina Vespero! Ĉiuj familioj urĝe faras pladojn kaj ĉie ŝvebas la bonodoro de brando kaj viando. Ĉiuj, ĉu junaj aŭ maljunaj, ĉu viroj aŭ virinoj, portas

sur sin novajn vestojn. Al la pordegoj algluiĝas ruĝaj versduoj dum ene de la domoj jam pendiĝas diverskoloraj novjaraj pentraĵoj. Ĉiu domo estas lumigita dum la tuta nokto sen interrompo, kaj la petardoj knalas tage kaj nokte. Homoj, kiuj perlaboras aliloke, krom se ne estos absolute necese, nepre hejmenvenos haste por manĝi rekuniĝan vespermanĝon kaj por fari oferon al siaj prapatroj. Tiunokte, krom tre junaj infanoj, neniu dormos kaj ĉiuj restos malfrue ĝis alveno de la Novjaro.

La sceno de la Novjara Tago tute diferencas de tiu de la Jarfina Vespero: en la Jarfina Vespero la stratoj estas movoplenaj, dum en la Novjara Tago preskaŭ ĉiuj butikoj fermas, lasante la posteksplozajn restaĵojn de la petardoj amasigitaj antaŭ la pordo. La tuta urbo ripozas.

Viroj ekiris antaŭtagmeze por fari novjaran viziton al siaj parencoj kaj amikoj, dum virinoj ricevas gastojn hejme. Samtempe multaj temploj en kaj ekster la urbo estas malfermitaj por vizitantoj. Stratvendistoj starigas standojn ekster la temploj por vendi teon, manĝaĵojn kaj diversajn ludilojn. La plej famaj kermesoj estas ĉe la Templo Dazhong (Templo Granda Sonorilo) ekster la norda kvartalo, la Templo Baiyun (Templo Blanka Nubo) ekster la okcidenta kvartalo, kaj la Templo Huoshen (Templo de Fajro-dio) en la suda kvartalo. En la unuaj du aŭ tri tagoj, la kermesoj tamen ne estas tiel movoplenaj, ĉar oni estas ankoraŭ tro okupitaj interŝanĝi la novjarajn salutojn por fari promenadon tien. Kiam venas la kvina aŭ sesa tago de la nova jaro, ekaperas homplenaj kermesoj. La infanoj aparte ardas tie vagi, nur celante por ĝui sovaĝan vidindaĵon ekster la urbo, rajdi sur la azenoj kaj aĉeti la ludilojn proprajn por la Novjaro. Sur la placo ekster la Templo Baiyun videblas vetkurado de aŭtoj kaj de ĉevaloj; kaj en la pasinteco onidire estis ankaŭ vetkuro de kameloj. En tiuj vetkuroj la rajdantoj ne strebas por gajni la unuan aŭ duan lokon, sed nur por paradi per siaj perfekta rilato kun la rajdataj ĉevaloj aŭ muloj kaj per sia rajdanta lerteco.

La plej multaj butikoj malfermiĝas en la sesa tago de la nova jaro, en la eksplodigo de petardoj. Aŭdiĝas en la tuta urbo la petardosonoj tiutage de la tagiĝo ĝis la frumatenato. La butikoj, kvankam jam malfermaj, ne estas tiel okupitaj, krom tiuj, kiuj vendas manĝaĵojn kaj aliajn gravajn ĉiutagajn bezonaĵojn. La komizoj de la butikoj povas eĉ laŭvice viziti la kermesojn, promeni sur la komerca strato Ĉielponto kaj spekti teatraĵojn.

Kun la vendiĝo de la pastobuletoj, alvenas la kulmino de la novjara celebros – la Lanterna Festo (en la daŭro de la 13a ĝis 17a de la unua monato). La Jarfina Vespero ja estas vivoplena, tamen ne troviĝas lunlumo; dum la Lanterna Festo hazarde vidas la helan lunon pendantan alte en la ĉielo. La Novjara Tago estas belaspekta en tio, ke videblas ruĝaj versduoj gliuĝantaj al la pordoj de ĉiuj domoj, homoj vestitaj en novaj vestoj, sed tio ankoraŭ ne sufiĉas por esti bela. En la Lanterna Festo ĉie estas

iluminita kaj festonita. La etoso sur la tuta strato, arda kaj bela, aspektas kiel feliĉa okazaĵo. La famaj malnovaj butikoj ĉiuj elpendigas centojn da lanternoj, el kiuj iuj estas faritaj el vitro, iuj el bovkornoj, iuj el gazo. Diversaj estas la lanternoj; sur kelkaj pentriĝas rakontoj el la romanoj *Ruĝdoma Sonĝo* kaj *Ĉe Akvorando*. Tio, tiam, estis nur reklamado. Kiam oni ekpendigas la lanternojn, ĉiuj povas eniri en la butikojn por viziti. En la vespero, kiam oni eklumigas la enlanternajn kandelojn, envenas pli da vizitantoj. Tiuj reklamoj tute ne estas vulgaraĵoj. Dum la Lanterna Festo, la vendejoj de sekigitaj fruktoj ankoraŭ vendas divers-specajn miksaĵojn. Ĉiuj tiuj manĝaĵoj montras sian originalecon, kiaj diversformaj glaciaj lanternoj aŭ longaj verdaj ĉinaj drakoj faritaj el tritikplantidoj; ili sukcese altiras klientojn.

Apud la pendantaj lanternoj, oni ornamas la placon ankaŭ per floro-miniaturaj. En la Urbodia Templo oni ekbruligas la figurojn de la inferaj juĝistoj. La flamoj senindulge lekas la buŝon, orelojn, nazon kaj okulojn de la juĝistofiguroj. En la parko oni flugigas lanternojn en la ĉielon kvazaŭ grandaj steloj alte en la firmamenton.

Viroj kaj virinoj ĉiuj eliras por promeni en la lunlumo, spekti la lanternojn kaj rigardi fajraĵojn; sur la stratoj oni ne povas moviĝi pro hompleneco. En la pasinteco, virinoj malofte eliris, sed rajtis havi iom da libereco dum la Lanterna Festo.

Infanoj aĉetas diversajn petardojn kaj bruligis ilin; eĉ se ili ne petolas surstrate, ili povas ankoraŭ sin amuzi per la petardoj hejme. Pendas la lanternoj ankaŭ hejme: kurĉevalaj lanternoj aŭ primitivaj filmoj, palacaj lanternoj, diversaj paper-lanternoj, kaj ankaŭ gazaj lanternoj, kun malgrandaj sonoriloj interne, kiuj tintos moviĝante. Plie oni ankaŭ devas manĝi pastobuletojn. Tio vere estas tago bela kaj feliĉa.

En palpebruma daŭro alvenis la fino de la Lanterna Festo kaj la kermesoj. La lernantoj devas reiri al la lernejo, kaj la plenaĝuloj returniĝas al sia laboro kiel kutime. La Novjaro oficiale finiĝas en la 19a de la unua lunmonato. En la kampara socio la dekdua kaj la unua lunmonatoj estas la plej senokupa tempo por ĉiuj; kaj dume, elkreskas porkoj, bovoj kaj ŝafoj (kaj kaproj), tial oni devas mortigi porkojn kaj ŝafojn por sin rekompenci por la peniga laboro de unu jaro. Post la Lanterna Festo la vetero varmiĝas kaj ĉiuj revenas al la laboro. Kvankam Pekino estas urbo, oni ankaŭ festas la Ĉinan Novjaron kune kun la homoj en la kampara socio, eĉ des pli vivoplena.

En la pasinteco, la Ĉina Novjaro estis celebrite paralele al superstiĉo. Antaŭ ol oni ĝuis Laba-kaĉon, Guandong-sukeraĵojn³ aŭ ĝjaŭziojn por la Jarfina Vespero, oni devis ilin unue oferi al Budho. En la Jarfina Vespero oni irprenis la diojn. En la dua tago de la nova jaro oni faris oferojn al la Dio de Riĉeco kaj manĝis huntunojn⁴. Kaj kelkaj homoj iris al la Templo de la Riĉec-Dio por preni ŝuformanajn paper-ingotojn kaj por konkure bruligi la unuan faskon da incenso. En la oka tago oni donis al la

maljunuloj aŭspiciajn stelojn kaj preĝis pri ties longviveco. Tial la plej granda elspezo en tiu tempo estis la mono, per kiu oni aĉetis aromajn vaksojn kaj paperĉevalojn. Nun oni jam ne havas ian ajn superstiĉon, kaj tiele povas savi tiun koston por celoj utilaj. Precipe indas mencii, ke la hodiaŭaj infanoj nur feliĉe festas la Ĉinan Novjaron, sen influo de superstiĉo. Ili sentas sin nur gajaj, sen timo antaŭ dioj aŭ fantomoj. Eble la Ĉina Novjaro ne estas tiel movoplena kiel antaŭe, sed kian klaran kaj sanan etoson oni havas hodiaŭ. En la pasinteco oni konfidis al la protekto de dioj kaj fantomoj dum la Novjaro, dum hodiaŭ oni diligente laboras ĝis la jarfino kaj rajtas gaje festi la Novjaron.

*Unue aperis en *Nova Observo*, Nro 2, Vol. II, januare 1951.

notoj:

1. *Laba*, la transliterigo de la ĉinlingva esprimo 腊八 (*là bā*) kiu efektive signifas “la oka (tago) de la dekdua luna monato”. Laŭ la ĉina tradicio, en tiu tago oni celebras la *Laba-Feston*.
2. Ĝiaŭzio, ĉina tradicia manĝaĵo el pasto farĉita per viando aŭ legomo, boligita en akvo aŭ vaporumita.
3. *Guandong-sukeraĵo*, malta sukeraĵo originas el nordorienta Ĉinio.
4. *Huntuno*, populara ĉina frandaĵo, farita el farĉo de muelita kaj spicita viando, volvita en maldika pasta tavolo. (el PIV)



elĉinigis *Liu Hongyuan* (Ĉinio)

Guy de Maupassant (1850-1893)



Unu Duelo

La milito finiĝis; la germanoj okupis Francion; la lando tikis kiel gladiatoro venkita, falinte ĉe la genuoj de la venkinto.

La unuaj trajnoj de panika, malsata kaj malespera Parizo elveturis, malrapide tratanĉis la kamparojn kaj la urbojn, kaj alrulis al novaj

aŭtoro, Guy de Maupassant

landlimoj. La unuaj vojaĝantoj rigardis tra la pordoj de vagonaro la ruinigitajn ebenaĵojn kaj la bruligitajn vilaĝojn. Antaŭ la pordoj de tiuj restantaj domoj, prusaj soldatoj, kiuj portis nigran kaskon kun kupra pinto, rajdante sur seĝoj, fumis pipon. Aliaj laboris aŭ babilis kiel hejme. Kiam la trajno preterpasis la urbojn, oni vidis la tutan regimentojn da soldatoj manovris sur la placoj. Kaj malgraŭ la granda bruado de radoj, ankoraŭ aŭdiĝis de tempo al tempo raŭka ordonado.

S-ro Dubuis, kiu iam aliĝis al la nacia armeo de sindefendo de Parizo sieĝita dum la tuta tempo, iris al Svislando por intervidiĝi kun siaj edzino kaj filino, senditaj pro diskreteco al la fremdlando antaŭ la invado.

La malsato kaj laciĝo neniom malgrandigis la grasan ventron de la riĉa kaj pacama komercisto. Li estis elteninta la terurajn eventojn kun dolorega rezignacio kaj malbenis nur per akraj frazoj la barbarajon de homaro. Nun la milito finiĝis, li alvenis al landlimo. Li unuafoje vidis prusojn, kvankam li estis plenuminta sian devon sur la remparo kaj gardostarinta multfoje en la frosta nokto.

Li rigardis kun kolera teruro ĉi tiujn armitajn kaj homojn kun barboj restis sur la tero de Francio kvazaŭ en sia lando, kaj li sentis, ke en la koro estis senpova patriotisma vervo, kaj ke li havis fortan bezonon por sagace sin protekti, novan instinkton kiu eĉ momente ne povis deiris de ni.

En lia vagono estis du angloj venintaj al Francio por viziti. Ili rigardis per siaj trankvilaj kaj scivolemaj okuloj. Ili ambaŭ estis grasaj kaj babilis en sia lingvo de hejmlando. Iutempe ili tralegis sian gvidlibron kaj laŭte voĉlegis, pene rekonis la lokojn indikitajn.

Subite, la trajno haltis ĉe la stacidomo de malgranda urbo. Prusa oficiro suriris per la vagona eskalo de du ŝtupoj, kun granda tintado de sia sabro. Li estis altstatura, preme vindita en sia uniformo, kun barbo sur la tuta vizaĝo etendiĝanta ĝis la okuloj. Lia ruĝaj haroj similis al flamo, kaj liaj longaj lipharoj, pli iom malhelaj, etendiĝis de du flankoj de la vizaĝo, kiun ili transverse tranĉis.

La angloj tuj kontemplis kun rideto pro kontenteco de sciemo al li, tiam s-ro Dubuis ŝajnis legi ĵurnalon. Li kuntiriĝis en angulo, kiel ŝtelisto antaŭ policano.

La trajno startis denove. La angloj daŭre babilis, serĉis la precizan lokon de militoj; kaj subite, dum unu el ili la brakon etendis malproksimen, montrante vilaĝon, la prusa oficiro diris france, etendante liajn krurojn kaj retrokliniĝante la dorson.

“Mi mortigis dek du francojn en la vilaĝo, kaj kaptis pli ol cent homojn.”

Kun granda intereso, la angloj tuj demandis:

“Ah! Kiel nomiĝas la vilaĝo?”

Li respondis: “Pharsbourg.”

Li daŭrigis, “Mi ekprenis tiujn francajn trivialulojn je la oreloj kaj tute kaptis ilin.” Rigardante al s-ro Dubuis, li arogante ridis kun larĝigita buŝo en sia barbejo.

La trajno ruliĝis, trapasante sinsekvon da vilaĝoj okupitaj. Oni vidis la germanajn soldatojn laŭ la vojo, ĉe la bordo de kampoj. Ili staris babilante en angulo de bariloj aŭ ĉe la pordo de la kafejoj. Ili, kiel la akridoj de Afriko, kovris la teron.

La oficiro etendis la manon kaj diris, “Se mi komandus, mi jam delonge okupus Parizon, kaj bruligus ĉion, kaj mortigus ĉiujn homojn. Francio jam delonge ne ekzistus!”

La angloj, pro ĝentileco, simple respondis, “Ah! Jes.”

Li daŭrigis, “Post dudek jaroj, la tuta Eŭropo tute apartenus al ni. Prusujo estus pli forta ol ĉiuj aliaj landoj.”

La angloj, maltrankvilaj, ne respondis plu. Iliaj vizaĝoj fariĝis senesprimaj, ŝajnante vakso inter iliaj longaj vangbarboj. Tiam la prusa oficiro ekridis. Kaj ĉiam retrokliniĝante la dorson, li mokridis. Li mokridis pri la disfaligita Francio, kaj insultis la venkitajn malamikojn. Antaŭ nelonge li ankaŭ mokridis pri la venkita Aŭstrio, pri senforta kaj vana defendado de ĉiuj provincoj, kaj pri franca volontul-armeo kaj neutila artilerio. Li anoncis, ke Bismarck muldus urbon el fero per la kaptintaj kanonoj. Kaj li subite metis siajn botojn kontraŭ la femuron de s-ro Dubuis, kiu deturnis la okuloj, ruĝiĝinte ĝis la oreloj.

La angloj fariĝis verŝajne indiferentaj al ĉio, kvazaŭ ili abrupte estus fermita en sian insulon, for de bruoj de la mondo.

La oficiro eltiris sian pipon, kaj fiksrigardinte la francojn, “Ĉu vi havas tabakon?” S-ro Dubuis respondis, “Ne, s-ro!”

La germano aldonis, “Bonvolu iri aĉeti iom da tabakoj kiam la trajno haltos ĉe la stacidomo.”

Kaj li denove ridis, “Mi donos al vi trinkmonon.”

La trajno fajfis, malakcelis sian veturadon. Ĝi malrapide pasis antaŭ la nebruligitaj konstruaĵoj de stacidomo, kaj poste tute haltis.

La germano malfermis la pordon de la vagono, kaj prenante s-ron Buduis je la brako, diris, “Iru aĉeti por mi, rapide, rapide!”

Taĉmento da prusaj soldatoj garnizonis en la stacidomo. Aliaj soldatoj rigardis foren starante ĉe ligna barilo. La lokomotivo jam fajfis por ekveturi denove. Tiam, s-ro Dubuis abrupte saltis sur la kajon, kaj malgraŭ ke ĉefo de stacidomo geste haltigis lin, li hastege enstrudiĝis en la najbaran kupeon.

Li estis sola! Kun bateganta koro, li do malbutonumis sian veŝton, kaj li deviŝis ŝviton de la frunto, spiregante.

La trajno haltis denove en stacidomo. Kaj subite la oficiro aperis ĉe la pordo de la vagono kaj tuj sekvis lin suriri la vagonon. Du angloj kaptiĝis per scivolemo. La germano sidis antaŭ la franco, kaj diris ĉiam ridante, “Ĉu vi ne volas fari aĉeton por mi?”

S-ro Dubuis respondis:

“Ne, s-ro!”

La trajno ekmoviĝis.

La oficiro diris, “Mi volas eltranĉi vian barbeton por pleniĝi mian pipon.”

Li etendis la manon al la vizaĝo de sia samsidlokano.

La angloj ĉiam estis aplombaj, fiksrigardante.

Tiam, la germano jam prenis pinĉplenon da barbo permane kaj tiris supren. S-ro Dubuis mandorse faris baton, suprenlevis brakon de sia kontraŭulo, kaj kaptis lin permane je la kolumo, premis lin sur la benkon. Poste, li eksplodis de furiozo, kun tempioj ŝvelantaj kaj okuloj plenaj de sango. Premante lian kolon per unu mano, li tutforte batadis sur lia vizaĝo per alia pugniganta mano. La pruso laŭeble baraktis, volante eltiri sian sabron kaj ĉirkaŭpremi sian kontraŭulon kuŝantan sur li. Sed s-ro Dubuis lin premis per sia peza ventregio, kaj frapadis, senripoze frapadis, senĉese frapadis, sen scii kien falis liaj battoj. La sango elfluis. La germano, kies kolo estis strangolita, senĉese spiregis, kaj elkraĉis siajn dentojn. Li provis deĵeti ĉi tiun furiozan dikulon batantan lin, sed utilis neniom.

La angloj staris proksime por ĝue vidi. Plena de ĝojo kaj scivolemo, ili preparis veti por ĉiu gajno aŭ malgajno de la batalantoj.

Elĉerpita pro fortstreĉo, s-ro Dubuis subite stariĝis kaj residiĝis, dirante nenion.

La pruso, kun konsterno kaj doloro, estis momente ĵetita en panikon, tial ne ĵetiĝis atake kontraŭ li. Respirante, li diris, “Se vi ne volas dueli kun mi per pistolo, mi vin mortigos.”

S-ro Dubuis respondis, “Jes, kiam ajn vi volos, mi tre volas.”

La germano daŭrigis, “Ĉi tie estas la urbo Strasburg. Mi iru venigi du oficirojn kiel atestantojn. Antaŭ la trajno ekmoviĝos, mi ankoraŭ havas tempon.”

S-ro Dubuis, kiu spiregas kiel lokomotivo, diris al la angloj, “Ĉu vi volas servi kiel atestantoj?”

Du homoj samtempe respondis, “Ho! Jes!”

Kaj la trajno haltis.

Dum unu momento, la pruso trovis du kamaradojn, kiuj kunportis pistolojn, kaj ĉiuj ĝisiris la remparojn.

La anglo senĉese elpoŝigis sian horloĝon por rigardi, kaj akcelante siajn paŝojn, faris preparojn, ĉar ili timis, ke ili prokrastas tempon por reveturado de trajno..

S-ro Dubuis tenis neniam pistolon. Oni lin kondukis al loko fore de sia kontraŭulo je dudek paŝoj. Iu lin demandis, “Ĉu vi estis preta?”

Respondante “Jes, s-ro”, li ĵetis rigardon kaj vidis, ke unu el du angloj malfermas sian pluvombrelon por ŝirmi sin de la suno.

Eksonis komando, “Ekpafu!”

S-ro Dubuis tuj pafis senatente, kaj li ĵetis surprizan rigardon al la pruso staranta en kontraŭa flanko, kiu ŝanceliĝis, levis la brakojn kaj rigide falis sur la ventro. Li estis mortigita de li.

Unu anglo kriis “Ho!” kun vibranta voĉo de ĝojo, de kontentigo de scivolemo kaj de humoro de ĝojiga senpacienca. La alia, ĉiam tenante sian horloĝon en la mano, ĉirkaŭprenis s-ron Dubuis je la brako, kurante al la stacidomo.

Pugniĝinte, la unua anglo kuris, kalkulante la paŝojn, kun siaj kubutoj ĉe la korpo. “Unu, du! Unu, du!”

La tri trotis flankon ĉe flanko, malgraŭ siaj ventroj kiel tiuj groteskaj en ĵurnalo por amuziĝo.

La trajno ekmoviĝis. Ili saltis en vagonaron. Tiam, demetinte siajn tekojn de vojaĝo, la angloj levis ilin svingante, kaj poste sinsekve kriis trifoje:

“Brave, brave, brave! hura!”

Tuj poste, ili serioze etendis unu post alia la dekstran manon al s-ro Dubuis, kaj ili sin turnis kaj sidiĝis ŝultron ĉe ŝultron en siaj propraj sidlokoj.



elfrancigis **Leming Lin** (Ĉinio)


Iljet Aliĉka (Albanio)



La patrino

aŭtoro, Iljet Aliĉka

Ne facile mi forgesos tiun nokton, nian aĉan konduton pro timo... Kutime ni, instruistoj el Nordo, veturadis ĉiujn du semajnojn al Tirana por du tagoj kaj revenadis al la vilaĝoj dimanĉe vespere. Resti ĝis lundo povus kaŭzi al ni poste multajn zorgojn. Sed pri transporto ni havis tre grandajn malfacilaĵojn. Unue ni devis kapti la trajnon al La ĉ, kaj tie de la fervoja stacio ni kuregis al la kasejo kun kradfenestreto por aĉeti busbileton. Se ni havis feliĉon, ni povis tra la tumulto ŝoviĝi al la fenestreto. Plej ofte ne eblis levi la manojn, ĉar la brakoj devis ŝirmi la ripojn antaŭ la premeganta amaso. La kradoj en la fenestreto estis tiel densaj, ke pene oni povis enŝovi la polmon kun mono. Tiuj, kiuj sukcesis kroĉiĝi al la fenestreto, ekligis kontakton kun la kasistino per krio tute ne vidante ŝin – ili havis antaŭ la okuloj nur la konturon de la ĉiopova figuro. Kaj sian monon ili devis precize kalkuli, ĉar ŝi neniam donis la reston.



Okazadis, ke homoj forŝoviĝis de la fenestreto kun rompitaĵoj aŭ – pli malbone! – sen bileto. Ĉar malgraŭ la Titana fortostreĉo, kiam homo faris ĉion, kion li povis, riskante eĉ danĝeron al la propra sano – plej ofte tiu ligna voĉo kun kaŝa ĝojo diskonigis la malagrablan novaĵon pri la biletoj: „Elĉerpiĝis”. Tiam ni havis momentojn de profunda elreviĝo.

La alia solvo estis „okazoj” – la kamionoj transportantaj lignon aŭ kromion. Se vi sukcesis eniri kamionon, vi sentis, ke la sorto vin favoras – malgraŭ la trapikanta frostoj kaj dika tavolo da polvo, kovranta la tutan korpon. Ĉar dimanĉe vespere la kamionoj veturadis tre malofte, iafaje dum la tuta nokto oni vidis nenium – kaj se iu aperis, la ŝoforo preferis kunpreni knabinojn. Do, se ne aperis la kamiono, vi atendadus sur la ŝoseo en Laĉi dum horoj, sidante en densa mallumo, en malvarmo kaj frostoj.

Iun nokton, same kiel hodiaŭ, mi kunprenis triumfe per fingroj du biletojn – unu por mi, la alian por la kuracistino laboranta en mia vilaĝo. Ekscitite pro la kverelo antaŭ la fenestreto mi tute ne sentis malvarmon. Atendante la buson mi babilis kun la kuracistino drole kaj petole, mi invitis ŝin al la malpura bufedejo en la stacidomo por glaseto da konjako, ĉar en tia momento, oni ne scias pro kio, la homo sentas sin feliĉa, malstreĉita kaj kuraĝa.

Nian buson kondukis Ali, sperta ŝoforo, ĉiam ridetanta. Lia granda domo, unu el la plej belaj en la urbo, estis konstruita per la mono de tiuj pasaĝeroj, kiuj ne havis bileton (antaŭ la komenco de la veturo Ali kriis, ke restis – kvazaŭ hazarde – du-tri lokoj, kaj sur ĉi lokojn li sidigis homojn, kiuj ne aĉetis bileton, kaj ili pagis al li). Por ĉiu el la tri lokoj, kiujn havis Ali, estis pli ol dudek volontuloj. Kaj li – reganto – sur la buso-ŝtupo observis la amason da malfeliĉuloj, kiuj interpretiĝis, dezirante vidi sin antaŭ liaj okuloj. Tumultiĝis, ĉiuj vokis: „Ali-Ali” – sed la ŝancoj por la sukceso estis malgrandaj kaj la aŭtomata buspordo ĉiam prenis la manojn de tiuj, kiuj ne perdante la esperon, spasme kaptis la tenilon.

Malgraŭ tio Ali sciis, kiel ne malcedi kaj zorgi pri si: neniam li kunprenis pli da pasaĝeroj. Estis kompreneble ankaŭ, ke unue li veturigis siajn geamikojn, kaj poste – oni devas konfesi – honeste kaj noble li elektis maljunulojn aŭ virinojn, kiujn li ne povis lasi senhelpe en mallumo. Ĉiuj estimis lin pro tio.

Tiun nokton, kvankam ne estis tiom da volontuloj (nur sep, ok personoj), denove, pro frostoj, komenciĝis senkompata baraktado.

Ĉiuj kun biletoj eniris la buson kiel la unuaj. Post la preciza kalkulo Ali kriis al la homoj tumultantaj ekstere: „Mi havas ankoraŭ du lokojn.”

La amaseto ondadis: „Ali-Ali!”

La ŝoforo unue prenis tre maldikan knabinon, kiu neniam, de kiam mi memoras, sukcesis aĉeti bileton. Ŝi eniris, akompanata de niaj rigardoj, ruĝiĝante, kun mallevita kapo, kaj per longaj, kaŝtanbrunaj haroj ŝi volis kaŝi siajn ruĝajn vangojn. Kiel duan pasaĝeron Ali elektis maljunulinon, kiun klinigis la pezo de grandaj retsakoj. Sen momento de hezito, superkriante la bruon, li vokis: „Mi prenos tiun maljunulinon kaj nenium pli. Eĉ ne petu. Tralasu ĉi patrinon kaj ne staru vane”.

La pasaĝeroj de la buso akceptis kun estimo la noblan elekton de Ali. Des pli, ke la maljunulino staris flanke kaj tute ne kriis. Oni ne scias, ĉu ŝi ne havis forton aŭ tio ne estis ŝia kutimo. Kun peno ŝi komencis trapremiĝi antaŭen. Malhelpis la grandaj retsakoj. En ŝiaj movoj oni vidis ĝojon kaj grandan feliĉon. Kiam ŝi alproksimiĝis, en la buslumoj ni ekvidis la vizaĝon, kiu estis terure elĉerpita de la vivo, sed ne perdis signojn de iama beleco. Ŝi estis vestita mizere, sed alie ol la vilaĝaninoj.

Ŝi eniris la buson, kaj mi neniam vidis en mia vivo personon, kiu disradiadus pli grandan dankemon. „Mi dankas vin, mi dankas per la tuta koro, mi ne scias, kiel reciproki tion, filo” – ŝi ripetadis kortuŝita. Ŝi trapremiĝis inter la sidlokoj kaj diris al si: „Malvarmas, kaj mi konas nenium ĉi tie. Mi staradus dum la tuta nokto”.

Tiuj malbenitaj vortoj venigis malfeliĉon por ŝi.

Subite leviĝis iu pasaĝero en dika vesto kaj decidpaŝe ekiris al Ali. Ion li flustris en la orelon. Ali saltetis kiel bruligita. „Ha! – li elbalbutis – ĉi maljuna virinaĉo! Do, ŝi tial ŝajnigas mizerulinon kaj parolas nenion. Ŝi scias bone, kio mi estas! Nu, ŝi volis trompi min, hundino...”

Li elŝaltis la motoron, leviĝis kaj ordone kriis al la maljunulino, kiu jam eksidis.
– Eliru, tuj eliru!

– Kial? – ŝi demandis balbute. – Mi pagos al vi.

– Mi ne bezonas vian monon. Eliraĉu.

– Kial?

– Vi mem scias plej bone – blekis Ali. – Tuj eliraĉu! La aliaj perdas sian paciencon, atendas, kaj vi portas manĝaĵon al la malliberejo por via bubaĉo.

Por ĉiuj estis klare: ŝi veturas al la fifama malliberejo en la urbo, kun pakaĵo por sia filo.

– Lasu ŝin, estu kompatema – diris iu malantaŭe en la buso.

Ĉiuj turnis la kapon, sed ili ne vidis, kiu diris tion.

– Tiu, kiu petis – muĝis Ali, furioza kiel besto – donu sian lokon al ŝi, la bileton kaj eliru, se li volas. Do, kiu?

Ĉiuj mutiĝis.

Mi ne povis rigardi ĉi virinon pli longe. Ŝi sidis kiel leporo en kaptilo, ĉirkaŭrigardante kun timego. Oni vidis, ke tio ne estis nova por ŝi – la malamo aŭ

timo de la ŝoforoj por veturigi proksimulojn de la politikaj malliberuloj. Ho, Dio, mi eksentis teruran doloron. Mi tremegis.

„Mi donos la sidlokon al ŝi” – ĉi tiu penso flugis tra mia kapo.

Mi rigardis ankoraŭfoje la maljunulinon. Ho, Dio, kiel mi kompatis ŝin!

„Jes – mi decidiĝis – mi eliros kaj donos al ŝi la bileton, jen ĉio”

Per tremantaj manoj mi komencis eltiri mian pakaĵon. Subite mi eksentis, ke la kuracistino forte kaptis min ĉebrake kaj flustras: „Ĉu vi frezeziĝis?!” Ŝi kunpremis la brakon. Sur ŝia vizaĝo estis timego. Mi diris en la animo, ke ŝi pravas. Mi eksidis, turniĝis por ankoraŭfoje rigardi la maljunulinon – sed tiu jam eliris. Ŝi staris sur la ŝtupetoj de la buso.

Kiam ŝi haltis elbusiĝinte, disfalis ŝiaj retsakoj. Ankoraŭfoje ŝi rigardis la busedon esperante, ke Ali kunprenos ŝin. Ŝiajn grizajn harojn taŭzis frosta vento, kaj la okulojn plenigis larmoj. Pro la vento kaj humiligo ŝi povis elbuŝigi nenium vorton.

Ali plu blekis:

– Hundino, ŝi volis trompi min! Mi estis kompatema, ĉar ŝi havis kelkajn retsakojn, sed mi tute ne vidis la sukeron kaj marmeladon, kiujn ŝi veturigas al la malliberejo. Kaj tial ŝi ne kriis same, kiel la aliaj: „Ali, Ali!”, ĉar ŝi bone scias, kio ŝi estas.

– Prenu almenaŭ iun – diris unu el la sidantoj.

– Neniu! – respondis Ali sen turniĝi. – La diablo ilin prenu! Hodiaŭ oni ne scias, kiu estas kiu. Ankaŭ mi havas infanojn por nutradi.

La buso ekveturis. La maljuna virino staris kiel ŝtoniĝinta. Kvazaŭ la tempo haltus por ŝi.

Ni veturis. Jam neniu parolis pri la okazintaĵo. En la buso estis varme, kaj post momento ĉiuj komencis babili pri ĉio kaj nenio.

Post horo mi komencis endormiĝi. „Bone, ke mi ne eliris. La malvarmeĝo estas bagatelo, sed kio poste?” – mi diris en la animo, dormetante agrable. – „Antaŭ ol mi kaptus sur tiu malvarmega vojo ian veturilon, la sekur-servo en la distrikto jam ricevus kvardek denunciojn – tiom, kiom da pasaĝeroj en la buso”.

„Mi ne solvos ĉiujn problemojn de la malfeliĉaj homoj”. Fine mi trovis pravigon – kaj dormis kviete ĝis la vojaĝfino.



elalbanigis **Bardhyl Selimi** (Albanio)

Daphne du Maurier (1907-1989)



Daphne du Maurier, angla verkistino famiĝis pro siaj psikologie profundaj romanoj kaj rakontoj. Ŝia majstroverko estas Rebecca. La jena rakonto adptiĝis el unu el ŝiaj rakontoj.

aŭtorino, Daphne du Maurier

La Destinita sorto

Du ĝemelinoj

Geedzoj Johano kaj Laŭra havis filon kaj filinon. Lastatempe ilia filino forpasis pro malsano. Por sin distri Johano kaj Laŭra iris al Italio.

Tiun tagon ili tagmanĝis en restoracieto en Venecio, sidante vidalvide. Li subite trovis, ke du ĝemelinoj sidantaj malantaŭ ŝi fikse rigardas ilin kaj kaŝe flustras unu al la alia de tempo al tempo. Naskinte dubon en la koro, li mallaŭte diris al ŝi, “Malantaŭ vi du ĝemelinoj flustras inter si, rigardante nin.”



Ekpensinte, Laŭra elprenis pudrujon kaj kaŝe observis ilin per ties speguleto. Tiam unu el ĝemelinoj starigis kaj iris al klozeto. Kun eksciteco Laŭra tuj diris al Johano

duonvoĉe, “Mi ankaŭ iru al la klozeto fari interparolon kun ŝi por scii, kion ili volas.” Fininte tion, ŝi iris al la klozeto. Li ne sukcesis reteni ŝin, sed kiam li vidis, ke ŝi ne plu malĝojas, li nereteneble eligi la spiron de faciligo.

Post kvaronhoro, ŝi revenis. Li plendis, “Kial vi restis tie tiel longe? Mi eĉ volus serĉi vin...” Dirinte, li ĵetis ekrigardon al ŝi, trovante, ke ŝi portas strangan vizaĝesprimon kaj stumble sidigas.

Li ekkaptis ŝian manon kaj demandis, “Kio okazas al vi, kara? Ĉu vi sentas vin malbona?”

Ekskuinte la kapon, ŝi ekridis, “Ili du rigardadis nin la tutan tempon, ĉar ŝia plijuna fratino estas blinda, sed ŝi estas medio de povas vidi nian filinon! Apud ni staris nia filino vestita en jupo el kotona krepo, ridetante.”

Aŭdinte tion, demandis kun trudita rideto, “Bone, Ĉu ili invitas vin renkontiĝi refoje?”

Ŝi strange diris, “Ne. Kial vi elmetas tian demandon? Ili ne estas trompisto.” Li ekbalancis la kapon kun faciligita spiro.

Post tagmanĝo ili eliris pasumi en la placo. Tamen li tenis la du ĝemelinojn en la cerbo kaj senĉese okulserĉis ilin. Kaj fine li trovis, ke ili staras neralproksime kaj kaptante la brakon de sia pliĝa fratino, la plijuna fratino firme gapas lin per blindaj okuloj.

Certe ili estas trompisto, li pensis, kaj pretas trompi Laŭran! Post momenta pensado, li diris al Laŭra, “Ĉi tie multas homoj. Ni iru al kvietaj loko por promeno.” Dirante, li persiste tiris ŝin forlasante la placon kaj suriris la vojetojn apud la kanalo, liberiĝinte de la du ĝemelinoj. La vojeto estis dezerta. Pasumante la tutan posttagmezon, ili trovis, ke ili perdis la vojon. Ĝuste tiutempe ili aŭdis ekkrion el la kontraŭa domo, kvazaŭ eliganta el la gorgo strangolita.

Timigite, Laŭra demandis mallaŭte, “Kia sono?”

Kun kunŝovitaj brovoj Johano, “Eble tie estas ebrulo. Ni rapide foriru.”

Apenaŭ ili volis foriri, kiam knabineto kun kapuĉo ŝteliris el la kelo de la kontraŭa domo kaj saltis sur la boaton sur la kanalo. Ŝi, etstatura, sed facilmovata, saltadis sinsekve tra kvar boatoj kaj malaperis en la kelo de alia domo.

Kun maltrankvileco Laŭra diris, “Ĉu tiu ĉi knabineto estas malbone traktata? Ĉu ni raportu tion al polico?” Kun ioma hezitemo ŝia edzo ekskuis la kapon kaj fortiris ŝin. Post kelka tempo ili fine trovis restoracion kaj eniris por vespermanĝo. Lin malesperigis, ke tiuj du ekstravagancaj ĝemelinoj ankaŭ troviĝis en la restoracio. Vidante ilin, Laŭra tre ekscitiĝis, ke ŝi, forlasinte sian edzon, iris al ili por vespermanĝo. Senhelpe li trovis alian tablon kaj ekmanĝis.

Alia ĝenaĵo

Kiam Johano preskaŭ finis manĝon, Laŭra revenis kaj diris streĉite, “Tiu blinda fratino diris, ke se ni restos en Venecio, nin trafos danĝero. Por eviti eventualan ĝenaĵon ili restigis al ni adreson por kontaktado kun ili.

Li tuj falis en koleregon kaj nereteneble ekkriis al ŝi, ke ŝi malproksimiĝu de tiuj du trompisto.

Ŝi malĝoje diris, “Mi scias, ke vi pensas tiamaniere. Tamen nia filino diris al ŝi! Ŝi aldonis, ke se ni nur forlasos Venecion morgaŭ, nenio okazos. Joĉjo, ni prefere foriru!

Kun kolera fajro en la koro li rikanis, “Bone, ni foriru. Ni atendu kaj vidu, kian artifikon ili povos ludi!” Dirinte tiujn vortojn, li pagis kaj fortrenis ŝin.

Reveninte al la hotelo, Johano ricevis telegramon el la hejmo, legiĝantan, ke ilia filo suferas de akuta apendicito kaj bezonas operacion. Kun brula maltrankvileco ili decidis, ke ŝi prenos flugmaŝinon al Britio frumatene morgaŭ, kaj li stiros aŭton kaj poste prenos ŝipon hejmen kun pakajoj.

Ordigante la pakajojn, ŝi ne forgesis diri, “Nu, tio pravas, ke la du ĝemelinaj estas pravaj. Ni devas forlasi Venecion por vidi nian filo, kiu estas en danĝero.” Li volus refuti ŝin, sed li nur montris okulblankon al ŝi kaj ne eligis unu vorteton.

La sekvan matenon servistino ĉe la kontoro de la hotelo telefone diris al Laŭra, ke ili mendis sidilon en flugmaŝino por ŝi kaj post unu horo ŝi povos forlasi Venecion, kaj ke post dek minutoj motorboato prenos pasaĝerojn al la flughaveno. Johano sendis ŝin malsupren kaj vidis ŝin suriri la motorboaton. Poste li revenis al la ĉambro kaj faris pakadon. Posttagmeze li prenis pramŝipon kaj veturis al Milan, kie li restos unu nokton kaj de kie li stiros aŭton al Britio.

Sur la larĝa kanalo ondoj briletis. Johano vidis pramŝipon alveturanta el la kontraŭa direkto kaj li subite trovis, ke Laŭra sin trovas sur ĝi kaj apud ŝi staras tiuj du ĝemelinaj, kaj ke la pliaĝa fratino ĉirkaŭprenas la brakon de Laŭra kaj tiu tristmiene diras ion.

Surprizite Johano diris nenion kun gapantaj okuloj al la pramŝipo forveturanta en kontraŭa direkto.

Kio okazas finfine? Tiu flugmaŝino certe ne ekflugis! Se tiel, kial Laŭra ne telefonis al li? Kion faras tiuj damnaj ĝemelinaj? Ĉu ĝi estas koincido? Kial Laŭra aspektas tiel maltrankvile? Li ne povis elpensi ajnan klarigon.

Elŝipiĝinte, li unue donis telefonvokon al la hotelo en Venecio. Informiĝinte ke Laŭra ankoraŭ ne revenis al la hotelo, li petis al la servistino ĉe la kontoro, ke se tiu vidos ŝin, tiu lasu ŝin atendi en la hotelo. Tuj poste li prenis pramŝipon reveturanta al Venecio por serĉi ŝin.

Reveninte al la hotelo, li demandis al la servistino ĉe la kontoro, “Ĉu mia edzino venis?”

Tiu respondis, “Ankoraŭ ne, sinjoro.” Johano trovis tion stranga. Ĉar li jam sin trovas ĉi tie, neeble ŝi ankoraŭ ne venis. Kien ŝi iris finfine?

Vidinte lin en perplekseco kaj maltrankvileco, la servistino diris, “Ĉu mi povus telefoni al la flughaveno por informiĝi ĉu la flugmaŝino ekflugis aŭ ne, sinjoro?” Johano jese ekbalancis la kapon.

Telefoninte, la servistino diris al li, “Sinjoro, la flugmaŝino ne prokrastiĝis. Kaj ĝi ĝustatempe ekflugis kun ĉiuj pasaĝeroj. Ĉio iris glate. Ĉu vi jam misvidus, ke la virino en la pramŝipo estas via edzino?”

Johano respondis, “Neeble, ŝi certe estis mia edzino.” Dirinte tion, li sin turnis kaj eliris serĉi tiun paron da ĝemelinoj. Eble ŝi estas ĉe ili.

Post serĉado dum kelkaj horoj Johano sentis sin malespera. Li iris al la policejo kaj raportis detale al policano, kio okazis dum ĉi tiuj kelkaj tagoj. Tiu diris al li, ke la policanoj plenforte helpas lin serĉi lian edzinon kaj la ĝemelinojn, sed pro manko de manoj en la policejo, ĉiuj policanoj persekutas la eskapantan mortiginton, kiu faris murdon lastatempe en Venecio.

Johano demandis, “Mortiginto? Kia mortiginto?”

“Ĉu vi vere ne scias tion?” La policano mirplene rigardis lin, “En la tuta Venecio ĉiuj pepas pri la afero kaj ĉiuj ĵurnaloj kaj radiostacioj faras raportadon pri tio! Lastsemajne la gorĝo de turistis estis tratanĉita. Hodiaŭ matene maljunulo estas trovita mortigita per ponardo.”

Johano tremante diris, “Ni geedzoj neniam legas ĵurnalojn dum feriado nek babilas kun aliaj homoj.” Ju pli li pensis, des pli li sentis sin timigita, kriante, “Tiu paro da ĝemelinoj certe estas maniulinoj de mortigo!”

Demono de hommortigo

Post ripetada persvado Johano reiris al la hotelo. Kiam, kuŝante sur la lito, li pensis absorbite, la servistino telefonvokis lin, informante, ke Laŭra donas telefonvokon!

Li tuj salte levigis kaj konektis la telefonvokon de Laŭra. Ŝi ĝoje diris, “Kara mia, la operacio al la filo iris glate, kaj ankaŭ mia veturado estis glata. La filo jam vekigis el anesteziĉeko. Ĉu vi jam atingis Milanon? Kie vi loĝas nun?”

Stuporiginte, li faciligite diris tion, kio okazis hodiaŭ. Aŭdinte tion, ŝi tre kolerigis. Li nur certigis ŝin fojfoje, ke li stiros aŭton hejmen jam frumatene morgaŭ.

Kiam li demetis la aŭdilon, policanoj eniris kaj diris al li, ke oni jam trovis la du ĝemelinojn. Kun granda hontemo li sekvis policanojn al la policejo kaj diris, ke li faris stultaĵon. Tiuj du ĝemelinoj montris perpleksecon kaj indignon, sed fine lin pardonis.

Por esprimi sian bedaŭron Johano sendis la du ĝemelinojn al ties loĝejo. La pliaĝa fratino diris al li, “Mi ne riproĉas vin. Eble la pramŝipo, kiun vi vidis, estis vera. Mia

fratino diris, ke ankaŭ vi estas mediumo, nur kun malgranda forto, kaj ŝi ankaŭ volis, ke vi geedzj forlasu Venecion.”

Li ekbalancis la kapon, “Mia edzino diris tion al mi. Sed kial mi vidis ŝin en la pramŝipo kune kun vi? Fakte tiam ŝi sin trovis en la flugmaŝino.”

Tiu pliaĝa fratino respondis, “Eble pro tio, ke via edzino sopiras al ni la tutan tempon. Antaŭe ni jam donis nian adreson al ŝi, por ke ŝi kontaktu nin, se necese.”

Ekbalancinte la kapon, Johano skribis al ili sian adreson kaj telefonnumeron kaj diris, “Se necese, vi povos kontaktos nin.” Li faris enspiron, “Estas tre malfrue. Mi devas foriri. Jam la dekdua horo nokte. Mi diru pardonon al vi pro tio, kio ĵus okazis.”

Neatendite la plijuna fratino subite firme kaptis lian manon sen lasi ĝin for, kaj intermite diris, “Vian filinon...mi vidas vian filinon...” Kaj poste ŝi spasme kolapsis en la sino de sia pliaĝa fratino. Tiu lasta rapideme diris, “Ŝi ree faras mediumadon. Foriru. Mi povas bone trakti ŝin.”

Post iom da hezitemo Johano sin turnis kaj foriris. Kiam li iris sur vojeto, li subite vidis la knabineton kun kapuĉo. Ŝi fluge kuris, ŝajne eskapante de la malantaŭa persekutanto.

Dum momento Johano ekmemoris pri la ŝrikkrio. Li tuj venis al la kompreno, ke la malantaŭa persekutanto certe estas maniulo de hommortigo kaj volas murdi la knabineton! Kun tia penso li ekkaptis ŝin kaj sin kaŝis inter arboj, dirante al ŝi, “Ne timu. Mi ne lasos al li ŝin vundi!”

La knabineo pene stariĝis antaŭ lin. La kapuĉo glitis el ŝia kapo. Gapante ŝin, li ne povis eligi voĉon pro streĉiteco. Ŝi tute ne estis knabineo, sed iom fortika pigmeo! Rigardante lin kun larĝa rideto, ŝi ekbalancis la kapon.

Aŭdiĝis paŝbruo ekster la arboj. Tiu laŭte kriis itale, “Eliru! Mi policano!” Kiam Johano volis krii helpon, la pigmeo, kun malvarma elspiro, elprenis ponardon kaj trapikis lian gorĝon.

En agonio li tuj komprenis, ke li vere estas mediumo. La pramŝipo, kiun li vidis sur la larĝa kanalo, kunportis Laŭra kaj la du ĝemelinojn, kio ne okazis hieraŭ, sed okazos morgaŭ. Ili venas por lia morto. Li fermis la okulojn. Lia lasta penso estis: Mi devus kredi la vortojn diritajn de tiuj du ĝemelinoj kaj forlasi Venecion hieraŭ. Ĉu ĉio estas decidita de la destinita sorto...

Lu Song adaptis ĝin al Esperanto

Anonima

Mendi frapon je pordo

Vintre de la pasinta jaro mi estis maldungita.

Por vivteni la familion mi devis provizore esti ĵurnalportisto.

Estis unu aboninto, kiu havis leterkeston ĉe la enirejo. Ĉar la aperturo de la kesto estis tute ŝtopita, do mi devis iri frapi je la pordo. Pasis longa tempo, malfermiĝis la pordo. Jen maljunulo irante ŝanceliĝema.

“Kial la fendo de la leterkesto estas ŝtopita, sinjoro?” mi faris demandon.

“Ĝin mi ŝtopis intence,” ĝene ridis la sinjoro. “Mi petas vin pri io, se vi faros tion volonte. Tio estas ke, kiam vi portos al mi ĵurnalon ĉiutage, vi frapu je la pordo aŭ tintigu la pordosonorileton. Do vi manigu al mi ĵurnalon.”

“Bone. Sed se tiel, por ni ambaŭ tio estos ĝena, kaj cetera, tio malŝparos tempon,” pri lia propono mi ne bone komprenis.

“Pardonon ke mi ĝenas vin... ĉiutage mi estas hejme, kaj mi pagos al vi 500 juanojn laŭmonate kiel kroman rekompencan por pordofrapo,” la maljunulo petegis. “Se iun tagon vi ne povos malfermi la pordon post frapado, vi do informu la policon pri tio.”

“Kial?” mi miregis.

“Mia edzino forpasis, mia filo restas eksterlande, nu, mi loĝas ĉi tie sola kaj senhelpa. Kiu scias en kiu tago mi mortos?”

Tiam mi vidis plenajn larmojn en la okuloj de la sinjoro.

“Vi abonas ĵurnalon ne por legi?” mi sciivolis.

“Mi neniam foliumas ĵurnalpaperojn... mi ja mendas la frapon sur pordo!” li pluis. “Jen, junulo, tio estas la telefona numero de mia filo en eksterlando, se iutage la pordo ne malfermiĝos kiam vi frapos, do telefonu al mia filo por sciigi...”



Rerakontis **Minosun** el minirakonto en WeChat

Bai Xiaoyi

Eksplodsono en la salono

Infuzinte teon, la mastro metis tetasojn sur tableton antaŭ gastoj, kaj tinte kovris la tasojn per kovriloj. Ekpensinte pri io, li starigis la termobotelon sur la tero kaj hasteme eniris la ĉambrom. Tuj aŭdiĝis sonoj de malfermado de ŝranka pordo kaj priserĉado en ŝranko.

La gastoj, patro kaj filino, atendis en la salono. La dek-jara filino spektis florojn, starante ĉe fenestro. Kiam la fingroj de la patro apenaŭ tuŝetis la maldikan tenilon de la taso, subite sonis eksplodado kaj sekvis malesperaj disrompiĝaj kraketoj.

Okazis, ke la termobotelo falis sur la teron. Surpriziĝinte, la knabino tuj turnis sian kapon. Kvankam la afero estis simpla, tio ŝajnis tre stranga, ĉar neniu el patro kaj filino vere tuŝis ĝin. Kiam la mastro ĝin metis tien, ĝi iome ŝanceliĝis, sed ĝi ne falis.

La krakego elirigis la mastron el la ĉambro. Kun skatolo da kuba sukero, li subkonscie ĵetis ekrigardon al la vaporleviĝanta tero, dirante senkulpige, “Ne gravas! Ne gravas!”

La patro volis eligi kelkajn vortojn, sed bridis la buŝon.

“Pardonon al mi,” li diris, “estas mi, kiu puŝis ĝin.”

“Ne gravas,” la mastro ripetis la pardoneman frazon.

Forlasinte la hejmon de la mastro, la filino demandis, “Ĉu vi vere ĝin tuŝis, paĉjo?”

“... mi estis plej proksima al ĝi,” diris la patro.

“Sed vi ne tuŝis ĝin! Tiam mi ĝuste pririgardis vian figuron sur la fenestra vitro. Vi neniom moviĝis.”

La patro ekridetis. “Do, kion mi faru, laŭ via opinio?”

“La termobotelo falis per si mem. La planko ne tute estas ebena. Kiam onklo Li starigis ĝin sur la planko, ĝi senĉese skuetiĝis kaj pro tio ĝi mem falis. Paĉjo, kial vi diris, ke vi...?”

“Ĉu tion onklo Li povus vidi...?”

“Vi povus diri al li la veron.”

“Neeble. Mia infano,” diris la patro, “se mi diras, ke mi tuŝis ĝin, tio aŭdiĝis nature. Kelkfoje, oni simple ne komprenis, kiel okazis la afero. Ju pli vi priskribas la aferon laŭ la fakto, des pli via klarigado ŝajnas malvera kaj des malpli oni kredas vin.” La filino silentis longe. “Ĉu vi devas fari tiamaniere?”

“Jes.”



elĉinigi *Semio* (Ĉinio)

Fratoj Grimm



aŭtoroj: Fratoj Grimm

valerianoj; ili aspektis tiel freŝaj kaj verdaj, ke ŝi fariĝis manĝavida kaj ekhavis tre grandan apetiton manĝi de la valerianoj. La apetito ĉiutage plifortiĝis, kaj ĉar ŝi sciis, ke ŝi ne povos ricevi iun el ili, ŝi ekaspektis tute deprimita, pala kaj mizera. Pro tio la viro ektimis kaj demandis: „Kio mankas al vi, kara edzino?“

„Aĥ“, ŝi respondis, „se mi ne ricevos valerianojn el la ĝardeno malantaŭ nia domo por manĝo, mi mortos.“

La edzo, kiu tiom amis ŝin, pensis: „Anstataŭ lasi morti mian edzinon, mi havigos al ŝi la valerianojn, egale, kiom ili kostos min.“

En la vespera krepusko li do grimpis trans la muron en la ĝardenon de la sorĉistino. Li elfosis rapide manplenojn da valerianoj kaj kunprenis ilin al sia edzino. Ŝi tuj faris salaton el ili kaj manĝis ĝin plena de avido. Sed la salato gustis tiom bone al ŝi, tiom bonege, ke ŝi ekavidis la valerianojn eĉ trifoje pli forte je la alia tago. Por ke ŝi havu pacon, la edzo ankoraŭfoje devis grimpi en la ĝardenon. Je la sekva vespera krepusko li do ankoraŭfoje iris al la muro, sed post kiam li grimpis trans ĝin, li ektimis terure, ĉar li ekvidis stari antaŭ si la sorĉistinon.

„Kiel vi povas kuraĝi grimpi en mian ĝardenon?“ ŝi demandis kun kolera rigardo, „kaj ŝteli kiel ŝtelisto miajn valerianojn? Tio malbonfartigu vin.“

„Aĥ“, li respondis, „estu indulga, mi decidis fari tion nur pro bezonego. Mia edzino ĉe la fenestro ekvidis la valerianojn en via ĝardeno, kaj ŝi sentis tiom grandan

Valerinjo

Estis iam geedzoj, kiuj jam delonge deziris vane infanon. Fine la edzino ekhavis la esperon, ke la kara Dio plenumos ŝian deziron. La geedzoj havis en sia malantaŭa domflanko etan fenestron, el kiu oni povis rigardi en pompan ĝardenon, kiu estis plena de la plej belaj floroj kaj herboj; sed ĝi estis ĉirkaŭata de alta muro, kaj neniu kuraĝis eniri, ĉar ĝi apartenis al sorĉistino kun granda potenco, kiun timis ĉiuj. Lutage la edzino staris ĉe tiu fenestro kaj rigardis en la ĝardenon. Jen ŝi ekvidis bedon prireskatan de la plej belaj

manĝavidon je ili, ke ŝi mortus, se ŝi ne povus manĝi de la valerianoj.“

Jen la sorĉistino mildiĝis kaj parolis al li: „Se la afero statas tiel, kiel vi diras, mi permesas al vi kunpreni tiom da valerianoj, kiom vi deziras, sed kondiĉon mi metas: Vi devos doni al mi la infanon, kiun naskos via edzino. Ĝi havos bonan vivon, mi zorgos pri ŝi kiel patrino.“

La viro plena de timo jesis tion, kaj kiam la edzino jam naskis la infanon, tuj aperis la sorĉistino, nomis la infanon Valerino kaj forprenis ŝin kun si.

Valerino fariĝis la plej bela infano sub la suno. Kiam ŝi estis dekdujara, fermis ŝin la sorĉistino en turon, kiu troviĝis en arbaro kaj havis nek ŝtuparon nek pardonon. Nur tute supre estis eta fenestro. Kiam la sorĉistino volis eniĝi, ŝi starigis sin malsupre kaj vokis:

*„Valerino, Valerino,
malsuprenigu vian hararon.“*

Valerino havis longan belegan hararon, kiu aspektis delikata kiel ŝpinita oro. Kiam ŝi do aŭdis la voĉon de la sorĉistino, ŝi senligis sian hararplektaĵon, volvis ĝin supre ĉirkaŭ fenestrohokon, kaj poste falis la hararo je dudek ulnoj al la tero kaj la sorĉistino grimpis je la hararplektaĵo supren.

Post kelkaj jaroj okazis, ke la filo de la reĝo rajdis tra la arbaro kaj preteriris la turon. Jen li aŭdis kantadon, kiu estis tiel karesema, ke li haltis kaj aŭskultis. Tio estis Valerino, kiu pasigis la tempon en sia soleco per tio, ke ŝi sonigis sian dolĉan voĉon. La reĝofilo volis grimpi supren kaj serĉis la turopordon, sed ĝi ne troveblis. Li rajdis hejmen, sed la kantado tiom tuŝis lian koron, ke li iris ĉiutage eksteren en la arbaron kaj aŭskultadis ŝin. Kiam li staris iam proksime malantaŭ arbo, li vidis, ke sorĉistino proksimiĝis, kaj li aŭskultis, kiel ŝi vokas supren:

*„Valerino, Valerino,
malsuprenigu vian hararon.“*

Valerino malsuprenigis la hararplektaĵon kaj la sorĉistino grimpis supren al ŝi.

La reĝofilo pensis: „Se tio estas la eskalo, sur kiu oni supreniĝos, ankaŭ mi foje provu bonŝanci.“

Kaj je la sekva tago, kiam malheliĝis, li iris al la turo kaj vokis:

*„Valerino, Valerino,
malsuprenigu vian hararon.“*

Baldaŭ la plektita hararo falis malsupren kaj la reĝofilo grimpis supren. Komence Valerino ektimis ture, ke envenis al ŝi viro tia, kian ŝi ankoraŭ neniam ekvidis. Sed la reĝofilo komencis paroli tute afable kaj rakontis, ke de ŝia kantado lia koro estis tiom tuŝita, ke tio lin ne lasis en paco kaj ke li sopiris vidi ŝin mem. Tial Valerino perdis sian timon, kaj kiam li demandis ŝin, ĉu ŝi akceptos lin kiel edzon, kaj kiam ŝi vidis, ke li estas bela kaj juna, ŝi pensis: „Li amos min pli ol la maljuna

sinjorino Gotel“, kaj ŝi diris, ke jes, kaj prenis lin ĉemane. Ŝi diris: „Mi iros volonte kun vi, sed mi ne scias, kiel mi malsupreniĝu. Se vi vizitados min, kunprenu ĉiufoje silkoŝnureton, el ili mi plektos eskalon, kaj kiam ĝi estos preta, mi grimpos malsupren kaj vi surĉevaligos min.“



Ili interkonsentiĝis, ke ĝis tiam li vizitu ŝin ĉiuvespere, ĉar antaŭe frekventadis ŝin la maljunulino. La sorĉistino rimarkis nenion de tio, ĝis iam Valerino komencis paroli al ŝi: „Diru, sinjorino Gotel, kiel tio povas esti, ke mi havas multe pli da peno tiri vin supren ol la junan reĝofilon, li tuj estis ĉe mi.“

„Aĥ, de Dio forlasita infano“, kriis la sorĉistino, „kion mi devas aŭdi de vi, mi pensis, ke mi disigis vin de la tuta mondo, kaj tamen vi trompis min!“

Kolere ŝi kaptis la belan hararon de Valerino, volvis ĝin kelkfoje ĉirkaŭ sian maldekstran manon, prenis dekstramane tondilon, kaj rapide inside ili estis fortranĉitaj kaj la belaj plektaĵoj kuŝis sur la planko. Kaj la sorĉistino estis tiel malkompatema, ke ŝi kondukis la kompatindan Valerinion en dezertan regionon, kie ŝi devis vivi plendinde kaj tre mizere. Sed je la sama tago, kiam la sorĉistino forpuŝis Valerinion, ŝi firmligis la detranĉitajn hararplektaĵojn supre je la fenestrohoko, kaj kiam la reĝofilo alvenis la turon kaj vokis:

„Valerino, Valerino,
malsuprenigu vian hararon.“

Ŝi malsuprenigis la hararon. La reĝofilo grimpis supren, sed tie li ne trovis sian amatan Valerinion, sed la sorĉistinon, kiu rigardis lin malice kaj venene.

„Aha“, ŝi kriis moke, „vi volas forkonduki la amatinon, sed la bela birdo ne plu sidas en la nesto, kaj ĝi ne kantas plu, la kato forportis ĝin kaj elgratos ankaŭ viajn okulojn. Por vi Valerino estas perdita, vi revidos ŝin neniam.“

La reĝofilo pro doloro konsterniĝis kaj malesperigante li saltis de la turo; la vivon li ja ne perdis, sed la dornoj, en kiujn li falis, trapikis liajn okulojn. Jen li vagadis blinde en la arbaro, kie li manĝis nenion krom radikojn kaj berojn kaj faris nenion krom lamenti kaj plori pri la perdo de sia plej kara amatino. Tiel li migradis kelkajn jarojn tien kaj tien en mizero, kaj fine li alvenis en la dezertan regionon, kie Valerino mizere vivis kun la ĝemeloj, kiujn ŝi naskis, estis geknaboj. Jen li aŭdis voĉon, kaj ĝi ŝajnis al li tre konata; tial li iris al ĝi, kaj kiam li proksimiĝis, ekkonis lin Valerino kaj brakumis lin kaj ploris. Du el ŝiaj larmoj tuŝis liajn okulojn, kaj tuj ili fariĝis

denove klarvidaj, kaj li povis denove rigardi per ili kiel antaŭe. Li kondukis ŝin en sian regnon, kie oni akceptis lin kun ĝojo, kaj ili vivis ankoraŭ dum longa tempo feliĉaj kaj kun plezuro.


Originalo: Rapunzel

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Rapunzel“

Tri viretoj en arbaro

Estis iam viro, kies edzino mortis, kaj edzino, kies edzo mortis, kaj la vidvo havis filinon kaj ankaŭ la vidvino havis filinon. La knabinoj konis sin reciproke kaj kune promenis kaj poste venis al la vidvino en la domon.

Jen ŝi parolis al la filino de la vidvo: „Aŭskultu, diru al via patro, ke mi deziras edzigi lin, tiukaze vi ĉiumatene lavos vin en lakto kaj trinkos vinon, sed mia filino lavados sin en akvo kaj trinkos akvon.“



La knabino iris hejmen kaj sciigis al sia patro, kion diris la vidvino.

La vidvo parolis: „Kion mi faru? La geedziĝo estas ĝojo, sed ankaŭ turmento.“

Fine, ĉar li ne povis decidis sin, li demetis siajn botojn kaj diris: „Prenu tiun boton, ĝi havas en la plandumo truon, iru kun la boto en la subtegmentan ĉambron, pendigu ĝin al la granda najlo kaj verŝu akvon en ĝin. Se ĝi retenos la akvon, tiukaze mi denove edziĝos, sed se ne, mi ne faros.“

La knabino faris, kiel estis dirite al ŝi; sed la akvo kuntiris la truon kaj la boto estis plena ĝis la rando. Ŝi informis sian patron, kio okazis. Jen li grimpis mem supren kaj kiam li vidis, ke efektive estas tiel, li iris al la vidvino kaj edzinigis ŝin. Kaj la nupto okazis.

Je la alia mateno, kiam ambaŭ knabinoj ellitiĝis, staris antaŭ la filino de la edzo lakto por lavado kaj vino por trinkado. Sed antaŭ la filino de la edzino staris akvo por lavado kaj akvo por trinkado. Je la dua mateno staris akvo por la lavado kaj akvo por trinkado antaŭ ambaŭ filinoj.

Kaj je la tria mateno staris akvo por lavado kaj akvo por trinkado antaŭ la filino de la edzo kaj lakto por lavado kaj vino por trinkado antaŭ la filino de la edzino. Kaj

tiel restis. La edzino fariĝis tute malamika al sia duonfilino kaj provis fari ĉiutage la vivon eĉ pli aĉa al ŝi. Ŝi estis ankaŭ envia, ĉar ŝia duonfilino estis bela kaj ĉarma, sed ŝia propra filino malbela kaj naŭza.

Iam en vintro, kiam la tero glaciĝis de la frostoj, ke ĝi fariĝis malmola kiel ŝtono kaj la montoj kaj valoj estis plene kovritaj de neĝo, faris la edzino robon el papero, vokis la knabinon kaj diris: „Jen, vestu vin per la robo, iru eksteren en la arbaron kaj alportu korbeton plenan de fragoj, mi havas apetiton je ili.

„Dio mia“, diris la knabino, „enventre ja ne kreskas fragoj. La tero firme frostiĝis kaj la neĝo kovras ĉion. Kaj kial mi iru en la paperrobo? Ekstere estas tiom fride, ke la spiro frostiĝas. Jen ja la vento blovus tra la robo kaj la dornoj ŝirus ĝin de mia korpo.“

„Ĉu vi volas kontraŭdiri ion al mi?“ diris la duonpatrino, „foriĝu kaj ne montru vin denove antaŭ ol vi havos la korbeton plenan de fragoj.“ Poste ŝi donis al ŝi ankoraŭ peceton de malmola pano kaj diris: „De tio vi povos manĝi dum la tago“, sed ŝi pensis: „Ekstere ŝi mortos de la frostoj kaj la malsato kaj ŝi neniam plu aperos antaŭ miaj okuloj.“

La knabino estis obeema, surmetis la paperrobon kaj eliris kun la korbeto. Tie estis nenio krom neĝo laŭvaste kaj laŭlarĝe, kaj videblis neniu verda tigo. Envenante la arbaron, ŝi vidis dometon, el ĝi rigardis tri malgrandaj arbaraj kavernaj viretoj. Ŝi salutis ilin kaj frapis modeste la pordon. Ili petis ŝin enveni, kaj la knabino paŝis en la loĝoĉambron kaj sidiĝis sur la benkon ĉe la forno. Tie ŝi volis varmigi sin kaj manĝi sian matenmanĝon. La kavernoviretoj diris: „Donu ankaŭ al ni iom de ĝi.“

„Volonte“, ŝi respondis kaj dividis la panon en du partojn kaj donis al ili duonon.

Ili demandis ŝin: „Kion vi celas fari en la vintrotempo en via minca robeto ĉi tie en la arbaro?“

„Ah“, ŝi respondis, „mi serĉu fragojn por plenigi korbeton per ili. Kaj mi ne rajtos reveni pli frue ol tiam, kiam mi kunprenos ĝin.“

Post kiam ŝi jam manĝis la panon, ili donis al ŝi balailon kaj diris: „Forbalau ĉe la malantaŭa pordo la neĝon“.

Sed kiam ŝi estis ekstere, interparolis la tri viretoj: „Kion ni donacu al ŝi, ĉar ŝi estas tiel obeema kaj bonkora, kaj eĉ dispartigis sian panon kun ni?“

Jen diris la unua: „Mi donacos al ŝi, ke ŝi fariĝos ĉiutage pli bela.“

La dua diris: „Mi donacos al ŝi, ke falos ormoneroj el ŝia buŝo, tiom ofte, kiom ĝi diros ion.“

La tria diris: „Mi donacos al ŝi, ke venos reĝo kaj edzinigos ŝin.“

La knabino faris tion, kion diris la arbaraj kavernaj viretoj, ŝi forbalais la neĝon malantaŭ la dometo, kaj kion vi do pensas, ŝi trovis tie? Multajn maturajn fragojn, kiuj aperis profunde ruĝaj el la neĝo. Jen ŝi kunkolektis ĝoje la fragojn en la korbeton

kaj dankis al la viretoj, permane adiaŭis ĉiun el ili kaj kuris hejmen kaj volis porti la postulitan korbom al la duonpatrino. Kiam ŝi enpaŝis kaj diris: „Bonan vesperon!“ falis tuj ormonero el ŝia buŝo. Poste ŝi rakontis, kion ŝi travivis en la arbaro, sed post ĉiu vorto, kiun ŝi parolis, falis ormonero el ŝia buŝo, tiel, ke baldaŭ la tuta loĝoĉambro estis kovrita de ili.

„Jen, oni observu la petoladon“, vokis la duonfratino, „kiel ŝi forĵetas la monon.“

Sed sekrete ŝi estis envia pri tio kaj ankaŭ volis iri en la arbaron kaj serĉi fragojn. La patrino diris: „Ne, kara filino mia, estas tro malvarme, vi povus frostmorti.“

Sed ĉar ŝi ne lasis la patrinon en paco, ŝi fine cedis la postulon, kudris pompan felmantelon, kiun la filino devis surmeti, kaj donis al ŝi por la vojo buterpanajn tranĉaĵojn kaj kukon.

La knabino iris en la arbaron kaj rekte al la dometo. La tri kavernaj viretoj rerigardis, sed ŝi ne salutis ilin, kaj sen ĉirkaŭrigardi ŝi stumblete paŝis en la loĝoĉambron, sidiĝis al la forno kaj komencis manĝi siajn buterpanajn tranĉaĵojn kaj sian kukon.

„Donu iom de ĝi al ni“, vokis la nanoj.

Sed ŝi respondis: „Ĝi eĉ ne sufiĉas por mi mem, kiel mi do de tio ankoraŭ fordonu ion al aliaj?“

Post kiam ŝi satmanĝis, ili diris: „Jen balailo por vi, purbalau antaŭ la dompordo.“

„He, balau mem“, ŝi respondis, „mi ne estas via servistino.“

Kiam ŝi vidis, ke ili ne volis donaci ion al ŝi, si eliris tra la pordo. Jen interparolis la tri viretoj: „Kion ni donacu al ŝi, ĉar ŝi estas tiel malobeema kaj havas malican envian koron, kiu volas cedi al neniu plezuron?“

La unua diris: „Mi donacas al ŝi, ke ŝi fariĝu ĉiutage pli malbela.“

La dua diris: „Mi donacas al ŝi, ke post ĉiu vorto, kiun ŝi diros, saltos bufo el ŝia buŝo.“

La tria diris: „Mi donacos al ŝi, ke ŝi mortu malfeliĉe.“

La knabino ekstere serĉis fragojn, sed kiam ŝi ne trovis iujn, ŝi iris ĉagrenite hejmen. Kaj kiam ŝi malfermis la buŝon kaj intencis rakonti al sia patrino, kio okazis en la arbaro, saltis post ĉiu vorto bufo el ŝia buŝo, tiel, ke ĉiuj ekaŭzis sin pro ŝi.

Tial ĉagreniĝis la duonpatrino eĉ multe pli kaj pensis nur, kiel ŝi povos tre suferigi la filinon de la edzo, kies beleco ĉiutage fariĝis pli granda. Fine ŝi prenis kaldronon, metis ĝin sur la fajron kaj boletis kudrofadenojn en ĝi. Kiam ili estis boletitaj, ŝi pendigis la fadenojn surŝultren de la kompatinda knabino, donis al ŝi hakilon, kun kiu ŝi iru al la frostita rivero kaj haku truon en la glacieron kaj trempu la lanfadenojn en ĝin.

Ŝi estis obeema, iris tien, hakis truon en la glacieron, kaj kiam ŝi estis meze de la hakado, alveturis pompa kaleŝo, en kiu sidis la reĝo. La kaleŝo haltis kaj la reĝo demandis: „Infano mia, kiu vi estas, kaj kion vi faras tie?“

„Mi estas malriĉa infano kaj trempas lanfadfenojn en la glacian truon.“

Jen la reĝo kompatis ŝin, kaj kiam li vidis kiel bela ŝi estas, li diris: „Ĉu vi volas veturi kun mi?“

„Ho jes, elkore volonte“, ŝi respondis, ĉar ŝi ĝojis, ke ŝi malaperos el la okuloj de la patrino kaj de la fratino.

Tial ŝi enkaleŝiĝis kaj forveturis kun la reĝo. Kaj kiam ili alvenis en lian kastelon, oni festis la nupton kun granda pompo, tiel kiel donacis tion unu el la viretoj al la knabino. En la sekva jaro la juna reĝino naskis filon, kaj kiam la duonpatrino aŭdis pri tiu granda feliĉo, ŝi venis kun sia filino en la kastelon kaj ŝajnigis, ke ŝi volas viziti ilin. Sed kiam la reĝo foje eliris kaj ĉeestis neniun, ekkaptis la malica duonpatrino la reĝinon je la kapo kaj ŝia filino ekkaptis ŝiajn piedojn, ili levis ŝin el la lito kaj ĵetis ŝin el la fenestro en la preterfluantan riveron. Poste kuŝigis sin la malbela filino en la liton kaj la maljunulino tute kovris ŝin. Kiam la reĝo revenis kaj volis interparoli kun sia edzino, vokis la maljunulino: „Kvietu, kvietu, nun tio ne eblas. Ŝi kuŝas kaj forte ŝvitas, hodiaŭ vi devos permesi ripozon al ŝi.“

La reĝo ne pensis, ke io ne estas en ordo, kaj nur je la alia mateno li revenis. Kaj kiam li interparolis kun sia edzino kaj ŝi respondis al li, elsaltis post ĉiu vorto bufo el ŝia buŝo, dum alitempe elfalis ormoneroj. Jen li respondis: „Kio estas tio?“

Sed la maljunulino diris, ke tion kaŭzis la forta ŝvito, kaj ke tio certe perdiĝos.

Sed en la nokto vidis la kuireja bubo, kiel anaso alnaĝas sur la strateta defluejo. Ĝi parolis:

*„Reĝo, kion faras vi,
dormas aŭ maldormas vi?“*

Kaj kiam li ne respondis, ĝi diris:

„Kion faras gastoj miaj?“

Jen respondis la kuireja bubo:

„Ili dormas kvazaŭ diaj.“

Ĝi daŭrigis demandi:

„Kion faras ido mia?“

Jen respondis la bubo:

„Dormi en lulilo sia.“

Jen ŝi iris kun la ekstera aspekto de la reĝino supren, donis al la bebo trinkaĵon, skuadis ĝian litkovrilon, kovris ĝin kaj fornaĝis kiel anaso tra la strateta defluejo. Tiel ŝi revenis du noktojn, en la tria ŝi diris al la kuireja knabo: „Iru, kaj diru al la reĝo, ke li ekkaptu sian glavon kaj sur la sojlo svingu ĝin trifoje super mi.“

Jen forkuris la kuireja bubo kaj diris tion al la reĝo. Tiu venis kun sia glavo kaj

svingis ĝin trifoje sur la sojlo super la fantomo, kaj je la tria fojo staris lia edzino antaŭ li, freŝa, vivanta kaj sana, tiel, kiel ŝi estis antaŭe.

Nun la reĝo tre ĝojis, sed li kaŝis la reĝinon en ĉambreto, ĝis la dimanĉo, kiam oni baptos la infanon. Kaj kiam ĝi estis baptita, li diris: „Kion meritas homo, kiu levas alian el la lito kaj ĵetas tiun en akvon?“

„Ne pli bonan“, respondis la maljunulino, „ol ke oni metu la maliculon en barelon, en kiun estas batitaj najloj, kaj ke oni ruligu la barelon de la monto en la akvon.“

Jen diris la reĝo: „Vi parolis vian verdikton.“

Li ordonis alporti tian barelon kaj oni metis la maljunulinon kun ŝia filino en ĝin. Poste oni najlis la kovrilon sur ĝin kaj ruligis la barelon de la monto malsupren, ĝis kiam ĝi ruliĝis en la riveron.

Originalo: Die drei Männlein im Walde

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Die drei Männlein im Walde“



*tradukis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser
lingve kontrolis Vladimir Türk*

Lu Jinchong

Intrigo en la aero

Bill havis amikon Vihelmo, kiu mortis pro akcidento. Estis lamentinde, ke tiu tago estis la naskiĝtago de Masa, edzino de Vihelmo. Por festi tiun tagon Vihelmo, Bill kaj Masa iris ludi paraŝutadon. En flugmaŝino Vihelmo tre ekscitiĝis kiel infano, ke li senĉese filmis per kamerao. Ĝuste tiu ekscitiĝo mortigis lin, ĉar antaŭ ol salti malsupren el la flugmaŝino, li forgesis kontroli la paraŝutan tornistron kaj prenis kameraan sakon por la paraŝuta kaj li dorsportis la kameraan sakon saltis malsupren...



Ekde kiam Vihelmo mortis, Masa dronis en memproĉo kaj pento. Ŝi ofte diris al Bill, ke estus bone, se ŝi rimarkigis al sia edzo kontroli la paraŝutan tornistron. Pro tio Bill faris nenion alian ol konsoli ŝin laŭeble. Kun tempopaso Masa prenis lin kiel sian nuran subtenilon. Du jarojn post la morto de Vihelmo Masa edziniĝis al Bill. Poste la feliĉa geedziĝo igis, ke Masa malrapide eliris el la funebra mallumo. Sur ŝia vizaĝo reviviĝis la kutima rideto.

Tiun tagon post vespermanĝo Bill, kiel kutime, legis ĵurnalon, kuŝante en lulseĝo. Subite aŭdiĝis akuta krio de Masa en dormoĉambro. Konsternite, Bill tuj forĵetis

jurnalon kaj enkuris la dormoĉambron. Li vidis Masa sidi senmove sur la planko kun pala vizaĝo, tenante leteron en la mano. Bill prenis la leteron kaj ĝin legis. Sur la letero skribiĝis sangruĝaj vortoj “Mia kara, mi atendas vin en la infero!” La signaturo de la letero estis la nomo de Vihlema, kiu jam mortis antaŭlonge.

Bill tuj konsolis ŝin, “Tio certe estas friponaĵo fare de iu. Li enŝovis la leteron tra la fendeto de la fenestro.”

“Ne!” ŝi diris per tremanta voĉo, “ĝi estas la manskribo de Vihelmo. Mi rekonas ĝin. Li venas preni mian vivon. Li riproĉas, ke mi ne atentigis al li kontroli la paraŝutan sakon kaj mortigis lin!”

Vidante, ke la mensstato de Masa malrapide malboniĝas, Bill ĉirkaŭprenis ŝin kaj kuŝigis ŝin sur la liton. Li manĝigis al ŝi trankviligajn pilolojn, tiel ke ŝi iom kvietiĝis. Kaj fine ŝi malrapide endormiĝis en lia sino.

Ekde tiu tago la spirita stato fariĝis pli kaj pli malbona. Ŝi ofte deliris, ke ŝi vidas la fantomon de Vihelmo aperi ekster la fenestro aŭ ke la fantomo de Vihelmo sekvas ŝin... Bill alvokis policanojn kelkfoje, sed ili povis trovi nenion post enketado.

Iun nokton, kiam Bill revenis hejmen el laborejo, li trovis, ke en la domo regas peĉnigra mallumo. Enirinte la pordon, li estis timigita. En la salono sub vespera krepusko Masa rigide staris, kiel statuo, ĉe la telefonilo, tenante aŭdilon en la mano.

Kiam Bill demandis al ŝi, kun kiu ŝi parolas telefone. Turninte sian kapon, ŝi diris en paniko, “Estas Vihelmo, kiu min telefonvokis el la infero.”

Bill kaptis la aŭdilon kaj premis ĝin al la orelo, sed li nur aŭdis zumadon de telefona okupiteco. Li demetis la aŭdilon kaj milde diris al ŝi, “Mia kara, Vihelmo jam mortis plurajn jarojn. La mortinto neniam povas reviviĝi. La premo sur via spirito estas tre peza. Nun prenu trankviligajn pilolojn kaj poste ripozu iom. Morgaŭ mi iros kune kun vi...”

Masa krie interrompis lian parolon, “ Mi ne estas freneza. Mi vere telefone interparolis kun Vihelmo. Lia animo troviĝas ĉi tie kaj li volas kunporti min al la infero! Se mi nur vivas, lia animo ĉiam alkroĉiĝas al mi!” Dirinte tion, ŝi freneze enkuris la kabineton kaj ŝlisis ĝin de interne. Por preventi ŝian ekstreman agon li sukcesis perforte malfermi la pordon per bastonego. Enirinte, li vidis, ke ŝi skribas ion en konfuzitezo. Li sin ĵetis al ŝi kaj kaptis la skribaĵon, kiu estis eĉ ŝia testamento.

“Kion vi faras diable?” Kolere riproĉante ŝin, Bill ĉifis la paperon kaj ĵetis ĝin en paperkorbon. Kiel infano, kiu faris mison, Masa sin ĵetis en lian sinon kaj ekploregis. Firme brakumante ŝin, li softe konsolis ŝin, “Ne timu. Ĉe mi vi povas ricevi ĉiaman protekton.”

Kun varmaj larmoj en la okuloj ŝi diris, “Dankon al Dio. Feliĉe vi akompanas min.”

La saman nokton Masa petis, ke li prenu ŝian manon la tutan tempon, por ke ŝi povu endormiĝi. Post ŝia endormiĝo li kaŝe eliris el la dormoĉambro kaj ŝlosis la pordon. Tuj poste li iris al la telefonilo kaj konektiĝis kun alvokito. El la alia fino de la telefonado alvenis la voĉo de “Vihelmo”, “Hola, kiu parolas?”

“Bill parolas. Informu viajn subulojn, ke ili jam povas fini la laboron.”

“Bonege! Ho, sinjoro Bill, pri la honorario difinita antaŭe...”

“Trankviliĝu. Mi pagos ĝin tute sen ajna malplio al via konto,” dirinte, li demetis la aŭdilon. Poste li eniris knabinecon kaj elprenis el la paperkorbo la testamenton ĵus skribitan de Masa. Li zorgeme glatigis ĝin, montrante radion da insida rideto ĉe la lipangulo.

Jes, ĉio ĉi tio estis planita de Bill. La letero veninta de Vihelmo, la telefonvoko el la infero kaj la fantoma ombro de Vihelmo, kiun ŝi vidis dum ĉi tiuj tagoj, estis fabrikitaj de homoj, kiujn Bill dungis per mono. La piloloj, kiujn Bill manĝigis al Masa ĉiufoje, ne estis trankviligaj, sed nervodetruaj, kaŭzis maltrankvilecon kaj panikon. Bill faris tion pro tio, ke li jam avidis je la riĉaĵoj de Vihelmo. Li decidis mortigi Vihelmon unue. En la tago de paraŝutado Li intence donacis al Vihelmo la sakon de kamerao similan al la paraŝuta sako kaj sur la flugmaŝino li metis ĝin sur la lokon de paraŝuta sako. Vihelmo estis malzorgema novico de paraŝutado, kaj plie Bill senĉese interparolis kun li por deturni lian atenton, tiel ke li prenis la kameraon sakon por paraŝuta sako kaj saltis malsupren. Post la morto de Vihelmo Bill elpensis mil rimedojn por edzinigi Masan. Kaj poste se li nur premos ŝin al frenezeco aŭ morto, la riĉaĵoj de Vihelmo venos al Bill. Nun li havas la testamenton de Masa en la mano kaj ĉio estos facile solvita.

En postaj tagoj la spirita stato de Masa fariĝis tre malstabila, precipe kiam alproksimiĝis la mortodatreveno de Vihelmo ŝi des pli maltrankviliĝis.

Tiun nokton Bill vekigis de plorsonoj de Masa. Vidante, ke Bill vekigas, Masa forviŝis larmojn, dirante, “Mi vidis Vihelmon en koŝmaro. Pardonon, mia kara, mi timas, ke mi neniam eliros el tiutaga malluma ombro.”

Bill ŝajnis sin ĉagrena kaj post kelktempa meditado, li diris, “Mi havas ideon. En la morttago de Vihelmo ni iru ludi paraŝutadon.”

“Paraŝutadon?”

Ekbalancinte la kapon, Bill klarigis, “Ĉu oni ne diras, ke la plej bona metodo forigi timon estas kuraĝe alfronti timon? Ni refoje ludos paraŝutadon ne nur por eliri el la malluma ombro de la pasinteco, sed ankaŭ por memorfesti Vihelmon.”

Fine Masa konsentis sub lia persvado.

Dum la mortodatreveno de Vihelmo, Bill kaj Masa veturis per flugmaŝino super la loko, kie akcidento okazis al Vihelmo tiujare. Ŝi ankoraŭ havis posttimon, dum li traktis ŝin tre zorgeme, senĉese konsolante ŝin, “Mia kara, kvankam estas la

mortodatreveno de Vihelmo hodiaŭ, ĝi tamen ankaŭ estas via naskiĝtago. Ĉifoje paraŝutado estas mia plej bona donaco al via naskiĝtago. Mi esperas, ke vi forgesu ĉiujn suferojn.”

Masa emociite diris, “Ho, Bill, fermu viajn okulojn. Mi volas reciproki donacon al vi.”

Bill fermis siajn okulojn, kaj post momento ŝiaj ruĝaj lipoj alpremiĝis al la liaj. Poste ili dorsportis la paraŝutan sakon kaj saltis malsupren manon en mano. Dum la libera falado Bill abrupte forpuŝis ŝin, nereteneble eksplodante per ridoj.

Lia plano sukcesis! Okazis, ke kvankam iliaj tornistroj estis samaj, unu el ili tamen ne povis funkcii bone. Por ne miksi ilin, Bill gluis apenaŭ rimarkeblan etiketon sur la bonan tornistron. Antaŭ paraŝutado, se li nur dorsportos la bonan, la alia por ŝi estos difektita. Ĝis kiam ŝi mortos, la polico trovos ŝian testamenton en ŝia ĉambro kaj ili konstatos, ke tio estas nur la elekto de virino, kiu volas sin mortigi ĉe la mortodatreveno de sia eksedzo. Nur sufiĉos por Bill ludi la rolon de edzo en granda malĝojo.

Sed li neniel atendis, ke ŝi glate malfermis la paraŝutan tornistron! Tio treege surprizis lin. Ĉar ŝia tornistro estas malfermebla, tio kompreneble signifas... Tempo ne permesis al li cerbumi kial. Li haste provis malfermi la tornistro, sed ĝi rifuzis funkcii malgraŭ liaj pluraj provoj. Tiomomente li tute panikiĝis. Li vere dorsportis la tornistron kun etikedo, kial? Li ekkriis laŭvoĉe, ploris kaj fine plonĝis rekte al la tero, kiel senkapa muŝo. Eĉ ĝis la morto li neniel imagis, ke Masa jam travidis lian artifikon. Dum la momento kiam li fermis siajn okulojn kaj kisis en ŝia brakumo, ŝi kaŝe gluis la edikedon sur la alian tornistron.

La plano de Bill ja estis perfekta kaj preskaŭ premis ŝin al frenezeco. Tamen antaŭ nelonge la kamerao, kiun Vihelmo kunportis dum kraŝakcidento, estis trovita de policanoj. Kvankam ĝi jam difektiĝis, ĝia memorkarteto bone konserviĝis, en kiu troviĝis la video, dum li falis el la aero. En la lasta momento de la vivo li ne malesperiĝis nek ploris. Li tamen registris siajn lastajn vortojn, en kiuj li ne riproĉis Masan, sed konsolis ŝin, kun espero, ke ŝi ne afliktiĝu kaj devu vivi plu feliĉe kaj firmvole. La registraĵo ne nur donis al ŝi kuraĝon, sed ankaŭ igis ŝin naski dubon pri la tuta afero: Vihelmo montris grandan zorgon pri ŝi dum la morta momento, kial li povus turniĝi en fantomon por preni ŝian vivon? Surbaze de tiu dubo ŝi engaĝis privatan detektivon por enketi pri la okazaĵo kaj la plano de Bill malkaŝiĝis klare.

Pensante, ke Vihelmo ankoraŭ protektis ŝin tiamaniere dum sia fatalo, ŝi nereteneble disverŝis pluvon da larmoj...

elĉinigi Serpo (Ĉinio)

Tong Shumei

La vera kaŭzo de morto

Lin Haibo estis 20-jara junulo. Lastatempe li faris decidon doni lecionon al Kapego Hu.

Tiu estis la plej malbona ulo pli-ol-tridek-jara en la vilaĝo. Pro tio, ke la viraj plenkreskuloj en la vilaĝo estas preskaŭ tute dungitaj en la urbo kaj li estas fortika kaj necedema, li tiranadis virojn kaj virinojn, farante ĉion malbonan.

Lastatempe li direktis atenton al Roza, la fianĉino de Lin Haibo kaj eĉ agis maldece al ŝi. Lin Haibo pensis, ke se li lasos lin agi plu tiemaniere, okazos certe mava rezulto.

Tamen Lin estis febla kaj malfortika. Se li staros kontraŭ Hu, li certe ne povos subigi lin. Post ripetada cerbumado li decidis fari ion kaŝitan al la ligna ponteto, ĉar Hu loĝis en la okcidenta ekstremo de la vilaĝo kaj devis certe transpasi la ponteton, kiam li revenis de la vilaĝo al sia hejmo.

Tiun vesperon Kapego Hu, prenante kilogramon da viando en la mano, eniris la hejmon de Roza. Vidante ŝian belan aspekton, li, tre fascinita, lascive diris, “Franjo, vi estas vere bela. Ĉi-vespere mi manĝos ĉi tie...”

La gepatroj de Roza laboris kiel dungitoj en la urbo kaj nur Roza kaj ŝia maljuna avino restis hejme. Vidinte Hu eniri, ili timtremis pro konsterniĝo. Ili povis fari nenion alian kontraŭ li ol preni viandon por prilabori ĝin en la kuirejo, nur kun espero, ke li foriru pli frue post vespermanĝo.

Iom post iom malheliĝis. Hu voris viandon kaj drinkis alkoholaĵon avideme. Li devigis Rozan akompani lin en drinkado, sed ŝi rifuzis per preteksto, ke ŝi sentas sin nekomforta, kaj nur sidis apud li kun trudita rideto.

Hu ne sciis, ke Lin Haibo kaŝe sekvas lin la tutan tempon kaj prenas ĉion okazantan en la okuloj. Vidinte la scenon, Lin jam tremis pro kolero. Li ne riskis sin ĵeti en la domon, sed turnis sin al la direkto al sia hejmo. Li prenis mallongan segilon kaj kaŝis ĝin sub la vesto, kaj poste iris sub la ponteton. Tiam estis frua vintro kaj ĝisosta frosto regis. Ĉie troviĝis neniuj homoj. Sub la ponteto li segrompis unu tabulon kunpremante la dentojn en la frosto. Li mezuris la longecon de paŝoj. Se Hu surtretos la ponteton, li certe surpaŝos ĉi tiun segrompitan tabulon kaj falos en la rivereton mallarĝan, sed profundan. Li, ebria, certe multe suferos en la malvarma akvo. Segrompinte la tabulon, Lin Haibo kaŝis sin en la arbareton najbaran al la ponteto por eviti, ke aliaj homoj senscie surpaŝos la ponteton, kaj ke se Hu falos en la akvon, li ne havos forton pro ebrieco por surgrimpi la bordon, tiel ke li povos donos al li helpan manon. Lin volis doni nur lecionon al Hu, sed ne mortigi lin.

La tempo de atendado sin trenis tre longe. Lin havis konfuzitan menson: Ĉu Hu suriros la rompitan tabulon, kiel mi deziras? Kial li ankoraŭ ne aliros? Ĉu li tiranis Rozan? Ĉu mi devus iri savi Rozan anstataŭ atendi stulte ĉi tie? Ĝuste tiam Lin subite aŭdis paŝbruon kaj vidis, ke Hu stumble aliras. Ŝajnis, ke li drinkis tre multe, ĉar li paŝis ŝancele sur la vojo. Kiam li atingis la ponteton, Lin urĝis en la koro, ke Hu rapide suriru la ponteton!

Hu suriris la ponteton, unu paŝon, du paŝojn kaj bum! li subite stumble falis sur la ponteton senmove. La tabulo abrupte rompiĝis, kaj antaŭ ol eligi ekkrion, li plaŭde falis en la riveron.

Kun brue batanta koro Lin impetis el la arbareto al la bordo kaj trovis, ke Hu malaperis senspure. Ne eble! Kvankam Hu drinkis ebrie, li tamen lertas en naĝado, kaj se li falis en la akvon, li devus barakti kelkfoje. Lin stuporiĝis kelkajn sekundojn kaj tuj poste sin turnis foriri, alie iuj povus lin vidi.

Matene de la sekva tago ekcirkulis sensacia novaĵo, ke Kapego Hu mortis droninte en la rivero. Policanoj alvenis kaj forportis lian kadavron.

Sciiginte pri la novaĵo, Lin sentis sin kovrita de malvarma ŝvito tra la tuta korpo. Ĉu li mem vere mortigis lin? Se tiel, li devas pagi per sia propra vivo. Se la polico trovos tion, li estos finita...

Tiam Roza alvenis. La morto de Hu devus ĝojigi ŝin, sed ŝia vizaĝo paliĝis kaj ŝiaj manoj senĉese tremadis.

Dum momento ili restis senparolaj vidalvide. Lin Haibo havis multe por paroli al Roza, sed ne sciis, de kie li komencis. Li timis, ke Roza miskomprenos lin, se ŝi scios la veron. Kiam li pretis diri al ŝi la veron, ŝi, bizarmiene kun subtilaj ŝviteroj sur la vizaĝo, la unua parolis, "Haibo, mi venas diri aferon al vi. Post kiam vi sciiĝos pri ĝi, ne forlasos disde mi... Estas mi, kiu mortigis Kapegon Hu!" Ŝia parolo surprize stuporigis lin. Ŝi aldonis, "Kiel vi scias, Kapego Hu ĉiam kovas malbonan intencon al mi. Antaŭe li nur ĵetis al mi obscenajn vortojn, sed nun li eĉ agis maldece al mi, tuŝante min per manoj. Se la afero disvolviĝos tiele, mi ne havos alian vojon ol morti. Tial mi preferas mortigi lin antaŭ mia morto. Hieraŭ nokte mi mortigis lin."

Li balbute demandis, "Vi mortigis lin? Kiamaniere vi mortigis lin?"

Ŝi respondis malice, "Mi jam frue preparis dormigajn pilolojn kaj serĉis ŝancon veneni lin. Hieraŭ vespere, kiam li venis al nia hejmo drinki, mi metis tiujn pilolojn en la alkoholaĵon post lia dorso. Laŭ mia kalkulo tiuj piloloj ne povis veneni lin ĝis morto. Mi nur volis, ke tiuj piloloj efikos kaj li dormiĝos sur la vojo, tiel ke li pro tio dormos sur la strato en frostoj kaj malsaniĝos. Mi ne atendis, ke li falis en la riveron kaj dronis. Haibo, nun mi estas murdinto, ĉu vi povas turni vian dorson al mi?"

Nemirinde, ke Hu falis en la akvon kaj malaperis senspure. Estis tiuj piloloj, kiuj efikis, tiel ke li sinkis ĝis la fundo de la rivero. Oni ne sciis, kiel la streĉita humoro de Lin subite faciligis. Li diris, “Roza, vi malpravas. Fakte mi estas la murdinto.” Roza ŝtoniĝis. Li aldonis, “Vi metis dormigajn pilolojn, sed ili ne povis mortigi lin, ĉar la dozo ne estis sufiĉe granda. Mi ja estas vera murdinto. Mi segrompis la pontan tabulon, alie li ne povis fali en la riveron kaj dronis. Roza, nun vi scias, ke mi estas murdinto!”

Ŝi stulte gapis al li, dirante, “Ni havas la saman ideon. Sed, Haibo, mi estas vera murdinto. Eĉ sen via faro, se mi ne metus pilolojn en alkoholaĵon, li ne dronus. Ne disputu pri tio, Haibo.”

Li kriis, “Mi estras vera murdinto. Mi ne volas, ke vi estu propeka kapro. Roza, ni jam decidis tion. Se policanoj venos, do lasu min porti la krimon de murdo. Vi devas bone vivi plu. Se vi tenos min en la koro, mi mortos sen ajna pento.”

La duopo ekdisputis, jen plorante jen ridante... Post kelka tempo, forviŝinte larmojn de sur la vizaĝo, ŝi firme diris, “Haibo, mi havas efektivan decidon. Ni iru kune al la policejo por nin denunci. Mi ne volas, ke vi surŝultrigu la tutan respondecon, alie mi havos dornon en la koro por ĉiam. Ni havos longan tempon por vivi. Se nur ni amas unu la alian, ni havigos al ni prosperajn tagojn. Antaŭ ol li volis diri ion, Roza tiris lin, dirante, “Ne parolu plu. Mi volontas enprizoniĝi kune kun la homo, kiun mi arde amas. Nun ni iru kune nin denunci!”

La duopo iris al la policejo. Post kiam policano aŭskultis al ilia rakontado, li signifoplene diris, “Ĉu ankoraŭ okazis tia afero? Fakte kiam ni nekropsiis la kadavron, ni jam trovis la restaĵon de dormigaj piloloj en la stomako de la mortinto, kaj kiam ni esploris la lokon de murdo, ni ankaŭ trovis la spuron de segrompado al la punta tabulo. Sed...” Paŭzante momenton, la policano ree pridemandis, “Kion alian vi kaŝas de ni?”

Roza kaj Lin reciprokis la rigardon kaj ili skuis la kapon. Vidinte tion la policano diris, “Dum nekropsiado ni trovis multe da ratveneno en lia stomako. Tio estas la vera kialo de lia morto! Ĉu vi certas, ke vi ne uzis ratvenenon al la mortinto?”

Aŭdinte tion, la duopo ege surpriziĝis kaj nee skuis la kapon. Lin diris, “Ĉar ni jam nin denunciis, ni certe ne kaŝas ion ajn.”

La policano ekbalancis la kapon kaj diris al sia helpanto, “Unue metu ilin ambaŭ en karceron. Tiu ĉi kazo estas tre interesa!”

Post kelkaj tagoj la polico tra enketado fine trovis la veron de la afero.

Okazis, ke tiutage Kapego Hu iris al la hejmo, drinkinte ĉe Roza. Ĉar la dozo de dormigaj piloloj ne estis granda, la medicino ankoraŭ ne efikis dum la momento. Irante, li sentis sin soifa. Vidinte, ke lampo lumas en apudvoja butiko, li iris tien por botelo da akvo. En la butiko troviĝis neniuj kaj la butikposedanto iris al la necesejo.

Vidinte duonbotelon da akvo kaj du vaporumitajn panojn sidantajn sur la seĝo, Hu, tiranema kiel kutime, senpripense prenis la duonbotelon da akvon kaj glugle eltrinkis ĝin. Tamen li ne sciis, ke en la akvo troviĝas letala ratveneno. Ĉar multaj aĵoj estis roditaj de ratoj, la butikposedanto metis multe da ratveneno en la akvon kaj pretis trempi la panojn en la venenan akvon por venenmortigi ratojn. Neatendite li iris al la necesejo pro laksado. Dum tiu momento Hu hazarde eltrinkis la akvon. La sekvan tagon, aŭdinte, ke Hu mortis, la butikposedanto divenis, ke li certe trinkis la venenan akvon. Sed li ne kuraĝis malkaŝi la aferon. Li ne atendis, ke policanoj alvenas al la butikoj por enketado.

La enketo rivelis, ke antaŭ ol Hu falis de la ponto, ratveneno jam efikis sufiĉe por senigi al li la vivon. Post trinkado de la venena akvo, li iris stumble la tutan vojon. Kiam li suriris la ponteton, la veneno tute efikis kaj li mortis. Li hazarde falis sur la segrompitan ponttabulon kaj falis en la riveron.

La polico asertis, ke la butikposedanto venenis Hu, sed lia faro ne estis intenca, kaj ke kvankam Roza kaj Lin Haibo havis la motivon kaj agon mistifiki lin, sed tio ne estis la rekta kaŭzo mortigi lin. Kompreneble neeviteblis por tiuj tri personoj surŝultrigi konvenan leĝan respondecon.

elĉinigis Zang Jun (Ĉinio)



esperantigita de Paula Adúríz (Hispanio)

Chiung Yao (1938-)



aŭtorino, Chiung Yao

revenis lastnokte. Antaŭ tio ŝi jam endormiĝis pro lacego. Tamen kiam ŝi fosis en sia memoro pri la lastnokta okazaĵo, ŝi ankoraŭ dronis plene en amara ekscito kaj ŝi ankoraŭ memoris, kiel ŝi kruele forlasis lin sola sur la ruino. Malsaniĝi? Ĉu malsaniĝi fizike aŭ mense? Ŝi ne sciis. Kiom malfacile estis por ŝi esprimi sian zorgemon siaflanke el sia nuna identeco!

“Kia malsano?” ŝi demandis al Tingting.

“Mi ne scias. Maljuna You jam veturis al Taibei por venigi kuraciston Liu. Tiu estas la kuracisto de mia patro, ankaŭ de mi dum ĉi tiuj jaroj.

“Ĉu vi jam vidis lin? Ŝi nereteneble demandis, ne povante bridi siajn malkvieton, ĉagrenon kaj suferplenon zorgemon.

“Kiun? Ĉu kuraciston Liu?”

“Ne, vian patron.”

“Jes. Mi ĵus vidis lin. Li petis al mi eliri. Mi pensas, ke li febras, ĉar li turniĝadas surlite.”

“Oho,” Fang fiksas sian rigardon tra la fenestro al la ĉielo, kie flosis kelkaj blankaj nuboj. Kiel fragilaj estaĵoj estas la homoj! Kiu povus elteni ambaŭ fizikan kaj mensan turmentojn? Kial? Kial vi volas serĉadi unu spiriton sur la ruino? Kion vi jam eltrovis? Tio estas nenio alia ol turmento al vi mem. Ŝi alpremis sian manon al siaj lipoj—Zhang Hanyan en lia songo! Kaj nun, ĉu li ankoraŭ kredas, ke tio estas la spirito de Hanyan, kiun li kisis lastnokte? Ŝi divenis, ke li estas tute certa pri tio. Ah, kiel interimplikita amsento!

“Kio okazas al vi, instruistino Fang?”

Tingting rompis ŝian enpenŝigon. Jes, ŝi devas elturniĝi el la sento, kiu ŝin obsedas. Ŝi devas! Tiaĵo estas timiga, suferiga kaj ĉagreniga! Ho, Fang Siying, Fang Siying, vi estas firma ino, via koro trankvilas kiel kvieta akvo, vi jam estas hardita

En profunda korto (9)

Frumatene Tingting diris al Fang, ke Bai malsaniĝas. Tuj fulmis tra la koro de Fang forta dubemo kaj malkvieto. Malsaniĝi? Ŝi ne sciis, je kioma horo li

nevundebla kaj firma kiel monto, sed, kio pri vi? Ŝanceliĝi? Ho, ne! Ŝin kaptis frostremo, kaj ŝi tuje rektigis sian spinon.

“Ho, rapidu, Tingting, alie ni malfruos al la lernejo.”

“Ĉu ni povas ne iri al la lernejo?” demandis Tingting, maltrankvile rigardante al la ĉambro-pordo de sia patro.

“Ni telefonos al Yazhu tagmeze, ĉu bone?” admonis Fang, “Mi supozas, ke via patro nur malvarmumis. Ne gravas.”

Ili iris al la lernejo. Tamen la tutan tagon Fang aspektis distriĝeme. Ŝi eĉ faris erarojn en korektado de ekzercoj kaj leciondonado, kaj emis fali en profundan enpensemon. Ne atendinte ĝis tagmezo, ŝi jam telefonis al Domo Bai kaj diris al Yazhu, “Tingting volas sciigi pri la stato de la malsano de sia patro.”

“Kuracisto Liu diris, ke li malvarmumis kaj krome li trafis surprizan timigon. Nun li havas altan febron. Kuracisto Liu preskribis medikamentojn, kiujn mi jam aĉetis. Li havas malbonan humoron kaj malpermesas al iu ajn eniri lian ĉambro!”

“Ho,” ŝi eksentis kunpremiĝon de la koro. “Ĉu ne necesas enhospitaliĝi?”

“La kuracisto diris, ke ne necesas, des pli, ke la sinjoro ne volas enhospitaliĝi.”

“Ho, do, mi ne havas alian aferon por diri.”

Demetinte la aŭdilon ŝi ekhavis pli malordajn sentojn. Lastnokte! Lastnokte mi ne devus iri al la ruino! Mi des pli ne devus teni min silenta, tiel ke li prenis min por la spirito. Tiu amplena kaj soifa kiso kaj tiuj vortoj el la animo! Kaj ĝislaŭkiĝaj vokoĵoj: “Hanyan, revenu! Hanyan, revenu! Hanyan, revenu!”

Aĥ! Kiajn aferojn mi faras do? La situacio fariĝos pli kaj pli komplika. Ŝi jam avertis al si mem, ke ŝi ne devu eniri ĉi tiun familion. Sed nun, ĉu ŝi povus ekhavi tempon por elturniĝi? Ĉu ŝi ankoraŭ povus elturniĝi? Ĉu ŝi volontus elturniĝi? Se ŝi ne plu elturniĝus, kio okazus al ŝi? Aĥ! Tiuj ĝenaj pensoj, kiel malordaj grimpantaĵoj sur la ruino de Bieno Hanyan, jam nedisapartigeble interplektiĝis. Post posttagmezaj lecionoj, Fang kunportis Tingting-on reveni al Domo Bai. Ekster ŝia atendo, Ailin eĉ troviĝis en la salono. Kun cigaredo brulanta, ŝi staris ĉe fenestro, fiksante sian rigardon tra la fenestro al la montoj en malproksimeco. Fang unuafoje trovis ŝin fumi. Tiu, sen densa ŝminko, aspektis iom lace kaj marasme, kaj la helverda koloro ĉe okulkavoj perfidis ŝian maldormecon. Kun iom malordaj mallongaj haroj, ŝi surhavis ordinaran kaj blu-satenan noktorobon. Je la vido de Ailin, Tingting sin montris ekstremanta kaj retirigema, kaj ŝi afekte salutis, “Panjo!”

Turninte sian kapon, Ailin ĵetis al ŝi flegman rigardon. Kvankam tiu rigardo entenis nenian varmon, tamen estis ĝojinde, ke ĝi ne direktiĝis malamike. Evidente ŝi kovis multajn aferojn sur la koro, kaj ŝi eĉ kontraŭkutime balancis sian kapon al ili. Ŝi ordonis, “Tingting, iru vidi vian paĉjon kaj demandi kion li volas manĝi.”

Konsternite dum kelka tempo, Fang subite sentis, ke ŝi bezonas fari alian takson

pri Ailin. Ĉu tiu marasmiĝas pro la malsano de Bai? Ĉu tiu vere estas kruela kaj senkompata kiel ŝi konsideras? Aŭ—ĉiu ajn malfeliĉa geedziĝo estas kaŭzita de pluraj kaŭzoj—ĉu estas juste se ĉiuj respondecoj atributiĝas al Ailin?

Suprenirinte, Tingting unue frapis je la pordo de sia patro. Pro nenia respondo, ŝi malpeze puŝmalfermis ĝin. Starante ĉe la pordo, Fang enrigardis la malhelan ĉambron kun fermitaj fenestroj, hermetike kovritaj per ruĝaj veluraj kurtenoj. Bai kuŝis sur granda lito, kun okuloj fermitaj, kvazaŭ en dormo. Fang volis tiri Tingtingon eksteren, kiam Bai subite demandis, “Kiu tio estas?”

“Mi,” Fang tuj respondis. “Mi kaj Tingting. Ni volas vidi, ĉu vi fartas pli bone.”

Regis silento sur la lito. Kaj poste, Bai ordonis, “Eniru!”

Fang kaj Tingting eniri. Tingting alrapidis al la litrando kaj prenis la manon de la patro. Ŝi tuj panike kriis, “Paĉjo, kiel febre varma vi estas!” Li eligis suspiron. Li sin montris malforta, soleca kaj senhelpa. Vidinte la paksakon de medikamento kaj kruĉon, Fang prenis la papersakon, sur kiu skribiĝis “unu pilolo en ĉiu kvara horo”, kaj malferminte ĝin, ŝi vidis, ke la dozo estas por du tagoj kaj ankoraŭ restas dek unu piloloj. Ŝi surprizite demandis, “Ĉu vi ne prenis medikamenton regule?”

“Preni medikamenton?” Bai kuntiris brovojn, kun senkonsila mieno. “Mi pensas, ke mi jam forgesis.”

Fang volis diri ion, sed ŝi retenis sin. Kun glaso da akvo, ŝi iris al la litrando kaj diris, kun altrudita rideto, “Mi pensas, ke mi devas ludi la rolon de flegistino portempe. Sinjoro Bai, bonvole prenu pilolojn.”

Tingting helpis al sia patro sidiĝi, kaj Fang enmanigis la pilolojn al li kaj almetis la glason al liaj lipoj. Li tuj prenis ĝin, kaj kvazaŭ banante sin en la favora pluvo, je eklevo de kapo, trinkis la akvon ĝis la lasta guto. Poste li falkusigis sin al la kapkuseno, anhelante. Grandaj ŝviteroj rulfalis de sur lia frunto kaj nenormalaj ruĝaĵoj kaŭzigitaj pro febro sin montris sur liaj vangoj. Ŝajne kun ioma distriĝemo, li delire murmuris, “Mi tre soifas, ho ve, mi malsatas kaj soifas jam dek jarojn.”

Fang denove eksentis tordan doloron en la koro. Ŝi rigardis al Bai, kies mieno estis distordita de freneza konfuziteco, kaj kies blindaj pupiloj senmove kaj stulte gapis, kun iom da senhelpa tristo kaj malespera timemo. Ŝi surpriziĝis. Ŝia koro kunpremiĝis kaj sendis doloron al ĉiu ŝia nervo. Lia malsano estis multe pli serioza ol ŝi anticipis. Ŝi iom fumis de indigno, kiu direktiĝis al aliaj familianoj. Ĉu neniu el ili flegas lin ĉe litrando? Li ne kapablas vidi kaj samtempe grave malsaniĝas, sed estas neniu, kiuj povas alporti al li akvon! Povas esti, ke li ankoraŭ ne manĝis la tutan tagon.

“Tingting,” ŝi haste ordonis, “malsupreniru kaj diru al Yazhu, ke ŝi preparu kaĉon kaj iom da sekigitaj viandpecetoj. Kiel ajn malsana, li devas preni manĝon, ĉu ne? Kiel li povus resaniĝi sen manĝado?”

Ĉe tio, Tingting tuj malsuprenkuris. Starante en la ĉambro, Fang ĉirkaŭrigardis. Trovinte, ke la aero en la ĉambro estas malbona, ŝi iris al la fenestro kaj ĝin malfermis, lasante la kurtenon pendanta por eviti alblovojn al la paciento. Pro malbona lumiĝo, ŝi ŝaltis la lampon. Pensante, ke la lampoj en la ĉambro servas al la blindulo nur kiel ornamaĵoj, ŝi tuj eksentis erupcion de kompatemo. Reirinte antaŭ la liton, ŝi subkonscie ordigis la littolaĵojn, kaj subite ŝia mano estis kaptita de varmega mano.

“Ho, sinjoro Bai,” ŝi mallaŭte ekkriis surprizite. “Kion vi volas fari?”

“Ne foriru,” li petis anhele.

“Mi ne volas foriri!” ŝi diris kontraŭvole, provante eligi sian manon el la lia.

“Ne, ne, ne foriru,” li murmuris, prenante ŝian manon pli firme. “Hanyan, ĉu vi estas Hanyan?” Ho, ne, ne, li ripetas tion denove! Neniel mi akceptas tion, absolute ne! Ŝi plenforte eltiris sian manon. Ŝi aŭdis sian voĉon soni glacie kaj seke, “Vi eraras, sinjoro Bai. Mi estas Fang Siying, la guvernistino de via filino. Mi ne scias, kiu estas Hanyan, mi neniam scias.”

“Fang—Si—ying?” li diris la nomon per treniĝema voĉo, ŝajne penante priserĉi ion en la fundo de sia memoro. Lia mensostato ankoraŭ estis en malordo. “Kio estas Fang Siying?” li diris, perplekse kaj konfuzite. “Mi ne povas rememori. Iom konata. Fang Siying? Ho, ho, ne zorgu pri tiu Fang Siying. Hanyan, vi alvenas, ĉu ne?” Etendante sian manon, li soife palpis en la malplena aero.

Fang desaltis de la litrando. Ŝia koro doloris, forte doloris, kaj ŝia vido malklariĝis. Bai abrupte sidiĝis en la lito, kaj lia mano svinganta en la aero faligis la glason sur la littableto, tiel ke akvo el la glaso disverŝiĝis sur la tapiŝon. Fang hasteme alrapidis por starigi ĝin. Forte spiregante, Bai baraktis en sia halucino. Pro tio, ke li ne povis alpalpi la manon, kiun li deziris kapti, li abrupte eligis korŝiran frenezan ekkriion, “Hanyan!” Lia krio sonis tiel laŭte, ke Fang eksaltis el sia haŭto. Tuj poste, levinte sian kapon, ŝi vidis Ailin-on stari ĉe la pordo, kies vizaĝo similis al frostiĝinta glacio. La okuloj de tiu lasta sombre fiksiĝis sur lia vizaĝo, tiel penetraj kiel du akraj glavoj. Se li havus vidkapablon kaj senson, certe li estus pikvundita aŭ pikdolorigita. Sed nun li jam perdis sian konscion kaj falis en komaton pro ardanta febro, baraktante subkonscie. Lia kapo senĉese skuiĝis sur la kapkuseno kaj lia ŝvito malsekigis la kovrilon de la kapkuseno. Li konstante elmurmuris la vokojn kaŝitajn en la profunda fundo de la koro, “Hanyan, Hanyan, mi petas al vi, bonvolu... mi petas al vi... laŭ beno de Dio! Savu min... Hanyan! Aĥ, kion mi faris al vi, Hanyan? Aĥ, kion maldecan mi jam faris?...”

Ailin eniris, kun rektigita spino kaj rigida bela kolo, tiel lante kiel moviĝanta marmora statuo. Haltinte ĉe lia lito, ŝi klinis sian kapon por pririgardi. Nun ŝia glacia rigardo ekbruliĝis pro ia hato kaj indigno. Ĉe ŝia buŝangulo altrudiĝis preskaŭ kruela

rikano. Levinte la kapon, vid-al-vide al Fang, ŝi klare diris per pli malpli rapida kaj pli malpli alta voĉo, “Jen estas tiel. Hanyan! Hanyan! Hanyan! Ĉu dumtage aŭ nokte, ĉu sobre aŭ senkonscie, li vokis senescepte tiun nomon. Se via malamiko estas homo, vi povas batali kontraŭ li, sed se tio estas spirito, kion vi povus fari kontraŭ ĝi?”

Fang staris en stuporo. Dum ĉi tiu tempeto, ŝi ekhavis multe pli profundan komprenon pri Ailin ol tiun obtenitan dum du monatoj ekde kiam ŝi ekloĝis ĉi tie. Rigardante Ailin-on, ŝi neniam eksentis kompaton al ŝi kiel en nuna tempeto. Amo ja estas fragila kaj delikata floro, kiu ne povas elteni trosekecon dum jaroj! Malsekiginte siajn lipojn per la langpinto, Fang mallaŭte kaj kontraŭvole diris, “Sinjorino Bai, li troviĝas en febro!”

“En febro?” Ailin iom levis siajn brovojn. “Por tiu spirito, li jam dronas en febro dek jarojn!” Ŝajne por atesti tiujn vortojn de Ailin, li forte skuis sian kapon sur la kapkuseno kaj ŝvingis siajn manojn antaŭ si, kvazaŭ elbaraktante el ia kateno, senĉese bruante, “For, for, ne ĝenu min. Ŝi alvenas, Hanyan! Ŝi alvenas! Aĥ, ne ĝenu min, ne kovru mian rigardon, mi jam vidas ŝin. Hanyan! Hanyan! Hanyan! Aĥ, abomeninda nebulo, tro densa, ĝi kovras mian vidon, ĝi kovras mian vidon, ĝi kovras mian...” Li anhelis kiel tuj mortonta besto. Liaj manoj senĉese kaptadis, gratadis kaj ŝvingadis en la aero. “Aĥ, ne kovru mian vidon, for, for! Ne kovru mian vidon! Aĥ, Hanyan! Hanyan! Bovole, mi petas al vi, ne foriru, Hanyan!...”

Iritite, Ailin deturnis la kapon. El ŝiaj okuloj ŝajne ŝprucis fajro. Firme kunpremite manojn en pugnoj, kun alte levita kapo, ŝi sputis el inter la dentoj, “Vi mortu, Bai Peiwen! Nun ke vi amas ŝin, vi devus iri kun ŝi subteren jam frue! Vi mortu! Post via morto, vi povus eltrovi ŝian spiriton! Vi mortu!”

Fininte sian parolon, ŝi tuj deturnis sian korpon kaj grandpaŝe eliris el la ĉambro. Laŭtigante sian voĉon, ŝi kriis, “Maljuna You, preparu aŭton. Mi volas veturi al Taizhong! Yazhu, supreniru por paki miajn aĵojn!”

Fang subkonscie kure sekvis ŝin ĝis la ĉambra pordo, volante voke haltigi Ailin-on kaj restigi ŝin, al kiu ŝi havis multe da vortoj por elverŝi... Tamen ŝi faris nenion kaj diris nenion. Kiam ŝi returnis sin al lia flanko, rigardante lian ŝajne flamantan vizaĝon kaj aŭskultante liajn deliradon kaj vokojn, ŝi sentis sin nur tre malforta, timema kaj senhelpa.

Kiam Tingting revenis el sube, ŝin panikigis la aspekto de ŝia patro. Per maneto ŝi nerveze kaptis Fang-on, kaj tremante demandis, “In...struistino, ĉu paĉjo... estas... mortonta?”

“Ne babilaĉu!” Fang tuj respondis. “Li havas febron kaj iom malklaran konscion. Ĝis kiam la febro foriĝos, li resaniĝos.” Alportinte kuvon da malvarma akvo el la banĉambro, Fang vringis malvarman lavtukon kaj ĝin kovris sur lian frunton. Apenaŭ la lavtuko varmiĝis, ŝi anstataŭis ĝin per alia malvarma. Tiuj malvarmaj

lavtukoj ŝajne iom komfortigis lin. Liaj deliroj reduktiĝis kaj li ne plu svingis siajn manojn. Post horo, li eĉ eniris en duondormecon. Tamen lia dormo ne estis tiel stabila. De tempo al tempo li surprizite moviĝis aŭ kriante vekigiĝis. Ĉiufoje li sin trovis en malklara konscio, kaj poste endormiĝis kun malklara kapo.

Ailin foriris kun malgranda vojaĝsako. Fang sciis, ke ŝi revenos almenaŭ post tri tagoj. Ŝi ne sciis, kiel la geservistoj konsideras pri tio, ke Ailin forlasis lin en serioza malsano kaj vojaĝas al Taizhong ĉi-momente. Bonkora Yazhu ŝtele skuis sian kapon. Kaj maljuna You? Kun senesprima vizaĝo, li sin montris deteniĝema, silentema kaj nesondebla.

Post vespermanĝo, Fang kaj Tingting reiris al la supra etaĝo. Fang provis manĝigi al Bai iom da kaĉo, sed li neniel sobriĝis kun persista febreco, tiel ke ŝi petis al Yazhu forporti la kaĉon. Ĝis ĉirkaŭ la naŭa, ŝi insiste petadis Tingting-on al la lito por dormi, kaj tiu fakte jam ne povis elteni sian elĉerpitecon.

Post kiam la infano endormiĝis, Ailin foriris kaj geservistoj retiriĝis je dorma tempo, en la tuta domo regis kvieto kaj silento. Fang ankoraŭ restis ĉe Bai kaj ŝanĝis la lavtukojn sur lia frunto. Ŝi volvis per lavtuko la glacipecojn el varmbotelo kaj metis ĝin sur lian febrantan frunton. Pro tio, ke glacipecoj rapide degelis, ŝi devis, de tempo al tempo, forviŝis la defluantan akvon per alia seka lavtuko por eviti malsekiĝon de littolaĵo kaj kapkuseno. Kun alta febro li sin montris malkvieta. Li senĉese deliris, ĝemis kaj baraktis, kaj kelkfoje li subite konsciigis sobra, demandante per laca, senforta kaj raŭka voĉo, “Kiu estas ĉi tie?”

“Tio estas mi, Fang Siying,” respondante, ŝi kapti la ŝancon igi lin preni pilolojn. Tamen kiam li troviĝis en komato, ŝi ne sciis, kiel fari lin preni pilolojn.

Vesupirinte, li deturnis sian kapon flanken kaj mallaŭte diris, “Vi jam faris sufiĉe da penoj, ĉu?”

Ŝi ne donis respondon. Lia sobreco daŭris nur momenteton. Post tio, li tuj falis en deliradon kaj inkubsonĝon. Foje li eĉ surprizite laŭte ekkriis, “Ne foriru! Ne foriru! Akvo ŝveligas, montoj disfalas, pontoj rompiĝas! Ne foriru, Hanyan!” Li kriis tiom triste kaj mizere, kaj liaj manoj nerveze gratis kaj pugniĝis en la aero, tiel ke ŝi nevole kaptis ilin per siaj propraj manoj. Li tuj premis ŝin al si, tre firme. Lia voĉo muĝis rapideme, interrompe kaj konfuzite, “Ne foriru! Ne foriru, ĉu? Hanyan? Vi ne foriru, vi estas bonkora...bonvirta...kompatema... Tiu akvo ne dronigos vin nek forkaptos vin. Vi estas mia... vi estas mia...vi estas mia...” Per febranta mano li palpis ŝiajn vizaĝon kaj harojn. Ŝi deprenis siajn okulvitrojn kaj metis ilin sur la littableton. Refoje ŝi kontentigis lin pasive kaj kontraŭvole. Ŝi lasis lin palpi ŝin kaj kapti ŝin en sia tenaĵo, aŭskultante al liaj subpremita, delira, flamanta kaj mallaŭta monologo. “Mi amas vin, Hanyan. Ne foriru, ne foriru. Vi povas laŭplaĉe bati min, insulti min kaj koleriĝi kontraŭ mi, sed ne foriru de mi. Ekstere pluvas. Vi ne povas eliri, alie vi

malvarmumiĝos... Ne eliru, ne foriru! Hanyan... la plej amata de mi, mia koro, mia vivo. Vi estas ĉi tie, vi estas ĉi tie, parolu iom. Hanyan, ne, ne, ne parolu... parolu nenion. Vi estas ĉi tie, do tio estas bona..." Li kaptis ŝin tiom firme, kvazaŭ timante, ke ŝi forfuĝus je malstreĉiĝo de lia mano. Lia tenado dolorigis ŝin. Sidante sur la tapiŝo ĉe la lito, ŝi cedis al lia firma prenado al ŝia mano. Ŝia kapo ripozis sur lia lito sub lia palpado. Ŝi ne volis moviĝi nek veki lin el la bela sonĝo. Tamen ŝiaj larmoj el la okulanguloj sensone fale glitadis sur la kotonan litkovrilon. Ŝi plorsingultis kun dampita voĉo, dum ŝia koro gutadis per sango. Post momento, ŝi sentis, ke lia kaptado iom malfirmiĝis kaj lia delirado fariĝis nedeĉifrebla murmurado. Ŝi malrapide levis sian kapon kaj vidis, ke li jam endormiĝis kun okuloj fermitaj. Ŝi prenis la gutantan lavtukon de sur lia frunto kaj ektuŝis lian fronton. Dankon al la ĉielo! Lia febro jam seniĝis. Ŝi eltiris la malsekigitan kapkusenon, sed ŝi ne trovis dummomente la sekan por anstataŭi ĝin, kaj ŝi devis alporti sian propran kapkusenon el sia ĉambro. Ŝi helpis al lia kapo kuŝi sur la sekan kapkusenon kaj forviŝis akverojn kaj ŝviterojn sur lia frunto per lavtuko. Post kiam ĉio estis en ordo, ŝi sentis sin tre laca kaj senforta. Ŝi ne kuraĝis tuj foriri, timante, ke io neatendita okazos al li. Altirante longan seĝon, ŝi sidiĝis ĉe la lito, dirante al si, "Mi ripozu nur momenton." Kiam ŝi kuŝis en la seĝo kun fermitaj okuloj, laceco tuj sieĝis ŝin de ĉiuj flankoj. Ŝi eligis mallaŭtan vesuspiron, kaj preskaŭ samtempe falis en profundan dormon. Kiam ŝi vekigis, sunlumo jam riveligis sur la tuta fenestrokurteno. Surprizite ŝi eksaltis kaj tiam trovis lankovrilon sur si. Kiu ŝin kovris per ĝi? Ĵetinte sian rigardon al la lito, ŝi vidis, ke Bai kuŝas tie, sobra kaj pura. Aŭdinte ŝian moviĝon, li tuj salutis, "Bonan matenon, fraŭlino Fang."

Kioma horo estas nun? Ŝi ekrigardis la brakhorloĝon. Kvin minutojn post la deka! Kio okazis al ŝi? Ŝi jam maltrafis la matenajn lecionojn. Ŝi nereteneble kriis, "Terure! Mi malfruas."

"Mi jam petis al Tingting akiri unutagan forpermeson por vi," li diris. Kvankam li aspektis laca kaj marasma, li jam resaniĝis nemal multe.

"Ho," ŝi eksentis hontemon kaj malkvietecon. Preninte siajn okulvitrojn sur la littableto, ŝi nevole diris, "Mi ĝojas vidi, ke vi resaniĝis. Via malsano venas rapide kaj ankaŭ foriras rapide. Kion vi volas manĝi?"

"Mi jam manĝis kaĉon." Li diris, "Vi preparigis ĝin por mi hieraŭ."

Ŝi iom ruĝiĝis. Ŝia malkvieteco pliigis. Ĉu mi mem dormis tiom profunde! Do, eĉ Tingting kaj Yazhu vidis min dormi ĉi tie! Ŝi turnis sin kaj pretis eliri eksteren de la ĉambro, dirante, "Memorigu vin pri prenado de piloloj. Nun estas tempo por tio denove. La piloloj troviĝas ĝuste sur la littableto ĉe via flanko."

Se vi estas helpema, transdonu ilin al mi," li diris.

Hezitante iom, ŝi aliris, verŝis gladon da akvo kaj prenis unu pilolon. Kiam ŝi donis

ilin al li, li sidigis sin fortostreĉe per siaj manoj. Vere post forta febro, li sentis sin kapturna. Ŝi nereteneble donis al li helpon per mano. Post kiam li prenis la pilolon, vidinte lin rekuŝiĝi sur la kapkusenon, ŝi volis foriri, kiam li vokis, “Fraŭlino Fang!” Ŝi haltis, gapante al li.



“Mi esperas, ke mi ne kaŭzis tre grandan ĝenaĵon al vi lastnokte, precipe, ke mi ne montris mian maldecan konduton al vi.”

Dum momento, ŝi rigidiĝis. “Ho, neniom, sinjoro.”

“Do, antaŭ ol vi eliros el la ĉambro,” li aldonis, kun ekstreme milda voĉo, “akceptu miajn dankemon kaj pardonpeton. Mi dankas al vi pro ĉio ĉi tio. Se mi faris mison, bonvole pardonu min laŭeble.”

“Ho,” ŝi estis iom surprizita kaj konfuzita. “Mi jam diris, ke tute neniom. Nu, ĝis la revido, sinjoro.”

Ŝi hasteme eliris el la ĉambro, urĝe kaj rapide. Rekte enirinte sian propran ĉambron, ŝi ankoraŭ neniel komprenis, kial li havas tiajn specialajn eksciton kaj ĝojon sur sia vizaĝo kaj en sia voĉo. (*daŭtigota*)

elĉinigiis Veĵdo

Lin Qingxuan (1953-2019)



Granda aŭ malgranda

Amiko parolis pri la onklino de sia parenco, kiu neniam portis laŭmezurajn ŝuojn en sia tuta vivo. Ŝi ofte iris tien kaj tien surhavante

aŭtoro, Lin Qingxuan

grandegajn ŝuojn.

Se la gefiloj kaj genepoj demandis ŝin pri tio, ŝi diris: “Se grandaj kaj malgrandaj ŝuoj havas la saman prezon, kial ni ne aĉetu la grandajn?”

Ĉiufoje kiam mi rerakontas la historion, iuj homoj preskaŭ sufokiĝas de ridego.

Fakte en la vivo ni povas vidi multajn tiajn onklojn: verkistoj, kiuj ne havas riĉajn ideojn, insistas verki pezajn kaj amarajn verkojn; pentristoj, kiuj ne havas tiom da materialoj, pentras superbajn pentraĵojn; politikistoj kaj komercistoj, kiuj malofte restas hejme, posedas grandegajn domojn.

Multaj homoj senĉese ĉasas grandecon, sed fakte ili estas pelataj nur de interna avido, kvazaŭ ili aĉetus ekstreme grandajn ŝuojn ignorante la mezuron de siaj piedoj.

Kelkfoje malfacilas diri klare, ke malgrandeco havas sian mirindecon. Ekzemple la naciaj trezoroj, kiaj ebura pilketo, jada brasiko kaj viandpec-simila ŝtono de la Imperiestra Palaco, ĉiuj estas pli malgrandaj ol ni povas imagi.

Kompreneble, estas egale, kiajn ŝuojn ni aĉetas, se ili bone sidas al niaj piedoj, tio tre gravas. Kion ajn ni ĉasas, ni ne devas fari tion troe.

Akvo kaj grundo de hejmloko

Unufoje kiam mi iris eksterlanden, mia patrino helpis min pretigi valizon. Proksime al la fino de la pretigado ŝi subite elprenis malgrandan travideblan botelon kun nigraĵo.

“Metu ĝin en vian valizon. Ĝi benos vin per paca vojaĝo,” Panjo diris.

“Kio mistera ĝi estas?” mi demandis.

“La boteleto entenas akvon kaj grundon, kiujn mi prenis en la korto de nia domo.

Ĉu vi ne aŭdis, ke se vi iras al nova loko, vi eble malsaniĝas, ĉar vi ne kutimiĝas al ĝia klimato. Kunportu la boteleton. Kien vi iros, tie estos via hejmloko. Vi do ne plu malsaniĝos.”

Panjo diris ankaŭ, ke tio estas la tradicio por Minnan-anoj. Kiam niaj prapatroj venis al Tajvano de Tangshan, ili ĉiuj kunportis akvon kaj grundon de la hejmloko. Ili metis iom da ili en la poŝon, oferis iom en la praula templo kaj disŝutis iom en la kampojn. Tiel niaj antaŭuloj faris la sovaĝan teron tiom fekunda, pro la beno de la akvo kaj grundo de la hejmloko.

Poste vojaĝante mi ĉiam kunportas boteleton da akvo kaj grundo de la hejmloko. Kelkfoje en hotelo mi elprenis la boteleton kaj ĝin pririgardis. Mi povis senti ke la griznigra akvo kaj grundo estas tre bela kaj plena je forto.

La akvo kaj grundo de hejmloko nutras nin kaj faras nin fortaj kaj respondecaj viroj. Eĉ se ni vojaĝus tre foren de nia hejmlando, dum solecaj noktoj en fremda loko, ni ekhavis pleniĝon de milda temperamento kaj ambicia forto.

La boteleto da akvo kaj grundo entenas ne nur amon de la hejmloko, sed ankaŭ benon de la patrino. La beno restas longdaŭra kaj ĉiam min protektas.

Kelkaj sonĝoj de juneco

Kiam ni estis junaj, ni ĉiuj havis multajn dezirojn. La artikolo *Mia Deziro*, kiun ni skribis en la klaso, ne estis vera, sed uzita por trompe kontentigi la instruistojn. Alie, ne tiel multaj homoj volus esti instruistoj, flegistinoj aŭ sociaj laboristoj.

Iu amiko ĵus fariĝis instruisto kaj instruas la ĉinan lingvon en la dua grado. La temo, kiun ŝi donis al siaj lernantoj por ese-skribado, ĝuste estas *Mia Deziro*. Iu knabo skribis en sia kajero, ke lia deziro estas fariĝi hundo. Ŝi preskaŭ svenis de kolero, lamentante, ke la infanoj de ĉi tiu generacio estas tro malprogresemaĵ.

Se ŝi estus leginta la majstroverkon *La Vivo de Hundo* de Peter Mayle, ŝi eble ne plu malestimus la deziron de la knabo. La aŭtoro rigardas la homan mondon el la vido de sia amata hundo Boy, kaj prezentas multajn signifoplenajn kaj filozofiecajn pensojn.

Mi jam ne memoras la dezirojn, kiujn mi faris. Unu jaron mi renkontiĝis kun miaj malnovaj samklasanoj. Iuj el ili jam edziniĝis, aliaj daŭre studis, kaj triaj klopodadis tien kaj ĉi tien por laboro. Ŝajnas, ke iliaj junaj deziroj ne estas tiaj.

Iuj tre ŝatas danci kaj deziras esti dancistoj. Kaj aliaj aspiras esti sportistoj.

Kelkaj sonĝoj en nia juneco jam transformiĝis en banalan vivon.

Iam ni fiere opiniis, ke ni estas la plej elstaraj, sed kiam ni elkreskis, ni trovis, ke ni ne estas tiel bonaj kiel aliaj, do ni tute konfuziĝis. Iun tagon, ni fine konstatis, ke homoj devas kompari sin kun sia hieraŭa memo, sed ne kun iu alia. Ĉiuj sonĝoj estas por remaĉi, sed ne nepre por realigi.

Rekompenco de la tero

Promenante en la kamparo, mi vidis kampulon hoĵi la teron kun granda peno. Delonge mi jam ne vidis tian laboradon, do mi sidigis sur la kamprando por lin observi.

Lia fortika torso estis nuda. La pozo, kiam li levis alten la hoĵon, vidite kontraŭ la lumo, verŝajnis bronza skulptaĵo. Kia bela bildo!

Donante nenian atenton al mi, li nur zorgis pri hoĵado kaj ordigado de la tero. Li ebenigis la teron ĝis la malalta kampego tuj ĉe mi. Mi vidis, ke lia korpo estas trempita de ŝvito kaj lia pantalono tramalsekigita. Li amike diris al mi, “Mi hoĵas por planti arakidojn.”

Mi diris, “Jam antaŭ longe mi ne vidis iun uzi hoĵon. Nun oni faras tion per plugmaŝinon, ĉu ne?”

Li respondis, “Nur malgranda parcelo. Sufiĉas por mi finfari tion per hoĵo en unu tago.”

“Ĉu vi volas iom ripozi?” mi demandis.

“Bone.” Alirinte kun la hoĵo sur la ŝultro, li etendis la manon kaj elprenis grandan kruĉon el la herboj malantaŭ mi, kaj verŝis al mi tason da malvarma teo.

“Post unu monato vi povos vidi la verdajn terpomajn plantidojn. Tiam viaj okuloj kontentiĝos pri la bela bildo. Imagante al si la scenon post unu monato, li diris, “Mia avo diris, ke la tero ne trompas. Ĝi produktas tiom, kiom vi penas. La tero samas kiel homo. Se vi ĝin dorlotas kaj respektas, ĝi donas al vi rekompencojn: flori kaj fruktdoni por vi. Tial mia avo asertis, ke oni kultas arbon por fruktoj kaj respektos hoĵon por rizo.”

Aŭdinte tion, mi estis tre kortuŝita. De tiam, kiam mi paŝas sur la kampoj, mi povas vidi la rekompencojn donitan de la tero. Kaj ankaŭ mi povas vidi, ke ĉiu floro havas la koron rekompenci sian koramikon, samkiel la tero.



elĉinigis *Jatina* (Ĉinio)

Bi Shumin (1952—)



aŭtorino, Bi Shumin

La juna petveturanto

Tiujare, dum la ferioj de la Festo de Laboro, mi veturis per kamiono transportanta eluzitajn pneŭojn. Post unutaga tangado sur vojo, kiam nokto falis, la kamiono eniris Gobion malproksiman je pli ol cent lioj de mia hejmo.

Estis printempo kaj la vojo estis tre kota kaj glita. Subite en la senlima silento abrupte troviĝis fosto, kiu ŝirmis la arĝentan lamplumon de la kamiono.

“Ĉu vi volas serĉi morton? Vi! vi bastardo!” laŭte sakris la ŝoforo. Tiam mi sukcesis klare vidi, ke tio estas junulo, vestita en eluzita flava surtuto, kun sako ligita per kanabŝnuro en la mano.

“Mi ne volas serĉi morton. Mi volas veturi per via kamiono. Mi devas rehejmeniri.”

“Neeble! Ĉu vi ne havas okulojn? La kajuto jam estas plene okupita. Ne estas sidloko por vi!”

“Mi ne volas sidi en la kajuto. Estas bone, se mi sidu sur ŝarĝplato.”

La ŝoforo ankoraŭ ne konsentis: “Neeble! En tia vetero, se vi sidus sur la ŝarĝplato, vi mortus de frosto!” Dirante, li piedpremis la akcelilon por iri antaŭen preter lin.

Ambaŭmane kaptante la lampon de la kamiono, la junulo diris: “Ĝuste tie... mia patrino malsanas... Mi iris al la oficejo kaj prunteprenis iom da milio kun granda peno... Mia patrino volas manĝi...”

“Lasu lin suriri!” mi diris iom simpatie.

Kun la sako en la sino li grimpis sur la ŝarĝplaton: “Dankon...dankon...dankon...” La lasta vorto “dankon” eliĝis el inter pneŭoj.

Nokta vento triste siblis ekster la fenestro. La ŝoforo diris: “Mi havas kolegon, kiu estas bonega ŝoforo. Unu tagon lia kamiono subite malaperis, kaj neniu spuro de ĝi troviĝis longan tempon. Poste ni eksciis, ke junulo alivestigis sin kiel povrulon, petveturis per lia kamiono. Post kiam la junulo surkamioniĝis, li mortigis lin, forjetis lin en dezerton kaj forveturigis lian kamionon.”

Kun premigita koro mi turnis min al la giĉeto malantaŭ la ŝoforo kaj kun retenita spiro gvate rigardis internen tra la truo.

“Ŝajne li sentas sin malvarma. Nenio alia videblas pri li,” mi diris.

“Rigardu zorgeme plu. Mi sentas, ke li volas fari ion malbonan.” Ĉifoje mi vidis, ke la junulo lerte saltas inter du pneŭojn kaj rapide movis mian sakon, kie troviĝas donacoj, kiujn mi volas doni al miaj gepatroj. “Ba! li volas ŝteli el mia sako!”

La ŝoforo diris malvarmkore: “Mi antaŭdiris trafe, ĉu ne?”

“Do, kion mi faru kontraŭ tio?” mi demandis en plora tono.

“Ne malĝoju. Mi provu rimedon kontraŭ li.”

Mi vidis, ke la ŝoforo forte ekpemis la akcelilon. La kamiono, kvazaŭ forta ĉevalo ekpikita de glavo, furioze sin ĵetis. Mi direktis miajn okulojn tra la truo. Tiu petveturanto ŝajne rigidigis pro frosto. Li kurbigis la korpon kaj ambaŭmane tenis la kapon, starante kvazaŭ ŝtona statuo kaj penante kontraŭstari la froston pere de glacie malvarmaj pneŭoj. Kvankam mia sako estis movita aliloken, ĝi tamen restis sendifekta.

Mi diris, kion mi vidis, al la ŝoforo. Kun rideto li diris: “Tio estas logika. Kun ŝtelitaĵo li volus malsuprensaltis, sed nun la kamiono kuras tro rapide, ke li kuraĝas fari tion.”

La vojsurfaco iĝis pli malfacile irebla por la veturilo kaj la rapideco malpliigis. Ne sciante kion fari, mi nerveze rigardis tra la truo. La junulo ankaŭ konsciigis pri la malrapidiĝo de la kamiono kaj li tuj stariĝis, kaptante la ŝancon. Denove li demovis mian sakon. Mi preskaŭ eligis doloran krion. Ĉe ĉi momento de tangado de la veturilo la ŝoforo simple igis ĝin skuiĝi plie. La korpo de la kamiono treege sin klinis kaj la fenestro preskaŭ tuŝis sablozajn ŝtonojn apud la vojo.

Pensante, ke la spirito de la ŝtelinto jam perdiĝis pro tangado kaj li ne volas fari ion kontraŭ mia sako dum kelkaj momentoj, mi sentis min multe faciligita en la koro. La junulo malfacile sin ŝovis en fendon inter pneŭoj, li firme brakumis mian sakon ĉe la sino, kaj blovante spirojn al siaj manoj, li fingrumis la movpecon de la zipo sur mia sako. Ĉimomente la ŝnuro sur lia sako estis jam malvolvita kaj li volis enŝovi en ĝin la enhavon de mia sako, laŭ mia imago...

“Jen li... li ankoraŭ ŝtelas. Kaj li tuj forprenos tion, kio estas en mia sako...” mi diris en paniko.

“Ĉu jes?” La ŝoforo sin tenis senhaste kaj montris malklaran rideton ĉe la buŝangulo.

“Jen ni atingas la celokon,” li seke diris. Ni atingis provizantejon ĉe la ŝoseo, kiu estis la plej proksima aŭtovojo al la hejmo de la ŝtelinto. Fakte neniu aŭto povis veturi al lia hejmo, oni devis piediri almenaŭ 10 kilometrojn internen de la dezerto... La ŝoforo ŝaltis la grandan lampon en la kajuto, dirante: “Nun nenio okazos plu.”

La junulo, tenante sian sakon, grimpis malsupren de la kamiono, rigida kiel marioneto, kaj embarase tretinte sur radon, li falis sur la teron je la sida pozo sur genuoj. Nur post apenaŭ unu horo de veturado aldoniĝis eĉ livideco al lia vizaĝo kotflava kaj sur lia frunto videblis sinua sangspuro.

“Dnk...Dnk...” li misprononcis “dankon” pro rigidiĝo de sia lango.

Kun rideto ni rigardis lin, senĉese balancante la kapon.

Li diris: “Dnk pro tio, ke vi stiris la aŭton tiel rapide. Mi scias, ke vi faris tion por mi kiel eble plej rapide atingi mian hejmon...” Li forviŝis de la malsupra makzelo per mano, ĉu larmon aŭ nazmukaĵon aŭ sangon oni ne sciis. Klininte la kapon al ni, li malinklineme foriris. Rigardante lian dorsfiguron, mi aŭtomate ekkriis: “Haltu!”

“Mi volas kontroli, ĉu miaj aĵoj en la sako mankas aŭ ne,” mi diris serioztone al li. La ŝoforo okulumis konsente al mi. La junulo perplekse vizaĝis al ni kaj lia kolo mole kliniĝis, kvazaŭ sub peza ŝarĝo. Mi surgrimpis la ŝarĝplaton kun movo pli facila ol iam antaŭe. Mi vidis, ke mia sako, kiel grasa bebo, komforte kuŝas inter nigraj pneŭoj. Mi palpis ĝin kun maltrankvila koro. Ĝiaj ĉiuj zipdentoj estis strikte fermitaj kiel la fajnaj kaj dense vicitaj dentoj de besteto.

Subite mi tuŝis krudecon de palmaj fibroj. Mi tuj konsciiĝis, ke ĝi estas la peco perdita de la palmŝnuro de la petveturinto kaj li ligis per ĝi mian sakon al la lato de ligna kestego tiom strikte, kvazaŭ veldita.

Mia koro ŝajnis kvazaŭ renkontinte frostan fluon en la aero, kaj pro tio ĝi frostiĝis ĝis ŝrumpiĝo.

Amo al verda vermo

Mi havas amikininon, kun kiu mi konatiĝis antaŭ ŝia edziniĝo. Ŝi timis vermojn denaske, ĉu vilaj ĉu nude senharaj, senescepte. Ŝi timis eĉ lumbrikojn elteriĝintajn post la pluvo. Post la lernejoj horoj, se hazarde pluveto ĵus ĉesiĝis, ferminte siajn okulojn, ŝi petis al mi preni ŝian manon kaj malrapide iris sur la nigre spegul-simila asfaltita vojo. Kiam mi ordonis al ŝi pligrandigi paŝon, ŝi obeeme faris grandan paŝon, kiel gimnasto saltis kun disetenditaj femuroj, por sukcese eviti tiujn rampantajn vermojn sur la strato. Dum tiu momento mi povis senti ŝian manon glacie malvarma, rane saltanta kaj senintermite timtremanta.

Ni ĉiuj volis helpi al ŝi forigi tian timemon. Ŝi, kiel plenkreskulo, eĉ ploregis skue, kiam ŝi ekvidis malgrandan vermon. Kia honto! Unu tagon de la frua printempo, knaba lerneĵano ŝtele metis falintan verm-similan amenton de poplo inter paĝojn de ŝia libro. Kiam ŝi eniris la klasĉambron, ni retenis spiron kaj atendis ŝian

panikan ekkriion, sed neatendite neniam sono aŭdiĝis. Kiam ŝi malfermis la libron, ŝi levis la palperojn kaj kolapse falis sub la pupitron sensone.

Ekde tiam ni ne plu kuraĝis fari tian friponaĵon al ŝi.

Forpasis multaj jaroj. Ni ĉiuj havis propran familion kaj infanojn. Unutage ŝi gastis ĉe mi. Mi preparis manĝaĵojn en kuirejo kaj ŝi helpis min. Kiam mi ordigis verdajn paprikojn, subite elŝoviĝis verda vermo, grasa kiel fabo, kun nigraj pikiloj sur la dorso. Kia minaca insekto! Por eviti eventualan mordeton de la vermo mi subkonscie elĵetis la rondan paprikon, kiel eksplodonta grenadon. Kiam ĝi ĉesis ruliĝi, mi ŝprucemortigis la vermon per insekticido. Tiam mi ekmemoris pri la amikino, kiu tre timis vermojn. Interne mi pensis, ke ŝi babiladis kun mi, ne deŝirante siajn okulojn de mi, kaj ŝi certe vidis la vermon. Ne aŭdiĝis ŝia surprizita ekkrio, ĉu eble ŝi jam svenis pro timo?

Turninte la kapon, mi vidis, ke ŝi aplombe rigardas min. Ŝi eĉ indiferente diris, kial vi tiel panikiĝis pro tiel malgranda vermo.

Pli surprize ol kiam mi vidis la vermon, mi demandis: “Aĥ, vi eĉ ne timas vermon kiel antaŭe? Per kia kuracilo vi fortigas vin kontraŭ ĝi?”

La amikino diris kun amara rideto: “Mi kompreneble ekhavas timon. Sed mi jam ŝajngas min netima kun neŝanĝita vizaĝkoloro, kaj la aliaj ne povas travidi mian ŝajnigon. Komence mi fikse rigardis lumbrikon, ĉar mi scias, ke ĝi estas utila insekto, facile akceptebla laŭ mia sento. Kaj plie ĝi estas sekura, ĉar ĝi absolute ne mordas... Mi malrapide kutimiĝis al tio post ripetada rigardado. Nun kiam mi vidas vermon, ĉu vilan ĉu senharan, mi povas sukcesi reteni timon en la gorĝo.”

Mi diris: “Vi faris grandan penon por tiom malgranda insekteto. Ĉu indas via peno?”

Ŝi diris tre serioze: “Jes, indas. Ĉu vi scias, kial mi timas vermojn?”

Paŭtante, mi respondis, kiel mi povus scii pri tio, krom se mi estus via patrino.

Frapetinte mian manon, ŝi diris: “Vi diris trafe. Tio rilatis mian patrinon. Kiam mi estis knabino, mi ne timis vermojn. Unufoje, kiam mia patrino aŭdis min plori ekstere, ŝi hasteme elkuris kaj vidis mian mandorson ruĝa kaj ŝvelinta, apud kiu rampis du grandaj koloraj vermoj. Ŝi sciis, ke mi estas pikita de la vermoj, kaj ŝi hasteme ŝmiris mian manon per dentpastaĵo, kio estas loka rimedo ĉesigi jukadon kaj forigi venenon por ordinaraj lokanoj. Poste kiam ŝi vidis vermojn ĉirkaŭ mi, ŝi laŭte kriis por timigi min... Fojrefoje mi formis naturan reflekson. Je ekvido de vermoj mia animo forkuris en la pinton de piedoj.”

“Kiel vi normaliĝis poste, do?” mi demandis plue. Laŭ mia kono pri la medicino, mi scias, ke post ripetada intensigo de iu stimulado, ŝi fine fariĝis la instrua kazo pri reflekso de la biologia profesoro Pavlov. Ĉiufoje kiam ŝi vidis vermon, ŝi reiris en la timegon de sia knabineco. En la mondo troviĝas diversaj fobioj. Kelkaj timas

altecon kaj aliaj iun koloron. Mi iam vidis virinon, kiu ekstreme timis la momenton de ekflugo de aviadilo, kaj ne prenis flugmaŝinon, krom se ŝi devis. Iufoje ŝi ne devis ne preni flugmaŝinon, kaj kiam ŝi eniris la flugmaŝinon, bukinde la sekurigan zonan, ŝi jam paliĝis de timo. Kiam la flugmaŝino ekglitis, ŝi eĉ hurle ploregis... La ĉina antikva proverbo “Unu fojon mordite de serpento, oni eĉ timas volvitan ŝnuron dum dek jaroj” prezentas la saman scenon. Pri la rakonto de “preni por serpento la reflekon de pafarkon pendants sur la muro en vintaso”^{*} iuj ankoraŭ memoras, sed aliaj perdas ĝin en sia subkonscio. En la okuloj de ordinaruloj tio estas nur bagatelo, dum la koncernataj personoj brulas de suferoj, kiuj estas malfacile kuraceblaj.

La amikino diris: “Poste iu, kiu volis kuraci min, diris, ke oni povos uzi la metodon de “laŭgrada desensivigo”. Ekzemple oni montros al mi bildojn de vermoj, poste lasos min observi vermojn tra vitro, kaj fine mi observos senpere vermojn...”

Mi subite ekkomprenis: “Nu, vi estas kuracita per tiu metodo.”

“Ba! mi tute ne uzis tiun metodon, ĉar mi ne povis elteni. Ne paroli pri rigardo al la bildoj de vermoj, iufoje kiam mi manĝis en restoracio, oni alportis vazon da delikata tonika supo. Kiam, levinte la kovrilon de la vazo, mi vidis insekterbojn flosantajn sur la supo, tiumomente mi tuj ĵetis la supvazon sur la plankon...” ŝi rakontis kun posttimo, mane premante sian bruston.

Mi dubeme ĵetis ekrigardon al la rubujo, en kiu kuŝis la mortinta vermo. Ĉu ŝi estas tiel senzorga pri vermoj, ĉar ŝi prunteprenis aliulan kuraĝecon por diri tion? Mi petis al ŝi ne teni min en suspenso kaj rakonti al mi, kiel ŝi fariĝis tute sentima al vermoj.

Ŝi malrapide diris: “Ne malpacientiĝu. Aŭskultu mian detalan rakontadon. Iutage mi iris al parko, kunportante mian filineton en la sino, kiu apenaŭ scipovis paroli. Kiam ni paŝis sur aleo, ŝi subite diris: ‘Panjo... estas... sur kapo...’ Dirante, ŝi pinĉis ian umon de sur miaj haroj kaj montris ĝin al mi sur sia manplato por gajni mian laŭdon.

Kiam mi direktis mian rigardon al ĝi, mi estis ekster mi de timo. Kolorriĉa vermo kuŝis sur la mano, kun tre minaca aspekto.

Mia unua reago devus esti, ke mi sveni kiel antaŭe, sed mi ne povus fali, ĉar mia filineto estis en mia brakumo. Se mi falus, ŝi vundiĝus pro mia falo. Mi ne nur ne svenis, sed mi sin montris pli sobra ol iam antaŭe.

Mia dua reago estis, ke mi eligus laŭtan korŝiran ekkriion. Ĉar vi havas sufiĉe grandan kuraĝon, vi eble ne konas la profundan komprenon, ke estas utile eligi surprizitan ekkriion en timo. Fakte estas bonege eligi ekkriion, ĉar tio povas helpi al vi elasi intensan tension. Tamen mi tuj konsideras, ke mi neniel povas ekkrii, ĉar tiel mi terurigos mian infanon. Pro tio mi vere retenis la ŝrikon ĉe la pinto de la lango. Mi imagas, ke tiam sur mia kolo certe estiĝus granda ŝvelaĵo, kvazaŭ kokin-ovo restanta ĉe la gorĝo de serpento, kiu glutas ĝin.

Nun unu vermo estis tuj sub mia nazo. Mia filineto karesis ĝin per sia fingro, kvazaŭ fridan buntan gemon. Pensoj kirliĝis en mia cerbo. Se mi timus kaj ĵetus ĝin

sur la teron, la filineto certe ekde nun formis la impreson, ke vermoj estas timindaj. En ŝiaj okuloj patrino estis ĉiopova kaj absolute sentima. Se io povus timigi la patronon ĝis tia grado, tio certe estus ekstrema timinda.

Mi iam legis kelkajn rilatajn legaĵojn, el kiuj mi scias, ke mia propra patrino, per tia konduto, igis min de infaneco timi ĝisoste tiujn estaĵetojn. Eĉ kiam mi plenkreskis, mi scias teorie, ke tiuj senvenenaj vermoj vere ne indas ajnan timon, sed mia korpo ne obeis al mia volo. Unuflanke mia patrino protektis min, sed aliflanke ŝi inokulis en min novan timon. Se mi laŭte krius, la ĉeno de timo transdoniĝus. Neeble. Mi volis per mia amo frakasi ĉi tiun feran ĉenon. Mi etendis timtremantan manon kaj unuafoje dum mia vivo tenis vivan vermon per mia manplato, sur kiu mi observis ĝin de flanko al flanko, afektante ĝojon kun malfermita buŝo, ĉar tiam mia filineto fiksrigardis min.

La temperaturo de ĝia korpo estis multe pli alta ol tiu de miaj fingroj; sur ĝia haŭto kovriĝis skvamoj, el kiuj strioj da glitaj fluidaĵoj eksudis; la viloj sur ĝia kapeto svingiĝis diversdirekten; ĝiaj okuletoj pli malgrandaj ol pinglotruoj aspektis gardeme kaj timeme...”

Dum mia amikino rakontis, mi eĉ sentis froston sur la dorso pro timo. Nur tiu, kiu estas alte sensiva al vermoj, povas fari tiom animskuigan priskribon en rakontado.

Ŝi daŭrigis: “Tiumomente mi sentis turmenton, kvazaŭ centjaran. La filineto vualis min per sia klara kaj senmakula rigardo. Antaŭ ŝi mi estis dio. Mi ne povis montri ajnan retiriĝemon. Mi ne povis pasigi mian malsanecan timon al ŝi...”

Post longa momento mi malpeze metis la vermon sur la teron. Mi diris al ŝi, ke ĝi estas vermo, neniom timinda. Kelkaj vermoj estas venenaj. Ne tuŝu ilin per mano. Sed plimultaj vermoj estas tuŝeblaj...

Tiu vermo malrapide rampis sur la tero malproksimen. La filineto svingis sian maneton, dirante ĝis...

Kiam mi levis la filineton per brakoj, mi ne povis fari eĉ paŝon dum longa tempo. Miaj vestoj jam estis malsekigitaj de ŝvito.”

Kiam ŝi finis rakontadon, en la kuirejo regis longa silento. Mi diris: “Do, via kuracilo estas donita de via filineto.

Ŝi korektis min, dirante: “Mia kuracilo estas donita de mi mem. Ĝi estas la amo al mia filino.”

**La rakonto aludas, ke skeptikemulo kaŭzas timegon por sin ĝeni.*

elĉinigas Fang Fang (Ĉinio)

Li Fuyan (aŭtoro en Tang-dinastio)

Antaŭdirita Geedziĝo

Wei Gu de Duling fariĝis orfo ekde sia frua infanaĝo. Kiam li elkreskis, li tre volis edziĝi kiel eble plej frue, sed dum longa tempo liaj klopodoj por svatiĝo rezultigis per nulo. En la 2a jaro de Yuanhe-erao (807 p.K.) dum sia vojaĝo al Qinghe li restis en hotelo sude de Song-urbo. Tiam iu vojaĝanta gastulo en la hotelo svatis al li, proponante filinon de Pan Fang, la eksa asistanto de prefekto de Qinghe. Ili interkonsentis pritrakti la detalojn je la sekvanta mateno, antaŭ Long'xin-templo okcidente de la hotelo.

Ĉar Wei Gu havis fortan asiron je geedziĝo, la sekvan matenon li ekiris al la rendezuo tre frue, kiam la luno ankoraŭ brilis oblikve sur la ĉielo. Atinginte la templon, li trovis, ke sur la ŝtuparo sidas maljunulo kun sako apud si kaj legas sub la lunlumo. Wei Gu paŝis al li kaj rigardis al la legaĵo, sed li scipovis legi nenion el ĝi, kio estis nek ranidformaj ideogramoj nek sanskrito.

“Kio estas tiu ĉi libro?” demandis Wei Gu, “Mi diligente lernis ekde mia juna aĝo kaj bone scipovas ĉian skribadon de la mondo inkluzive tiun de sanskrito aplikata en la okcidentaj landoj, sed mi neniam vidis libron kiel la vian, kial?”

“Jes, kompreneble. Kiel vi povis ĝin vidi? Ĉar ĝi ja ne estas libro en la homa mondo.” respondis la maljunulo kun rideto.

“Kio do ĝi estas, se ne de la homa mondo?”

“Jen la libro de Hadeso,” respondis la maljunulo.

“Sed kiel povas okazi, ke vi, la vivanto en Hadeso, aperas ĉi tie?”

“Ne mankas al mi la motivo por aperi ĉi tie, fakte ja vi mem venas tro frue, sekve renkontas min. Ĉiu oficisto de Hadeso administras iun aferon de homoj. Kiel do ili ne iras en mallumo? Nun sur la vojo duono el la vojirantoj estas homoj kaj la cetera duono — fantomoj. Tion multaj nur ne rimarkis.”

“Kion vi administras?”

“Geedziĝon de la homoj.”

Wei Gu tre ĝojis kaj demandis:

“Mi orfiĝis ekde frua infanaĝo kaj nun ĉiam deziras edziĝi kiel eble plej frue por plimultigi idojn al mia familio. Sed dum dek jaroj vanis mia penado en serĉo de fianĉino. Ĉi matene iu proponis al mi veni ĉi tien por interkonsiliĝi pri svatiĝo de la filino de eksprefekto s-ro Pan. Ĉu mi sukcesos?”

“Ne! Sen difino de la Destino ne sukcesos eĉ svatiĝo de nobelo al filino de buĉisto. Kiel vi povus sukcesi por peti la manon de prefekta filino? Via estonta edzino nun aĝas nur tri jarojn kaj ŝi edziniĝos al vi je sia deksepa jaro.”

Tiam Wei Gu demandis kio estas en la sako. La maljunulo respondis:

“Ruĝaj fadenoj, per kiuj mi interligas la piedojn de la destinitaj paroj. Kiam ili naskiĝis, mi jam subligis kaj ili fariĝos geedzoj pli aŭ malpli frue malgraŭ tio ĉu la du familioj estas malamikaj unu kontraŭ la alia, aŭ ege diferencaj de rangoj aŭ tre malproksime troviĝantaj. Via piedo nun estas jam interligita kun tiu de la bebino, kiun mi menciis, tial vanos via ĉia klopodo je aliaj kandidatinoj.”

Kie estas mia estonta edzino kaj kio estas okupo de ŝia familio?”

“Ŝi estas filino de maljuna legomvendistino Chen, kiu loĝas norde de la hotelo.”

“Ĉu mi povus vidi ŝin?”

“Vendante legomon la maljunulino Chen ofte kunportas la knabinon en la bazaro. Sekvu min kaj mi montros ŝin al vi.”

Kiam tagiĝis, ne venis la homo, kiun Wei Gu atendis. La maljunulo volvis sian libron, portinte la sakon li ekiris. Wei Gu sekvis lin ĝis la bazaro, kie li efektive vidis maljunan legomvendistinon blindan je unu okulo kaj ĉe ŝi trijaran knabinon, kiu aspektas verŝajne ankoraŭ pli malbela.

“Jen via estonta edzino!” diris la maljunulo.

“Mi mortigos ŝin!” kolere ekkriis Wei Gu.

“Ba, vanos via ĉia provo! Ĉar ŝi estas destinita fariĝi honorinda sinjorino dank' al sia meritoplena filo,” dirinte tiujn vortojn la maljunulo malaperis.

“Fi al tiu ĉi maljunulaĉo!” blasfemis Wei Gu, “eĉ se mi ne povas havigi al mi edzinon taŭgan al mia glora familio, mi edzinigos belulinon el junaj kantistinoj. Ĉu mi, la ido de nobla familio, devas geedziĝi kun tiu malbela knabinaĉo de blindulino?”

Li preparis akran ponardon, donis ĝin al la serviston kaj diris:

“Vi estas ĉiam fidela al mi, do mortigu por mi la knabinon kaj mi premios vin per dek mil moneroj.”

“Jes,” respondis tiu. La sekvan tagon, kaŝante la ponardon en sia maniko, la servisto iris al la bazaro. Li ĵetis sin kun la ponardo al la knabino en homamaso kaj forfuĝis en ĥaoso de foiro.

“Ĉu mortigita?” demandis Wei Gu al la sendito, kiam ili ambaŭ forrapidis de la akcidenta loko.

“Koron mi celis,” respondis la servisto, “sed bedaŭrinde trafis nur glabelon.”

Poste Wei Gu multfoje svatiĝis sed senescepte fiaskis. Forpasis plu dek kvar jaroj, dank' al la merito de sia patro Wei Gu estis komisiita kiel asistanto de la prefekto Wang Tai en Xiangzhou. Li plenumis sian oficon en tribunalo tiel bone, ke la prefekto edzinigis sian belegan filinon 16- aŭ 17-jaran al li. Wei Gu estis ege kontenta pro tio. Sed la edzino ĉiam portis inter la brovoj oran ornamaĵon, kiun ŝi neniam demetis eĉ dum sia baniĝo. Tio donis al Wei Gu strangan senton. Post unu

jaro li subite memoris la vortojn de sia servisto kaj demandis ŝin pri la kialo, tiam ŝi lamente respondis:

“Ne filino, sed nevino de la prefekto mi estas. Kiam mia patro mortis sur sia posteno de estro de Song-urbo, mi estis ankoraŭ bebino. Mortis ankaŭ miaj patrino kaj frato unu post alia. Restis de mia patro nur parcelo da bieno sude de Song-urbo, kie mi loĝis kune kun mia vartistino Chen, kiu vivtenis nin per legomvendado. Ŝi ĉiam kunportis min ĉe si por min prizorgi kaj foje en bazaro, kiam mi estis nur trijara, min trafis kanajlo per ponardo — de tiam restis ĉe mi en la glabelo cikatro, tial mi ĉiam ĝin kovris per ornamaĵo. Antaŭ sep aŭ ok j aroj, mia onklo adoptis min al li kaj poste li edzinigis min kiel sian filinon al vi.”

“Ĉu via maljuna vartistino Chen estis kun unu blinda okulo?” demandis Wei Gu.

“Jes, sed kiel vi povas scii ?”

“Ĉar la atencinto ja estis mi!” respondis Wei Gu kaj li rakontis al ŝi ĉion...

“Ho, kiel strangas la sorto!” miris la edzino. Kaj de tiam la geedzoj vivis des pli harmonie kaj ege respektis unu la alian.

Poste al ili naskiĝis filo, kiu estis nomata Kun kaj fariĝis prefekto de Yanmen. Pro lia merito la patrino estis honorigita per la titolo “Honorinda Sinjorino de Taiyuan”. Kiam la estro de Song-urbo aŭdis tiun historion, li subskribis la hotelon kie Wei Gu restis “Hotelo de Antaŭdirita Geedziĝo”.



elĉinigis **Guozhu** (Ĉinio)

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



Kelkaj laŭkazaj poemoj

poeto, Mikaelo Bronŝtejn

Ĝibiĝanta enĝardene
inter ajloj, cepoj, fragoj,
loniceraj kaj brasikoj,
plure mi bedaŭras ke ne
venas pluŭ' dum pluraj tagoj
kaj la bedoj ĝemas sekaj.

Soifanta, ĉevespere
min sufero vokas ter', do
en ĝardenon mi impetas,
ĉar necesas dumsomere
preni hoson por aspergo -
miaj plantoj akvon petas.

Iam fajfis mi pri plantoj,
vojaĝante kun gitaro
en Eŭropo, en Azio...
Ne plu nun naskiĝas kantoj,
pene pelas jaron jaro,
ŝajnas ke ŝanĝiĝis ĉio:

ne la venkon de la lingvo,
la elvivon oni traktas

pesimisme kaj senpene,
kvazaŭ la fraŭlina lino
kontraŭ maljuniĝ' baraktas
spite la komprenon ke ne

ŝminko gravas, sed humoro
vivdeziro, optimismo,
kaj impet' al ĝusta pado...
En varmego mia koro
taksas ĉion tra la prismo
de ĝardeno aspergado.

Mi ekvivus plezure en paco de l'mond' lavenda,
en aromo densa, tiklanta ĉiun naztruon,
kaj ripozus en mola lulseĝo kun la manplen' da
dolĉaj framboj maturaj, neglektante eksteran bruon.
Sed la mond' senpaca kruele mian vivon penetras,
sed la bruo de l' foraj militoj en miajn orelojn venas.
Jen averto klara por mi: en la viv' ĉiutaga nepras
scii, ke en realo ne ĉie la mond' lavendas.
Do eĉ se en ĝardeno lavendo fascine floras,
mi atentis informojn el la ĉiutaga kulmin',
ja la bruo ekstera, kiu dume sekure foras,
certatempe povas senpere atingi min.

*65 geesperantistoj el 22 urboj de Rusio partoprenis en la tradiciaj Tihvinaj
Esperanto-metiejoj kun varia kaj interesa programo.*

La postgusto de Tihvinaj Esperanto-metiejoj
en la brusto varman ondon levas tra l'vekitaj vejnoj.
Malgraŭ laco – ja kutima – senstreĉiĝon mi eksentas,
kombas mian grizan barbon kaj kontentas, jes, kontentas,

ĉar por mi la finrezulto estas senkonteste klara:
naskis mian kontentecon la kontento amikara.
Tiujn tagojn el la koro ne forviŝos do forgeso,
kaj mi dankas ĉiujn miajn geamikojn pro l'sukceso.

Alvenas ia-tia tag' somere,
kaj mi konstatas, ke jam certe ne re-
naskiĝos flore la velkintaj floroj,
ke la humoroj iĝos rememoroj,

ke retravivo de l'fascinaj tagoj
ja estas, certe, pli sensenca blag' ol
remaĉo mensa de iama ĝuo,
vaporiĝanta en la kontinuo.

Do, preparante min por viv' aŭtuna,
mi spronas pensojn al la tempo nuna
kaj, mergiĝante en la novajn planojn,
kontente frotas la jukantajn manojn.

En la hela junaĝo, vivanta senmone, tamen honeste,
kredis mi ke la mondon movas antaŭen la pura justo.
Estis mia kredo naiva apogo por alta aprez' de
la junaĝa epoko, semanta esperon en mia brusto.

Poste foren rapidis pli ol duonjarcento eventoriĉa,
Jaro jaron spronis, kaj juna aŭroro kadukan aŭroron ŝanĝis,
Estus, certe, mensogo diri, ke lulis min ondo feliĉa
ĉiutage, dumvive, sed bonkora destino mia aranĝis

ke alternis la tempostrioj, kaj post dense nigraj venadis helaj,
forpelantaj mavan angoron, reprovizantaj esperon.
Miaj planoj kaj agoj, verŝajne, neniam estis tute modelaj,
Sed se iu riskas aserti tion pri siaj – li diras malveron.

Barba grizo kaj sulkoj surfrunte min klerigis pli bone
ol la grego mentora, atakanta per kruda kriaĉ' aŭ insida flustro,
kaj ververe kontentas mi nun, elektinta vivi senmone
sed honeste, malgraŭ ke l'mond' obstine fajfas pri l'justo.

Alfluis la tria ondo
de miaj ĝardenaj floroj,
por la finsomera mio

pokalo da lasta ĝu'.

En la multkolora mondo
spegulas la rememoroj
pri la okazinta ĉio,
sed viv' mia fluas plu.

En pompo de l'hortenzio,
en simpla de l' kalendulo
en noblo de la dalio
sentebblas jam la aŭtun'.

Flugemas pli l' fantazi' ol
gruaro en for' nebula,
kaj floroj ekscitas pli ol
la homaj eventoj nun.

La viv' ne aspektas triste,
la tagoj paradas feste,
la riĉa rikolt' bonguste
bobelos en juna vin'.

Jes, bonas ekzisti disde
fiagoj, sed alta prez' de
l'indiferenteco juste
turmentas ja ankaŭ min.



esperantigita de **Paula Adúríz** (Hispanio)

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Bonan Esperanto-Tagon!

Li havis belan verdan tason,
 Per kiu verdan teon trinkis,
 Per la skribilo, ankaŭ verda
 Apud la tablo ion skribis.

Pentraĵo bela apud lito
 Dometo verda, verda kampo
 Kaj kiel stel' lumigis ĉambbron
 Per verda lumo eta lampo.

Li verkis kanton -"Kanto verda",
 Pri amikeco, pri la amo,
 Kaj la gitar' varmigis lian
 de la anim' ĉiaman flamon.

Forflugis jaroj, temp' trapasis
 Li rememoris kun tenero
 La tuta viv' ne estis "verda",
 Sed hom' ne vivas sen espero.

Ne estis el ali-planedo,
 Ne estis stranga vivekzisto,
 Memorinsignojn verdajn gardas
 Kun "verda" kor' Esperantisto!

Poemojn trovas ni kiel trezoron,
 Aperas kiel nova la planed',
 Eklumas ĉio, ĝoj' varmigas koron,
 Eksunas viv', feliĉas la moment'.

Komprenas la sinjoroj, ĉar tre ofte

Antaŭ vort' belega sen envi',
Demetas la ĉapelon, sur genuoj
Kliniĝas, benas strofon de la poezi'!

Mi rakontas pri tago pasinta,
Pri veter', kiu tedis de pluvo,
Pri sopir' aŭ ĝoj' en la vivo
Kaj pri la fantazioj sen pruvo.

Pri la helpo al homoj, al bestoj,
Pri la agoj honestaj, fervoraj,
Pri afliktoj maljustaj, sensencaj
Kaj pri la akuzanta memoro.

Mi feliĉas kaj kantas la kanton
Pri matena bruet' de birdaro,
Pri karesa ektuŝo de ondoj
Ĉe senlima malhelblua maro.

Pri la noktoj sendormaj rakontas,
Pri rigard' de katid' petolema,
Mi ne trovas ĉe homoj similajn
De la amo kaj fid' sentojn plenajn.

Pri la veraj amikoj rakontas
Kiel gravas la varmo en koroj,
Ke nur vorto sincera valoras
Pli ol mono, honor' aŭ gloro.

"Vagabondas" la vers' kun demando
Ĉu silenti, ĉu laŭte paroli?
Povas skribi nenion la mano,
Sed silenti ne povas la koro.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Printempe

Post trinkad' el simfonio
majesta de Cec ía,
en laŭdo al printempo,
silentas mi senpene.

Malrapide mi kvietiĝas
ĉe l' rand' de l' pasintaj sonĝoj,
nur por aŭdi la pulsadon
de l' efemereco mia
(kiel renaskiĝantaj floroj)
en la rivero de l' vintro
pilgrimanta, kiu ne pasas.

Banala intrigo

Ene de la bobelo,
l' okul' gvatas la mondon
de ĉiu, kiu sin elmontras
en sia feliĉa kokono.

Kaj l' okul' tre fieras
ĉar ĝi povas havigi al si
tion da aferoj!

Je mia memoro

Nia ekzistado estas nur,
kiel kvarsezona tago,

ĉiam teksita de songĝoj,
kiuj venas, kaj iras for...

Do nostalgi' pri l' estonto
min invadas ekan jaron:
mi nur ŝaŭm' el memor' estos
en historioj de l' nepoj.

Fremda

Mi ne plu identiĝas kun la knabino sur la foto,
nek kun la figuro, kiun mi nun vidas en la spegulo.
Sento pri ne apartenado min turmentas;
ŝajnas, ke mi paŝas en la intertempo:
pasinteco estas memoro, kiu lante foriĝas;
estonteco fariĝos maltrankvileco nur.

Bonvenon al paradizo!

Mi estas ĉi tie, kara filino! Ĉu vi ne vidas min?
Mi vekiĝas lume el la sino de l' montaro,
kaj miaj kreitaĵoj vin salutas verdrakume.

Miaj okuloj ridetas al vi el ĉiu folio de l' arboj,
humilaj majestoj, kiuj ame vin kontemplas,
dum la floroj songas en simfonio el parfumoj.

Mi estas la bunta gajeco de l' birdoj kaj papilioj,
la forto de l' akvofaloj, la saĝeco de l' ŝtonoj,
la kvieteco de l' lagoj, la brua persistado de l' riveroj.
Silento estas mia mistero, kiu nun gastigas vian koron.

Vesto

Korp' estas vesto vivanta,
kiun oni denaske gajnas.
Jen ĉiutaga miraklo -
poezie pri ĝi mi zorgas:
pano, kiu nutras revon,
kaj igas tolerebla tagon.

En ĉi tiu punkt' de l' vivo,
fiere kaj ĝoje mi diras,
ke mi kapablas ankoraŭ
mian korpon promenigi,

Dum horoj plenaj de lumo,
ĉu en urb' aŭ en kampar',
mi deziras, ke ĝi trinku
la tutan misteron bluan
de ĉi matenoj aŭtunaj.

Flugantaj riveroj

Subite mi malkovris,
ke ni estas mergitaj
en nevidebla mondo
de ondoj da poezio:
aeraj riveroj flugas
super niaj kapoj.
Riveroj el vapor' akva,
naskitaj el oceano,
nutradas Amazonion,
kiu ilin renovigas:
blovado, kiu karesas
tiun cirkviton de l' vivo.

Ne krokodilu!

Saluton, mi estas Kroko!
Ido de grandega esperanta familio!
Saluton, mi estas Kroko,
Kroko, Kroko, Kroko
krokodilo!

Mi estas simpatia sed pigra, nestudema,
bedaŭrinde tro manĝema!
Ĉar mi ŝatas manĝi akuzativojn
kun verda salato el pluraloj!

Saluton, mi estas Kroko!

Bonvolu amikiĝi kun mi!

Kvazaŭ songe

*Subite, mia korpo vekigis,
kaj ridetis al mi.
La sano renaskigis:
antaŭpaska miraklo
el korfavoro dia.
Esperanta laboro:
resaniga likvoro.

* *La unuajn du versojn verkis Paŭlo Sérgio Viana.*

Bedo de Ĉinesko

Vejdo (Ĉinio)



aŭtoro, Vejdo

La jenaj versoj estas verkitaj laŭ la ĉinstila poemskemo—ĉinesko Dekses-Silabo, kies strofo konsistas el 1, 7, 3, 5 silaboj kun rimaranĝo: aaxa (x=senrima).

Nuna diluvo

El
la nubkovrita ĉiel'
lavangas
akvo kun ribel'.

Ĝi
jen abrupte kun muĝ-kri'
faladas
je homa anksi'.

Flu'
akva torentas kun bru'
dronigas
mondon per detru'.

Jen
domoj, vojoj sur teren'
mergiĝas
en akvon je plen'.

Sur
akvo flosas laŭ plezur'
la aŭtoj
kaj mebloj en kur'.

Kaj
homoj grupe sur altaĵ'
grundiĝas
kun granda malgaj'.

Ve
tute haltas ludoj de
publiko
senespere tre.

Nu,
sturmbatoj por sukur'
alvenas,
—la arkeoj, ĉu?

Triope

ŝi
vent-pelata arbfoli'
mizere
kun melankoli'

li
movata de ambici'
fiere
kun ĉion-defi'

mi
ŝirita de emoci'
sincera
nur kun simpati'

Surmara Savado

1.

ek!
la maro tangas kun blek'
tondr-brua
kaj onda bordlek'

2.

sav-
helikopter' kun forthav'
alurgas
por vivo de av'

3.

ĵet'
de ŝnurŝtupar' laŭ la pet'
el ĉiel'
kun granda diskret'

4.

mir'
kria kun ĝoja suspir'
el ŝipo
por viva akir'

5.

laŭ
ŝtupar' l' av' grimpas malgraŭ
vento kaj
ondego ankaŭ

6.

per
pen' surgrimpas kun sufer'
lante li
el mara danĝer'

7.

hoj!
li jam sekuras, la ĝoj'
rapidas
tra tuta konvoj'

Ascend' al Luno

Okaze de surluniĝo de l' ĉina lunsatelito

nun
la ĉinoj per forta kun'
raketon
pafas al la lun'

por
pac' kaj scienca esplor'
ekflugas
la satelit' sor

en
kosmospac' kun esperplen'
ĝi strebas
al luna ĝarden'

ĝi
ja la prosperon de Ĉini'
kunportas
al feina ŝi*

ĝoj'
nin ebriigas en larm-roj'
kaj flugas
laŭ alluna voj'

** aludas Chang'e, feino vivanta sur la luno laŭ la ĉina legendo.*

Naĝ' en Maro

ond'
min puŝlevas por renkont'
al ĉiel'
de lazura rond'

vent'
min subpremas ĝis tegment'
verdblua
de la mara gent'

sun'
min kolorigas per brun'
malhela
sub bakada pun'

mi
libere kun eta kri'
drivadas
en akva medi'

vel'
min akompanas sen cel'
pasante
spektaklojn de bel'

mev'
min rondflugas ĉe ondlev'
mi plenas
je ekstaza rev'

Plag' de Polucio

ve
homa mondo ĝis pere'
aliros

sen ajna ide'

jam
difektis natur-dinam'
pro homa
deflankiĝa am'

en
aer' kaj akv' venen'
plenplenas
je homa ĉagren'

per
fabrika fum' en aer'
suferas
homaro sur ter'

flu'
akva puras ja ne plu
por brutoj
homoj por trink-ĝu'

viv'
homa dronas jam en triv'
ĝislima
sen ajn perspektiv'

plag'
devas seniĝi per ag'
aktiva
sen naiva blag'

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Poeto, Yi Qiao

Papavfloroj

Sur kamparo jen papavoj floras,
rozaj kiel lipo de belino.
Ili ĉarme en zefir' fervoras,
kaj l' aromo flosas al kor-sino.

La belec' animon sonĝ-obsedas,
neĝ-glacion fandas la pasio.
Tamen ili pekon jam heredas,
fonto de mania agonio.

Ruĝ-petaloj brilas kun fiero,
sed en tenta ombro makulata.
Migre inter fido kaj despero,
devojiĝo povas esti fata.

Teme pri anĝelo kaj demono,
papavfloroj flustras kun admono.

Lotusfloroj

Mi promenas preter klara lago,
lotusfloroj sorĉe jen fervoras.
En zefiro de somera tago,
ili rose kaj blankpure floras.

Verdfolioj kiel jupo de fraŭlino,
sur ondetoj svingas pimp-gracie.

Dolĉ-parfumo flosas al kor-sino,
Mi ebrias tranca nostalgie.

Lagsurfacon jen nebul' obsedas,
sur burĝono staras nun libelo.
Anim-pacon pure mi posedas,
kvazaŭ en la mondo de fabelo.

Temas pri model' de pura moro,
lotusfloroj lindas en la koro.

** Lotusfloro kreskas el malpura ŝlimo sed restas pura. Laŭ la moro de lotusfloro, ni restu honestaj kaj korpuraj malgraŭ ĝenerala koruptado kaj malvirto!*

Hejmvilaĝo en la sonĝo

Belimponas mia hejmvilaĝo
kun gracia pimpa silueto.
Jen mirinde sorĉas la pejzaĝo,
eĉ tuĵare verdas la monteto.

La ĉiel' lazuras tra vastforo,
kaj tiea suno brilas hela.
La kamparo plenas de fervoro,
ĉio flagras laŭmemore bela.

Jam delonge de vi mi apartas,
ofte mi en sonĝo vin sopiras.
Kara mia, kiel vi nun fartas?
arde vin revidi mi deziras.

Iam oni vivos jen libere,
aspirante vigli pli prospere.

Rendevuo en la sonĝo

Via kis' kortuŝas dolĉtenera,
ni brakumas en ekstaza muto.
La pasio vervas ja sincera,

kun la reciproka korsaluto.

Graca sento restas neforgesa
kiel la pompanta pimpa floro.
Mar' profunda ondas plenkaresa,
milde kun printempa zefirgloro.

Rendevuon en la songo bela,
alte varti ni pasie devas.
Tiel linde vi ridetas hela,
estas vi, mi kiun ofte revas!

Estingiĝos ne l' beata flamo,
nek delice korinklina amo.

La Haventemplo

Ĉe la bord' de l' Rejno, jen haveno,
sankta templ' nubtuŝas al ĉielo.
Urb' Romia estas ja Ksanteno*,
kun muzea parko kaj kastelo.

Dio gardas navigad-sekuron,
oferfajroj ĉiam ardas hele.
Feo benas komercad-kulturon,
preĝas la kredantoj jen fidele.

En la Templ' resonas vort' de Dio,
vizitantoj sentas praspiron.
Laŭ Romia glora tradicio,
mi pilgrimas tien sekve riton.

Templ' antikva tra pratempo staras,
bildo de Romio tiel klaras.

* *Ksanteno (germane: Xanten) estas la antikva Romia urbo ĉe la bordo de la Rejno, Germanujo. — de Yi Qiao laŭ metriko de angla soneto*

Vinofero por rememoro

—laŭ melodio *Aromplena korto*

Nostalgie pensas mi l' glorjarojn
de l' nubvualita vivrivero,
aromo en l' oldkorto jam forsvenas.
Pasinta ĝojo ofte en la songo,
kiel floroj jam falintaj ne revenas.
Mi ĉirkaŭ nun rigardas larmokule,
morna pro perdita pasinteco,
dum pejzaĝoj svag-serenas.
Ofte mi vin kontempladas,
milfoje revokante,
diste mi survoji penas.

De-lontane mi alvenas,
verdas la aromaj herboj,
salikoj flirtas jen tenere,
pluveto la foliojn trenas.
Susurante la printempa brizo
mian humortajdon alten tenas.
Jam delonge ni disiĝis,
en la Festo de Mortintoj*,
vinofero al bluondoj ja solenas.
Banata en krepusko vespersuna,
mi sopiras renkontiĝon tutdediĉe,
kaj elkore vin hodiaŭ benas.

**en la Festo de Mortintoj oni vizitas la tombojn de mortintoj por ilin rememori.*

Eto (Ĉinio)

Ĝui solecon

en mia forlasita domo
tutsola mi meditas
mia penso vagas ien-tien
de ĉielo al la tero
de monto al rivero
mi vizias la knabinon
kiu promenas kun mi
sur la kvieta pado
kiu ĉasas min sur plaĝo
kiu kveras en mia brakumo
kiu firme tenas min je la mano
kiam ŝi estas alnajlita
al la lito je la fina momento
Mia kara edzino ŝi estas
dum kelkdekaj jaroj da kunvivado
malfeliĉe ŝi foriris por ĉiam
eble al la bela loko
kie pompas aromaj floroj
kie riĉas herboj kaj fluoj

mi subite aŭdas
tiktadon de pluvo
ekster la fenestro
kvazaŭ varma duŝo
sub kiu ni petolas
korpo kun korpo nudaj
kun vervo, kun pasio
ŝi ĉirkaŭprenas min
mordetas mian kolon
mi ricevas ŝian alpremon
kaj kisas ŝiajn ŝultrojn
odorantajn je ŝampuo
ŝi stringe ambaŭbrake prenas

mian kolon kaj ŝmace kisas
mian mentonon kaj bruston
mi vere sentas frotadon
de ŝiaj molaj mamoj
kaj mi jam moliĝas
je torso kaj femuroj...

antaŭ miaj okuloj
fluas lirlanta roĵo
kies akveroj ŝprucas
kaj frapas la bordojn
borderitaj de verdaj arbustoj
mia penso vagas
al la plaĝo, kie ni ludas
per akva batalo
ŝi puŝas akvon al mia kapo
kaj mi puŝas rebate
kun ridoj kaj krioj
ni surbordiĝas kaj ĉasas
unu al la alia kapreole
mi kaptas ŝin kaj premas ŝin
sur varmetan sablon
ŝi laŭte krias "helpon!"

tagoj pasas akvflue
mi meditas pri horo post horo
ŝi ĉiam vivas en mia imago
kaj mi akiras konsolon
el la kunesto de ni du
mi ne estas soleca
mi vere ĝuas solecon
en la forlasita domo
ha, pasintaĵoj jam pasis
sed ili nun plenigas
mian vivon kaj igas
mian monotonan vivon
enhavoriĉa kaj vervoplana
mi ne povas forgesi

la neforgeseblajn paseojn
mi ĝuas ilin
en mia celibata vivo

Aŭtuna amo

Tiujare ofte mi kun knabino
ĉe bord' rigardis al la foro.
Zefir' alblovis de l' ravino,
krepusko flosis sur rivero,
kaj l' luno jam aperis kun vang-klino.

En mia rememoro, la aŭtuno
vualis distajn montojn.
Ni staris, rigardante al subira suno,
kun pala lum' de sun' sur nia korpo,
estinta bildo flagris jen en nebulbrumo.

Mi prenis ŝian manon kun amemo,
esprimis mian korinklinon duonvoĉe.
Ŝi klinis sin al mi per korp-alpremo
kaj kisis mian vangon mole kaj mi
ĉirkaŭbrakumis ŝin kun ĝoja tremo.

Jen brulis mia haŭt' ĝisbole,
ŝiaj lipoj longe al la miaj
gluiĝis strikte kaj fervore.
Ekblovis malvarmeta brizo
tra la river' malhela jen defore.

Sed l' am' naskiĝis tre rapide,
ĝi ankaŭ forgalopis tuje.
Mi ŝin atendis kun sincer' avide,
ŝi jame prenis al alia vir' la manon,
foriris de brakumo mia ja perfide.

En pluva vetero

Nebule pluvas
kvazaŭ soleco disvolviĝus.
Ĝi malsekigas mian animstaton.
Vole nevole devas mi iradi
sur kota voj' senhalte
por iluzion de solec' forigi.
Pluveroj gutas sur korpon mian
kaj jam senigas min je trankvileco.
Spite al pluvobatoj kaj nebulfumo
mi klopodadas ja antaŭeniri.
Kvankam malsekas la memoro
en malluma nokto,
mi tamen kortuŝitas
jen de folioj pluv-vipataj.

Mi tristas sola

La nokto tristas
en lamplum' pigrema.
La ridet' disfloras
sur vizaĝoj ĉiuj
kaj forvelkas poste.
Balmuziko skandas ritmon
kaj vipetas mian koron.

Nune mi ekpensas
pri la foraj kampoj.
Panj' akriĝas serpon
kun anksia sentimento.
Paĉj' revenas el la kampoj
kun tolŝuoj malseketaj
de roseroj noktaj.

En mallumon noktan
iras jen mi sola

kun eteraj paŝoj
eskapinte el la bala bruo.
Mia tristo en ĉi-nokto
mincas, travideblas
kaj facile disrompeblas.
Nokta vento friska
ja purigas mian triston.

Sopiro al vi en la foro

Se la urbo estas sen ĉeesto de vi,
ĝi fariĝas jam dezerta.
Arboj en proksim' kaj domoj en la foro
jen elspiras fridon kaj tristecon.
Aŭskultad' al pluva tiktakado
kaj rigardo al folioj falaj
ja elvokas de mi la sopiron al vi,
sed ĉu vi sopiras al mi ankaŭ?

Por forpeli solecon
mi aŭskultas al muziko
per kapaŭdilo.
tamen mi pliigas ĝenojn male
al jam tumultanta menso mia.
Volas mi zorgeme legi libron,
mia koro tamen flugi for
anstataŭ subpremi la sopiron.

La sopir' de unu homo
farbas la sezonon tutan
per malseka la koloro.
Izolitec' similas tason da ebriigaĵo,
la sopiro la kaptilan reton.
En ĉi frostaj tagoj kun flirtanta neĝo
ĉu vi ankoraŭ ja bone fartas
en nebula malproksimo?

Se la viv' estus rivero

Se la viv' estus rivero,
mi ĝin tenus en fluanta viglo
kaj en ĝoja rapidritmo,
kun fidemo al la fino.

Dum fluad' troviĝas
jen neeviteble kurboj,
danĝerplena akvkirliĝoj,
spitu ilin tamen, marŝu.

Kun la temp' ĝi fluu
pace kaj trankvile,
eĉ en minaca ŝtormo
kaj kaŝita kontraŭforto.

Sub ardanta suno
kaj lunlumo friska
ĝi sin rulu ne tro alten
pro ekzalto nekonvena.

Ĉiam kun anim' egala
kaj kvieta ĝi sin tenu
ne aroga nek fiera
dum la tuta kurso.

Jen proksima al la fino
de la viv' ankoraŭ
ĝi trankvile kiel ĉiam
fluu pace sen bedaŭro.

Flageto (Brazilo)



aŭtoro, Flageto

Du Kanttekstoj

Se mi estus...

Se mi estus la vento
 Mi kiskus vian vizaĝon,
 Se mi estus via vizaĝo
 Mi rigardus l horizonton
 Se mi estus la horizonto
 Mi ensorĉus Vin per sunsubiro.

kaj flustrus ĉe vi : mi volas vin.
 Se mi estus la suno
 Mi prilumigus vian vizaĝon
 Se mi estus la horizonto
 Mi mirigus viajn okulojn
 Se mi estus la maro

Mi malsekigus vian korpon
 Sentante min dirante: Mi amas vin.
 Estas mil manieroj diri, ke mi amas vin.
 Sed se nenion vi sentas pri mi, ĉio sonas vane.
 Se miaj vortoj ne tuŝas vian koron
 Ĉio ĉi perdiĝos en la vento, en la tempo.

Geamikoj ne enamiĝas

Geamikoj ne pasiĝas.
Geamikoj ne enamiĝas.
Kial mi sentas vian foreston
Tie ĉi kaj nun?

Iu diris al mi,
Ni estas nur bonaj amikoj,
Ke nenio pli serioza estas inter ni.

Kial do vi lasas min percepti
Ion en viaj okuloj.
Estas en la aero
Ŝajnas amo, flavas kiel amo.

Mi scias, pro amo vi jam suferis,
Kaj ne volas ripeti la saman doloron.

Sed nekutima tenera rigardo,
Kaj tuj amo eniras niajn korojn,
Sed via koro perdis la vojon
Amkaŭ l' amon kiun vi sentis por mi.



Erika Godó (Hungario)



poetino, Erika Godó

Papera mondo

En viaj manoj la papero vivas,
kun ĉiu faldo, nova formo brilas.
Mirakloj naskiĝas, arto ekfloras,
magio, kiun ĉiam homoj adoras.

Papera mondo, imagoj flugas,
birdoj, floroj, en viaj manoj ludas.

Origamio*, arto delikata,
kreitaĵoj vivantaj, ĉiam ŝatata.

La mondo en papero, simpla sed bela,
ĉiuj formoj estas mirindaj kaj afablaj.
Kreu miraklojn, specialajn kaj brilajn,
origamio, arton senliman kaj mildan.
Papera mondo, imagoj flugas,
birdoj, floroj, en viaj manoj ludas.
Origamio, arto delikata,
kreitaĵoj vivantaj, ĉiam ŝatata.
*paperfaldado

La perfekta poemo

La perfekta poemo, kiel stelolumo,
alportas lumon kaj brilas en malluma nokto.
Danco de vortoj, versoj, ritmoj, melodioj,
kiuj penetras ĝis la profundo de mia koro kiel revoj.
Mia imago tekstitas kaj ligitas per sentoj,
ĉiu linio malfermis novan mondon al la leganto.
Bildoj kaj sonoj kiel buntaj sonĝoj kaj sekretoj,
la magio de vortoj estas en senfinaj pensoj.

Kio ni neniam forgesos estas perfektaj poemoj,

vi revivigas ĝin ĉiufoje, kiam vi legas ĝin iam ajn.
Vi vidas la spegulon de via animo, kiam vi legas ĝin,
ĉar viaj sekretoj kaj revoj malkaŝiĝas en la linioj.
Do skribu poemon, vian koron, ne timu malfermi ĝin,
la linioj de la poemoj diras, kion vi sentas kaj pensas.
Perfekta poemo estas unika kaj neripetebla,
ĉar en poezio ĉio estas libera kaj bela.

La maro

Ludas la mola ondo de la maro,
ĝiaj sonoj konserviĝas en helikaj konkoj.
La bluo de la maro estas senfina,
ĝi kunfandiĝas kun la blua ĉielo.
La vento alportas salan odoron de la akvo,
mi povas flari ĝian bongustan freŝan odoron.


Ĝia milda voĉo trankviligas min,
mi aŭdas la sonon de mevoj super ŝaŭmo.
La profundo de la maro kaŝas trezoron,
ĝian sekreton konservas la blankaj rokoj.
Mi rigardas ĝin, mirante, kie finiĝas la maro,
mi estas soleca kiel konko sur la marfundo.

Se mi estus luno

Se mi estus luno sur la ĉielo,
tiel hela en la koro de la nokto.
Mi kovrus ĉion per mia arĝenta lumo,
mi sonĝus la sonĝon de la mondo.
Mi ludus kun la brilantaj steloj,
mi donus al la nokto brilantan vizaĝon.
Mia vizaĝo reflektus sekretojn, rakontojn,
ĉirkaŭprenante la ondojn de la maro.

Mi vidus la dezirojn, kiuj vivas en la koro,
mi rigardus naskiĝojn de amoj en silento.
Mi admirus du animojn dancantaj en la ĉielo,
kiam la lumo de tagiĝo leviĝas.
Mi kaŝus min kiel malnova memoro
sed ĉiu nokte mi denove revenus.
Mi estus kun vi en viaj sonĝoj,
kaj via nokto estus eterna miraklo.

Stanislao M Esposito (Italio)



Lecionoj

La danco de la vivo bonvenigas nin ĉiujn
kaj sur ĝia dancejo ni ĉiuj mispaŝas, ni ĉiuj falas.
Niaj vojoj estas misformataj de eraroj, grandaj kaj malgrandaj,
tamen ĉiu falo, ŝanco leviĝi denove,
lecionoj lernitaj sub la larĝa, malferma ĉielo.

Eraroj, severaj instruistoj sur la vojo de nia vojaĝo,
gvidas nin tra la tordoj kaj turnoj.
En la fendoj, la lumo komencas flui enen,
montrante al ni la vojon al niaj veraj revoj.

Do ni forĵetu niajn juĝojn kaj nian malestimon,
portu kompaton kiel kronon sur niaj kapoj.
En koroj, kiuj eraras kaj doloras, forto kuŝas kaŝita,
ni ĉiuj estas parto de ĉi tiu komuna vojaĝo.

Ni stumblas, ni falas, sed ni denove leviĝas,
en ĉi tiu komuna homaro, ni estas unu.
Kune ni forĝas vojojn tra niaj mispaŝoj,
kaj trovas fortikecon en ĉiuj faloj.

Pardonu la kulpojn, akceptu ĉiun misan momenton,
ĉar en ĉiu animo ni vidas la saman veron.
En niaj eraroj, ni trovas la lumon de amikeco,
en komuna homaro,
ni reflektas tion, kion Amo daŭre kreas.
Ni estas unu:
kun niaj eraroj,
kun niaj elektoj,
unu kun la alia,
kun ni mem.
Ne gravas kio!
Kaj ĉi tio neniam estas eraro.

Flustroj de la Eterna Printempo

En la trankvilaj ĉambroj de la koro, semo moviĝas,
Sopiro estas vi mem, harmonie spirante,
Kun la pulso de ĉio, kio ĉirkaŭas vin,
Trinku de la Fonto, kie la radikoj renkontas la ĉielon.

La mondo turniĝas en sia mantelo de surprizo,
Danco de la neatendita, kie mirakloj okazas,
Kiel tagiĝo trarompanta la vualon de nokto,
Rivelante verojn kaŝitajn en la matena roso.

Kio estas ĉi tiu vivo sed vojaĝo al la interna fonto,
Kie la animo genuiĝas por trinki la akvon de la Ĉielo,
Kaj en tiu hirundo, ĉiuj cikatroj estas forlavitaj,
La vundoj de la tempo kisitaj de la balzamo de la eterneco.

Mi petas Tiun, kiu ĉiam estas la sama,
Kion mi postlasas kiam mi paŝas en la nekonatan?
Kiaj spuroj markos la sablojn de la tempo,
Kiam mi estas nur flustro en la vento?

Vivi estas elekti, decidi, krei,
Vojo de bonfarto kie korpo kaj menso interplektiĝas,
Kie la spirito kreskas, ne en foresto de doloro,

Sed en la forto naskita de cikatroj brakumitaj.


En ĉi tiu ĝardeno de vivo, mi serĉas ligojn,
Kun la homo, la kreita, la dia, la amata,
Ĉar en ĉiu la akvo fluas el la ĉielo,
Kaj en ĉiu, mi trovas la veron, kiu kantas ene.

Ho, esti si mem estas trovi la harmonion,
Kie la notoj de mia estaĵo miksiĝas kun Ĉio,
Kaj kiaj ajn ŝtormoj povas furiozi ĉirkaŭe,
Restas la interna printempo, kvieto, paco, kanto.

Dum mi vojaĝas antaŭen, en la nekonatan lumon,
Ĉu mi portu la aromon de ĉi tiu interna printempo,
Postlasante spuron de amo, de vero, de estaĵo,
Heredaĵo de la Unu, la sama, en la eterna danco.



Sabin Maruhe (DR Kongo)



poeto, Sabin Maruhe

Orfo

Antaŭe, mi travivis feliĉan vivon
 sed nuntempe pro la militoj
 Min turmentas malsato.
 De lundo ĝis sabato
 Mi vivas helppete,
 Mi ŝajnas senhelpa besto
 Mi neniam ĝojas ĉar mi ne havas loĝejon,
 Ne povi viziti lernejon
 Malĝojigas min, vidante aliaj infanojn iri lernejen.

Mia vivo estas en malordo,
 Nevole mi ŝteladas nutraĵojn por pluvivi.
 Sed ni kompatindaj orfoj esperas brilan estontecon!

Paco

Kiam vi malaperis en milito, malsato aperas.
 Ni ploras ĉiam, nia vivo malboniĝas.
 Mankas laboro, kion fari?
 Homoj en tiu ĉi lando mortas!
 Ĉie fluas senkulpa sango!
 PACO, kie vi estas?
 PACO, kiam vi revenos al ĉi tiu lando?
 Ni, kiuj loĝas ĉi tie en la oriento de Kongo, multe
 suferas.
 Niaj koroj estas plenaj je vundoj!
 Kion ni faru?
 Ni deziras PACON!
 Ni ege sopiras al PACO!
 En mallumo kovranta nian landon,
 Ni esperas, ke la paco regos iam en la mondo.

Rovere Emanüele (Italio)



Kvin tradukitaj kanttekstoj

tradukinto, Rovere Emanüele

Kvazaŭ kolombo blanka

Muziko / vortoj: G.Baker

Mi vekigās frumatene je l'aŭroro en ĉiel', bonvenigas
ĝojplene tagon sub la bona stel'.

Kelkaj birdoj jam ekpepas, dum de floroj la parfum'
min karesas kaj anoncas
la revenon de la sun'.

Kvazaŭ kolombo blanka, flugas mi super kampar'.
Kvazaŭ kolombo blanka, preter la montoj kaj mar',
kun mia esper', kun mia liber'.

Mi imagas, ke mi flugas en vojaĝ' de poezi',
vidas mi la tutan mondon per mirakla fantazi'.

Kvazaŭ kolombo blanka, flugas mi super kampar'.
Kvazaŭ kolombo blanka, preter la montoj kaj mar',
kun mia esper', kun mia liber'.

Enkaĝigi oni provis, vane, la spiriton mian,
sed ĝi ĉiam ĉenojn rompīs, savīs la liberon sian.

Kvazaŭ kolombo blanka, flugas mi super kampar'.
Kvazaŭ kolombo blanka, preter la montoj kaj mar',

kun mia esper', kun mia liber'.

Dankas mi la vivon

Muziko / vortoj: Violeta Parra

Dankas mi la vivon, ĝi donis al mi multon:
miajn du okulojn, per kiuj ja mi povas
perfekte distingi la nigron de la blanko,
sur la ĉiela volbo, la stelaron brilan
kaj, en homamasoj, l' amatinon mian.

Dankas mi la vivon, ĝi donis al mi multon:
la aŭdadon viglan, per kiu mi perceptas,
dumtage, dumnokte, la kanton de birdetoj,
kaj bruojn de marteloj, fulmoj, hundaj bojoj
kaj la dolĉajn voĉojn de l' amatoj miaj.

Dankas mi la vivon, ĝi donis al mi multon:
eblon por paroli kaj uzi la vortaron.
Do, mi povas diri la pensojn kaj la sentojn
kaj vortojn, kiajn "panjo, paĉjo, frato, amiko"
kaj la amon mian por la tuta mondo.

Dankas mi la vivon, ĝi donis al mi multon:
ĉi piedojn lacajn per kiuj mi transpasis
vilaĝojn kaj urbojn, dezertojn, plaĝojn, montojn,
arbarojn, ebenaĵojn, marĉojn, valojn, torentojn
ĝis la loko kie estas via hejmo.

Dankas mi la vivon, ĝi donis al mi multon:
la inteligenton, per kiu mi komprenas
la homan sciencan per ĉi sentema koro
kapabla apartigi l' bonon de l' malbono
kaj elkovri amon en rigardoj ajnaj.

Dankas mi la vivon, ĝi donis al mi multon:
la rideton dolĉan, la ploron dolorigan,
la kanton per kiu esprimas mi la ĝojon
kaj mia kanto sonas kiel ĉies kanto

kaj ĉies kanto sonas kiel mia kanto
kaj ĉi kanto iĝas de ni ĉiuj la danko.

Fremdaj en la nokto

Muziko / vortoj: B. Kaempfert / C. Singleton/E. Snyder

Fremdaj en la nokt'
ni, per rigardoj, mienis en la nokt'
laŭ la espero,
ke kunestos ni antaŭ la noktofin'.
En l'okuloj viaj io invita,
la rideto via tiel ekscita
kaj en mia kor' granda dezir' de vi.

Fremdaj en la nokt',
animoj solaj ni, nur fremdaj en la nokt'
ĝis la moment' de nia plej frua rigard',
ĉu jam konis ni? Amo estis febla ŝanco
en komplika, varma danco

sed, en tiu nokt',
amantoj iĝis ni post unu vid',
enamiĝintoj restos por la viv',
amikoj en la nokt'.

Padeto

Muziko / vortoj: M. Gabino Gorla Penalosa / Juan De Dios Filiberto

“Caminito”, padeto laŭ kiu promeni kutimis ni mano en man',
nun mi venas je la lasta foj' por rakonti pri mia malĝoj'.
“Caminito”, vi tiam parfumis de falĉitaj herboj kaj junkoj en flor',
baldaŭ iĝos mi ombro kaj nur de vi restos paliĝanta spur'.

Depost ŝia forir', mi vivas en dolor.'
“Caminito” amika, ankaŭ mi iros for.
Ŝi forlasis min kaj ne revenos plu.
Mi sekvos ŝiajn paŝojn: “Caminito”, adiaŭ!

“Caminito” mi ĉiun vesperon feliĉa laŭiris vin kun amosent':

se hazarde ŝi tie repasos, vi al ŝi, ke mi ploris ne diros.

“Caminito” la dornaj rubusoj permane de l’tempo jam nun kaŝis vin.
Volus fali mi ĉe l’via rando kaj forviŝos la temp’ ankaŭ min.

Depost ŝia forir’, mi vivas en dolor’.

“Caminito” amika, ankaŭ mi iros for.

Ŝi forlasis min kaj ne revenos plu.

Mi sekvos ŝiajn paŝojn: “Caminito” adiaŭ!

Ĉieito linda

Muziko / vortoj: Querino Mendoza y Cortes

El la Sierra Morena “Ĉieito linda” nun venas kanto,
jen du okuloj nigraj “Ĉieito linda” de kontrabando.
La muŝon, kiun portas “Ĉieito linda” vi, ĉe la buŝo,
al iu ajn ne donu “Ĉieito linda” por mi ĝin tenu.

Aj, aj, aj, aj kantu ne ploru.

Ĉar, se vi kantas, ĝojigas “Ĉieito linda” vi ĉiujn korojn.

La birdo, kiu lasis “Ĉieito linda” la neston sian,
se trovos ĝin loĝita “Ĉieito linda” pun’ meritita.
Via hejm’ el la mia “Ĉieito linda” distancas paŝon,
kiam mi solas, donu “Ĉieito linda” vi ĉirkaŭbrakon.

Aj, aj, aj, aj kantu ne ploru.

Ĉar, se vi kantas, ĝojigas “Ĉieito linda” vi ĉiujn korojn.

Sagon en la aeron “Ĉieito linda” Cupido lanĉis
kaj, kia stranga fato “Ĉieito linda” jen min li trafis.
El la Sierra Morena “Ĉieito linda” nun venas kanto,
jen du okuloj nigraj “Ĉieito linda” de kontrabando.

Aj, aj, aj, aj kantu ne ploru.

Ĉar, se vi kantas, ĝojigas “Ĉieito linda” vi ĉiujn korojn.

Xue Fenggu (Ĉinio)



poeto, Xue Fenggu

La luno

Luno, luno,
via nomo estas tre ronda
tre brila

Ĉiufoje, kiam mi rigardas supren al vi,
mi vidas en sonĝo unu figuron
kaj memoras la orelingojn ĉe la kolo
ruliĝantaj kun la tempo
Manon en mano, korpon ĉe korpo,
mi kaj ŝi restis apud akvo
kalkulante plenajn stelojn surĉielajn
rigardante ke boato el magnolia ligno
remas tien kaj ĉi tien
ke fiŝboataj lampoj lumas plene
sur la Ĉiela Rivero
kaj ke en disiĝa melodio sur la kordoj
onde tremas la ombro de remiloj

Ho, luno,
ĉu ankaŭ vi timas venton
Kiam la vento sovaĝas,
la nuboj do fuŝvingiĝas
Ĉi-monda vento el klaĉoj
strangas eĉ pli ol tiu de la Ĉiela Domo
unue ruliĝas enen el ekstere de la urburo
poste forkuras eksteren el ene
murmurante senlace
sentime pri onia mokado
ke apopleksio trafus la langon

De urba interno al ĝia ekstero
de urba ekstero al ĝia interno

ho, luno, vi staras alte
 kun frapanta koncepto
 Vi diru tiel laŭte
 kiel gongo sonas
 al tiuj kiuj fanatike blovas venton
 ke eĉ ŝtormo ne povas forblovi
 tion kion oni plej amas
 La ĉielo plena je ventoj kaj pluvoj
 kiomfoje povus bari la flugilojn
 sopirantajn al libera flugado

Zhu Huang (Ĉinio)



poetino, Zhu Huang

Surtera paradizo

Ni iru sur la bordon de lago
 kies nomo ne certe estas Walden
 Ĉe ĝi, kun iu ajn nomo,
 tamen nepre estu eta lignkabano
 simple meblita kaj evidente sopra
 kiu povas enteni du personojn

La matura grizo de la tegoloj kaj muroj
 same kiel solena signo
 kontrastas kun nia natureco
 Kion planti ĉe bordo de la lago
 kaj kiel instali vestlavejon kaj ludejon
 ĉio tio do devas havi tian nuancon
 kia konformas al la kabano

La arboj ĉe la kabano vegetu senkulturaj
 kun primitiva kaj antikva simpleco
 Nepre pendu hamakon por akcepti sunon
 kaj kiam pluvas
 eblas ĝin repreni kaj faldi ĉelite

Ĉe la vespero de la vivo
 ĉio devas esti farita kiel eble plej simple

Unu fajrilo, unu forno,
kaj sekaj branĉoj kolektitaj inter arboj
jam sufiĉas por arda fajro

Kiam pluvas – vi pli altas ol mi –
do via vesto iĝu mia ombrelo
kaj via temperaturo mia varmo

Tagiĝas, kiam vi ovras la unua la pordon,
ĉar mi ŝatas en knarado malfermi miajn okulojn
vidante vian dorson banatan en matena nebulo

Inter la arboj
ni ambaŭ havas po malgrandan parcelon
Kion ajn, ĉu sunon, ĉu lunon, vi plantas,
tio ne koncernas min
Sed mi persiste kulturis nutroplantojn
ĉar sen ili la homo ne povas vivi

Ne eblas teni katon kaj hundon,
ĉar ili dividas nian amon
kaj forrabas la tempon karan por ni

Ĉi tie mi deziras nur flegi poezion
ke ŝi grandiĝu kaj estu svelta kaj gracia
Ŝian nomon vi prenu
kaj ŝi ja estas nia infano

Kiam ni maljuniĝas kaj nmoveblas
ni, dorse unu al la alia, atendas la morton
Ni petas ke la vesperruĝo nin entombigu
tie inter la parceloj



elĉinigiŝ Minosun (Ĉinio)

Mao Zedong (1893-1976)



Mao Zedong

Neĝo

—laŭ melodio *Printempo en la ĝardeno Qin*
 Pejzaĝo en nordlando:
 glacio ŝlosas teron jen je lioj dekmil,
 neĝflokaj flirtas super vasta spaco.
 Cis kaj trans Granda Muro, en zefir'
 nebulo flosas disen en aero.
 Torenti la rivero ĉesis, jame ĝis trankvil'.

Montĉeno ŝajnas la arĝent-serpentoj,
 kaj l' ebenaj' similas vakso-elefantojn en lant-ir',
 strebantajn alten ĝis ĉielo en konkuro.
 En tag' sunplena jen kun varma spir',
 vestita blanke kun ornamo ruĝa,
 la panoramo ĉarmas des pli en bunt-bril'.

Tiele montoj kaj l' rivero belas,
 herooj multaj klinis sin antaŭ ili jen kun ador'.
 Sed tamen al Qin Shihuang¹ kaj Han Wudi²
 iome mankis lerto en beletra ellabor';
 Tang Taizhong³ kaj Song Taizu⁴
 lametis en versad' pro mensa torpor';
 kaj Ĝingis-Ĥano nur scipovis
 arkpafi aglojn jen laŭ sia vol'.
 Bravuloj la tiamaj ĉiuj ja forpasis!
 Nur inter popolanoj oni trovas
 heroojn verajn kun la inda glori'.

notoj:

1. *Qin Shihuang (259-210 a.K.): la unua imperiestro de Qin-dinastio.*
2. *Han Wudi (157-87 a. K.): imperiestro de Han-dinastio.*
3. *Tang Taizhong (599-649): imperiestro de Tang-dinastio.*
4. *Song Taizu (927-976): fondinto-imperiestro de Song-dinastio.*

elĉinigi **Ven Don**

Guan Hanqing (ĉ. 1220-ĉ. 1300)



Qu-poemoj (ĉju-poemoj) estas ĝenro el la poezio, kiu fororis dum la Yuan-dinastio (jŭan-dinastio) de Ĉinio. Por verki tiajn poemojn oni devas sekvi la postulojn de la poemoj en silabnombro, tonaloj, rimado k.a. La skemoj de Qu-poemoj nomiĝas "melodioj". Tiuepoke Qu-poemoj inkludas dramojn. Guan Hanqing (gŭan hanĉing) estas fama dramaturgo en la Yuan-dinastio. Jenaj estas liaj Qu-poemoj.

poeto, Guan Hanqing

Ĉe disiĝo

—laŭ melodio *Kvar pecoj de jado*

De kiam vi forlasis,
mi kovas senton de sopiro.
Ĝis kiu tag' finiĝos mia splen'?
Min apogante sur la parapeton kun suspiro,
mi banas min en neĝofloka karesplen'.
La rivereto etendiĝas en sinua iro,
la monto baras mian vidon jen per ĝen',
sed vi jam foras, mia viro!

—laŭ melodio *Blanka Gruo*

1.

Printempo estas la sezono plej valora,
Alkoholaj' instigas ĝojon plej al fundo kora.
Lagakvo bluas kiel indig-planto,
la floroj okulplaĉas kiel brilanta rubando.

2.

Stalonoj staras ĉe florbedo,

boatoj jen ligitas ĉe salika arbpiedo.
Sur lag' boatoj jen kaj jen navedas,
ĉe lag' ĉevaloj ir-reire galopetas.

3.

Birdoj pepas sub la ombr' de floroj,
staras homoj ĉe kalkita mur' dum horoj.
Ili ĉiuj ja baniĝas en printempa la aero,
la okuloj homaj rojas kun aŭtuna belo.

4.

Incenso brulas en anasoforma ujo ora,
mi staras senfareme ĉe dometo ruĝkolora.
La luno pendas alte super salikpintoj
amantaj paroj rendezuas en krepuskaj vindaĵoj.

Senokupa tempo

—laŭ melodio *Kvar pecoj de jado*

1.

Se vi volas paŝi,
paŝu kun libero;
se vi volas sidi,
sidu sen konsidero;
kiam vi soifas,
trinku el sitelo;
kiam vi malsatas,
manĝu per telero;
kiam vi ebrias,
kantu laŭ prefero;
kiam vi dormemas,
kuŝu sur herboza tero.
Lun' kaj sun' eterne brilas,
vastas tero kaj ĉielo.
Kiel ni plezure vivas kun leĝero!

2.

Malnova vino distilita jam refoje

kaj nova vin' nun ankaŭ pretas.
Ĉirkaŭ vin-urn' argila ĉiuj ĝoje
ridegas, babilante kun maljuna vilaĝano
kaj taŭisto-pastor' ĉevoje.
Unu oferis kokon kaj l' alia
anseron jen por fari pladojn kune.
Kian plezuran vivon ili havas nune!

3.

Haltigu ĉeval-galopantan penson
kaj ŝlosu simieskan cerbon nun kun fantazio.
Vin liberigu de la furiozaj ondoj
en homa mondo plena je bizara iluzio.
Vekiĝu el tagmeza sonĝo bela!
Forlasu l' rondon de famĉasa sen racio,
ŝoviĝu en komfortan neston propran.
Kiel plezuran vivon jen vi ĝuu sen anksio!

4.

Mi iam plugis sudan kampon
kaj kuŝis sur la monton en la oriento.
Mi spertis multon de la homa mondo
kaj ankaŭ pensis pri paseoj en silento.
Li estas saĝa
dum mi ja stultas sen talento.
Kian signifon tio donas,
se mi konkurus suferante de turmento?

Adiaŭado

—laŭ melodio *Ebria en orienta vento*

Kvankam ni nun estas vid-al-vidaj,
vi foriros tuj al dista foro.
Dum momento floroj velkus
kaj la lun' malkreskus sen lumgloro.
Por adiaŭ diri ni vin-tason tenas,
niaj larmoj plenas en okuloj en ĉi horo.
Kiam mi ĵus diris: “Zorgu vian sanon!”,

mi ekhavas domaĝemon en la koro.
“Iru do por via brila perspektivo!”
mi nur povas diri kun doloro.

—**laŭ melodio *Kanto pri granda virto***

1. Printempe

Kukolo pepas,
kriante ŝajne “Vi revenu, venu do!”
Vi ĉe disiĝo diris, ke printempe
vi ja revenos, sed vi ne ankoraŭ en ĉi minuto.
Dum tagoj mi jam magras multe
malforta kiel salikfloko en flirtanta ludo.
De vi mi ricevis neniun mesaĝon,
mi vidas, ke konstruas neston hirundpar’ per kotoŝuto.

2. Somere

Amata mia, li restadas en la foro,
kial li ĉiam ligas la ĉevalon al saliko tie?
Inertas mi ĉe la fenestro suda pigre
kaj mi min banas en biz’ sopirante lin anksie.
Do, kiu povus pentri brovojn por mi,
kiam senkoloriĝas ili ĝis paliĝo plie?
Mi hontas eĉ surporti granatflorojn sur hararo,
ĉar mi skelete magras ja konscie.

3. Aŭtune

Vento blovas kun susuro,
pluvo flirtas en leĝero.
Mi ne povas endormiĝi
eĉ sub la favoro de Ĉielo.
La ĉagreno en la sin’ min igas
larmi kiel fluo de rivero.
Ĉirp’ de griloj kaj cikadoj, kaj pluvbatoj
sur la bananujoj pli min ĝenas per sufero.

4. Vintre

Neĝo dense flirtas,
kovras kelkajn pordojn peze.
Tio rompas mian koron

en la magra korp' agrese.
Kie estas la vilaĝo lia?
Mi ne povas nun distingi klare.
Min neniu venas zorgi buduare,
Kia minca povrulin' mi estas
nur apoge al la parapeto por vidi senfare!

—**laŭ melodio *Fluto el smeralda jado***

1.

kun la liuto sur genuoj miaj
mi pensas pri amato mia en la foro.
Sub delikataj fingroj
la kordoj vibras ja leĝere kun sonoro.
Ĉe la fenestro luno brile lumas;
tra parapeto ŝvebas la aer' de molo.
Malpezaj tuŝoj miaj sur liuto
instigas min al versoskriba la fervoro.
Aŭskultu!
Klepsidro jam malplenas,
silento nokta regas en ĉi horo.

2.

Ni ofte renkontiĝas
kaj drinkas en festeno,
sed ni ne havas ŝancon kuŝi
en sama lit' kun litkovrilo kaj kapkuseno.
Ĉe floroj aŭ sub salikarbo
mi kantis kaj vi versis multajn jarojn jen sen ĝeno.
Ĉu povus mi malkovri tion al aliaj?
Mi preĝas en la kor' nur al ĉiel-edeno.
Ni havas firman volon de amsento
sed vid-al-vidas tage ni en van' kun ĝemo.
Ĉielo, ho ve!
Dum nia viv', en kiu tago ni fariĝos
la edzo kaj edzino en feliĉa pleno?

1. Ne diru, ke mi maljuniĝas

—laŭ melodio *Branĉo da floroj*

Mi plukas florojn trans mursupro
kaj salikbranĉojn ĉe la voj' deŝire.
pistiloj ruĝaj de la floroj delikatas
kaj salikbranĉoj molas jen gracile.
Galanta kiel mi, per mano mia,
mi plukas florojn kaj deŝiras branĉojn ja facile,
kaj mi turmentas ilin ĝis velkiĝo kaj ĉifiĝo.
Dum la duono de mia vivo
mi plukas kaj deŝiras florojn malhumile,
mi ankaŭ ŝatas dormi kune
kun floroj kaj salikvergetoj laŭdezire.

2. —laŭ melodio *Kanto pri batalkampoj*

Mi estas la amindumant' plej granda sub la ĉielo,
kaj l' estr' de dandoj en la mondo.
Mi volas, ke neniuj vangoj perdu en nia rondo
rozruĝan la koloron kun saneca belo.
Mi min amuzas inter floroj kun prefero,
ĉagrenon mi forlavas per alkohol-fluo.
Kun teo-tas' en man' mi vetas per jetonoj el bambuo,
kaj hazardludas pri la ĉevalkur' kaj lot-mistero.
Mi lertas pri diversaj tonoj kaj tonaloj ja en muziksfero.
Kiel mi povus kovi ĝenojn en la koro?
Min akompanas la liutistino bela kiel floro,
ludante la liuton ĉe arĝenta ekranego per son-ŝvelo.
Ŝultro-ĉe-ŝultre, man-en-mane, kun fiero,
mi kun feina la reĝin' ascendas turon jen el jado.
La kantistin' surportas orajn haropinglojn por parado,
kun ora tas' en mano kantas pri vestaĵoj oraj en opero.
Vi diras, ke mi maljuniĝas, devas mi emeritiĝi ja sen espero,
sed mi elstaras la unua en aminduma la areno,
kaj pli kaj pli fariĝas lerta kaj senbrida sen kateno.
Nun mi la ĉefo estas inter floroj de volupt-leĝero,
irante de domego al domego' laŭvole kun libero.

3. —laŭ melodio *Interludo*

Amindumantoj junaj ŝajnas la leporoj
 ĵus naskiĝintaj en sabloza nesto, kiuj vere
 kuraĝas iri al la ĉasopark' imperiestra,
 dum mi similas al fazan' maljuna, plensufere
 jam eskapinte el kaptil' kaj reto.

Mi kuras kiel galopanta la ĉevalo, enaere
 je alta rapideco supertere.

Evitis mi kaŝitajn sagojn kaj lancpinton feran
 kaj mi atingas nun mezaĝon tempopele.

Ne diru "Ĉio de mezaĝo jam finiĝis!",
 mi kompreneble ja ne vivas vane kaj leĝere.

4. —laŭ melodio *Epilogo*

Mi estas ja tintanta bronza pizo,
 kiu ne povas esti jen vaporumita mola,
 nek kuirita bone, nek marteles platigita,
 nek kirl-fritita ĝis la eksplodiĝ' disflora.

Kiel vi junaj amajistoj povas vin enŝovi
 en kaptil-reton, kiu povas esti ne ŝpatita bate,
 nek elnodita, nek liberigita malrapide?

Mi ĝuas en ĝardeno reĝa l' lunon sate,
 mi drinkas bonkvalitan vinon de la orienta urbo,
 kaj mi aprecas famajn peoniojn nure,
 kaj amindumas kun putinoj en bordelo.

Mi ankaŭ lertas en go-ludo senmezure,
 kaj en piedpilkad', ĉasad', gagado,
 kantado kaj dancado, liutlud' kaj plie,
 en vers-ĉantad' kaj hazardludo.

Vi povus batfaliĝi mian denton jen defie,
 aŭ malrektigi mian buŝon,
 lamigi mian piedon

disrompi mian manon sen kompatato.

Mi tamen firme tenas min senŝanĝa
 sed mi neniel cedas eĉ sub sortobato,
 krom se la Reĝo de Infero aŭ l' demono
 alvokus min al la morto.

Kiam triono da animo irus al Infero
 kaj aliaj du trionoj al malluma limba korto,
 Ho, la Ĉiel'! nur tiam mi ne plu direktiĝus
 al la amindumejo por diboĉa la komforto.

elĉinigiŝ Mu Ke (Ĉinio)

Anonima

Ostaĝo

Roluloj:

Rabinto (R)

Suicidonto (S)

Policano (P)

Sceno:

sur plata tegmento

R: Kiu?

S: Aĥ!

R: Ne movu vin. Mi estas rabinto. Mi ĵus rabis monon. Pardonon al mi, frato. Mi volas vin ĝeni, ke vi servas kiel mia ostaĝo.

S: Se vi ne haltigus min antaŭ momento, mi jam frue saltus malsupren el la tegmento. Vi retenas min, sed ne pafas min. Mi povas fari nenion alian ol salti malsupren denove.



R: Ĉu vi volas vin mortigi? Vi ne povas morti nun. Vi devas defendi min kiel ostaĝo.

Alvenu. Vi homoj sube de la domo, mi havas ostaĝon en la mano. Se iu venos supren, mi pafmortigos lin.

S: Rapide supreniru. Se vi ne suprenirus, vi ne estas kalkulata kiel brava policano.

P: Vi jam estas sieĝataj. Tuj fordonu pistolon kaj kapitulacu.

R: Al diabloj! Mi diru al vi, ke se iu vere suprenvenos, mi pafmortigos lin.

S: Tuj suprenvenu, tiel ke vi povos fari meriton.

R: Mi diras al vi, ke se iu vere kuraĝas...

S forkaptas la pistolon.

R: Ah, frato!

S: Ne moviĝu!

R: Frato, vi ne povas morti.

S: Retropaŝu.

R: Hej, frato, kvietiĝu, frato.

S: Mi scias. ke vi tre timas mian morton. Ĉar mi mortos, vi ne havos ostaĝon, ĉu? Fakte morto ne estas timinda. Eble tiu ĉi pistolo mortigos min pli rekte.

R: Hej, frato, ni povas havi diskuton pri la afero. Kial vi nepre mortigos vin?

S: Mortigi min? Ne estas mi, kiu volas mortigi min. Ne eblas por mi eviti memmortigon. Ĉu vi scias? Hieraŭ mi perdis dudek mil juanojn en la hazardludejo. Ĝi estas publika kaso! En la lasta partio, kiam la ĵetkuboj ĵetiĝis en la aeron, miliono da juanoj stakiĝis antaŭ mi. Jen unu miliono da juanoj! Ĉu vi scias, kiom estas la miliono da juanoj? Tiom granda amaso da mono... Vi neniel povas perlabori tiom dum via tuta vivo. Sed kiam la ĵetkuboj falis, mi perdis ĉiom. Kiel mi havus vizaĝon antaŭ miaj familianoj kaj antaŭ mia estro! Ĉu vi scias, kiaspeca homo estas mia estro? Lastfoje, kiam mi miskalkulis la kontojn je unu juano, li eĉ volis por puno, ke mi petu pardonon antaŭ la tuta personaro unu post la alia. Ili ĉiuj primokis min kaj malestimis min. Kial? Ĝuste pro tio, ke mi diable miskalkulis je nur unu juano kaj plie je unu plia juano. Starigu vin!

R: Bone, mi min starigu, frato.

S: Riverencu al mi, profunde, kaj diru, "Mi estas kulpa." Ne, diru, "Estro, mi kulpas." Diru cent fojojn.

R: Estro, mi kulpas, estro, mi kulpas...

S: Hahaha, sufiĉe!

R: Frato, vi devas havi sobran menson. Pripensu, ke vi havas edzinon kaj infanon en la hejmo.

S: Vinprenu diabloj. Ne menciu mian edzinon. Ŝi tute ne prenas min en siajn okulojn. Kiam mi faris viziton al mia bopatrino, neniu alportis tason da akvo al mi. Kial? Ĝuste pro tio, ke mi estas malriĉa kaj malhavas monon, ĉu ne? (*Telefono sonas.*) Ha lo, ĉu vi, mia karulino, parolas? Mi nun staras sur la tegmento de la domo

nemalproksima al la marbordo. Nu, ĉu vi scias, ke la maro estas tiel blua hodiaŭ, ke mi eĉ volas salti malsupren. Kie vi troviĝas, kara? Ho, ne klarigu! Mi divenas, ke vi certe kunas kun sinjoro Dameng. Mi diru al vi, kara, ke de hodiaŭ vi ambaŭ rendevuu ne plu en sekreto. Kio? Divorco? Bone..., ni divorcu, divorcu, di...vorcu! (forte forĵetas la telefonilon.)

R: Frato, ĉu nenio okazas al vi?

S: Jen mia edzino kondukas tiamaniere kontraŭ mi. Se ŝi traktus min iom bone, eĉ iomete!

R: Frato.

S: Pafmortigu min. (*donas pistolon al li.*)

R: Ne, ne, ne.

S: Prenu ĝin.

R: Ĉu vi diable volas morti? Nun vi ne povas morti, ĉar mi damne ne volas morti. Vi devas vivi bone por mi kaj servas kiel ostaĝo por mi. (ligas S per koltuko.) Morti? Ne tiom facile. Vi volas morti, sed mi nepre ne volas, ke vi mortu, ĉar mi ankoraŭ ne volas diable morti. Ĉu vi konsideras, ke vi estas malbonŝanca? Diable, mi estas multe pli malbonŝanca ol vi. Nun mi estas rab-krimulo kaj estas persekutata. Ankaŭ mi havis revon, ankaŭ mi faris klopodojn. Mi servis kiel soldato ok jarojn nur por atingi malgrandan celon: akiri unu sidilon en la armea akademio. Sed tiu ĉi sidilon de mi uzurpis la filo de la estro de la defenda trupo, kie mi servis. Mi estis tre malbonŝanca, ĉu ne? La trupo min malmobilizis kaj mi obeis. Mi fiŝistis en Hokajdo, kolektis forĵetaĵojn en Tokio kaj laboris kiel dungito en Osako. Mi faris ĉiuspecajn suferigajn kaj penigajn laborojn. Sed ĉu mi ekhavis ŝancon? Mi ne ekhavis. La ŝanco estas pretigita por la homoj, kia vi. Vi nur etendas la manon por vestoj kaj malfermas buŝon por atendi manĝon, kaj fekas eĉ sidante! Frato, mi ne volas kaŝi la fakton, ke mi eĉ ne tuŝis la manon de knabino dum mia pasinta vivo. (*S eksplodas per ridoj.*) Ridu kaj ridu plu.

S: Se vi volas min piedbati, piedbatu min ĝis la morto!

R: Kio estas malbonŝanco, kio estas malbonŝanco? Mi kaptas ostaĝon tre malfacile, sed li tamen diable estas la homo, kiu ne timas morton. Mi mortigu vin per unu pafado, mi mortigu vin per unu pafado!

S: Tuj pafu do. Ne diru sensencaĵon!

R (*genuiĝas*): Frato, mi ne povis fari alion ol rabi ŝian monon. Mi estas ankoraŭ tre juna kaj ne volas morti. Frato, mi petas, ke vi savu min.

S: Mono? Kie troviĝas la mono?

R: Aĥ, ĉi tie. Vidu. Ĉi tio estas rabita de mi.

S: Haha, sufiĉas.

R: Ho, frato, finita, finita...Mi volis rabi unu dekmilon aŭ du dekmilojn da juanoj.

Tiom da mono rabita de mi igas, ke mi estos kondamnita al morto!

S: Malligu min! Diable, malligu min.

R: Se mi malligos vin, mi devos min helpi.

S: Ne babilaĉu! Malligu!

R: Finita. Mi estas ankoraŭ tre juna kaj ne volas morti. Kion mi faru pri tiom da mono?

S: Kiom da mono vi donos al mi, se mi servas kiel via ostaĝo?

R: Mi donos al vi trionon de ĉi mono.

S: Mi volas tri kvaronojn.

R: Mi donos al vi duonon.

S: Mi ja volas tri kvaronojn.

R: Nu duonon. (*S volas salti malsupren de la tegmento.*) Frato, se vi ne volas morti, mi donos tiom kiom vi volas.

S: Mi ja volas tri kvaronojn.

R: Jen vi insistas malsanece.

P: Atentu vi homoj sur la tegmento. Tenu vin kvietaj...

R: Aj! Ja multas policianoj ĉi-sube. Kion mi faru? Finita, finita...

S: Ligu vin mem.

R (*ploras*): Mi estas ankoraŭ tre juna kaj ne volas morti...

S: Ligu vin mem. Vi estas lerta ligi min bone, ĉu ne? (*S ligas R-n.*)

R: Ho, kion vi faras? Bone, vi ligas min kaj mi servas kiel via ostaĝo. Tuj montru mian kapon per la pistolo, tre forte.

S: Ni diru al ili, kion ni volas.

R: Ni postulas veturilon.

S: Kion ni volas?

R: Flugmaŝinon! Ĝi kuras plej rapide.

S (*volas kria*): Ĉu vi povas stiri ĝin?

R: Kiel mi povus stiri tiun umon!

S: Diable! Ankaŭ mi ne povas!

R: Do do do, ni volas aŭton. Benz-aŭto estas bona.

S: BMW-aŭto estas bona.

*Samtempe ili ambaŭ krias malsupren respektive "Benz-aŭto" kaj "BMW-aŭto".
Kiam ili du rigardas unu la alian, ili kune krias, "Ni volas Toyota-aŭton."*

S: Malprave. Diable, kial vi krias? Vi estas ostaĝo.

R: Prave, prave. Mi estas ostaĝo. Frato, voku, ke ili provizu la aŭton plene per benzino.

S: Kie ili parku la aŭton post ties plenigo de benzino?

R: Ĉe la flanko pordo, kie malmultas policianoj.

S: Parku la aŭton ĉe la flanko pordo, kie malmultas policanoj.

R: Vin prenu diabloj. Kial vi diris tion al ili?

P: Atentu, la homo sur la tegmento. Bonvole tenu vin trankvila. Ni plejble kontentigos vian postulon. Bonvole ne vundu la ostaĝon.

R: Frato, li konsente respondis.

S: Vi pririgardu kaj mi iras meti monon en sakon.

R: Frato, la aŭto alvenas. Ĉu ni povas eliri laŭ via opinio? Ĉu vi jam finas ensakigon de mono? Rapidu.

S: Al diabloj! Ĉiuj monbiletoj estas falsaj!

R: Kio? Neeble. Malligu min. (*pririgardas la monbiletojn.*)

S: Ĉiuj falsaj monbiletoj!

Ili ambaŭ ridegas.

R: Haha, falsaj! Mi donu al vi trionon.

S: Haha, tri kvaronojn.

R: Duonon.

S (*disĵetas monbiletojn en aeron*): Duonon, hahahaha, duonon...

R: Hahahaha... Frato, jen vidu. Tiu policano ŝovas monbiletojn en la poŝon.

S: Jen mi donu al vi ĉiujn monbiletojn falsajn (*ĵetas la sakon*).

La tuta scenejo dronas en silento.

R: Frato, kion ni faru do?

S: Laŭ mi, vi preferu vin denunci al la polico. Eble vi ekhavigos al vi iom da espero.

R: Frato, ĉu ni povos eliri vivaj hodiaŭ? Se mi povos eliri viva, mi volas ŝanĝi la vivon por la alia kaj perlabori multe kaj multe da mono. (*S saltas malsupren de la tegmento.*) Frato, fakte ĉi mondo ne aspektas kiel vi imagas kaj en ĝi troviĝas multege da bonaj homoj...(*returninte la kapon, ne vidas S.*) Ho, ne, frato, frato...

(La kurteno falas.)

reverkis **Viktoro Mu** (*Ĉinio*)

Rafael Henrique Zerbeto (Brazilo)



Pekina Biblioteko: Bela, konvena kaj altteknika!

Inaŭgurita antaŭ kelkaj monatoj en la distrikto Tongzhou de Pekino, Pekina Biblioteko tuj famiĝis pro sia bela arkitekturo kaj ankaŭ pri la fakto, ke ĝi estas saĝa biblioteko. Dum vizito al ĝi, oni sentas sin en biblioteko ne de nia epoko, sed de la estonteco.



Rigardo de la bela arkitekturo de la biblioteko

Jen la unua surprizo en la biblioteko: ĉe la pordo, ekster la biblioteko, estis robota biblioteko, kiu kapablas iri tra la apuda parko por pli konvene provizi librojn al homoj. La kvanto da libroj disponeblaj ne estas granda, sed la ideo de movebla

biblioteko, kiu iras al la homoj, estas tre bona por kontentigi la bazajn bezonojn de ordinaraj legantoj.

Por pruntepreni libron, oni bezonas sekvi instrukciojn sur tuŝekrano. La unua paŝo estas krei konton aŭ ensaluti, kaj por tio necesas uzi ĉinan nacian identigilon, kio malebligas al preskaŭ ĉiuj eksterlandanoj en Ĉinio la uzon de tiu servo. Sed la funkciado estas intuicia: oni elektas la deziratan libron kaj la maŝino pruntedonas ĝin.

Enirinte la bibliotekon, oni tuj surpriziĝas pri ĝia bela arkitekturo. Unue oni rimarkas la tegmenton, kio konsistas el aro da platoj, ĉiu en la formo de ginkofolio. Kune kun maldikaj kaj altaj kolonoj, ili kreas la impreson, ke la biblioteko troviĝas sub alta ginkoarbato.

Laŭ fakula klarigo, tiuj folioj estas speciale planitaj por la akustiko de la biblioteko. Cetere, atenta rigardo al la folioj montras, ke sur ili estis instalitaj lampoj, kameraoj kaj sekurecaj aparatoj kontraŭ incendio. La lumigo de la konstruaĵo ŝanĝiĝas laŭ lumo de la tago kaj ĝia arkitekturo profitas sunlumon por redukti konsumadon de elektro dumtage.



Roboto aŭtomate cirkulas tra la parko por pruntedoni librojn al homoj.

Ambaŭflanke de la longa koridoro, kiu trairas la bibliotekon kvazaŭ la apuda Granda Kanalo trairas la distrikton Tongzhou, la kabinetoj por publika uzo aspektas kvazaŭ ŝtuparo, kun homoj silente legantaj librojn aŭ laborantaj per komputilo.

En sia konstruita areo de 75 mil kvadrataj metroj, Pekina Biblioteko konservas pli ol ok milionojn da libroj, sed la bretoj videblaj dum irado tra la biblioteko estas malgrandaj kaj malmultaj por konservi tiom da libroj, do kie ili estas?

Laŭ klarigo, en la biblioteko troviĝas la plej granda unuo de aŭtomata sistemo pri konservado kaj repreno (AS/RS) de libroj en Ĉinio, kiu kapablas konservi ĝis 7.1 milionoj da libroj en areo de nur 3 mil kvadrataj metroj, pro ĝis speciala desegno. En ordinara biblioteko, tiu kvanto da libroj postulus areon je minimume 10 mil kvadrataj metroj.




Virino interparolas kun virtuala bibliotekistino.

Por helpi homojn trovi la librojn, troviĝas bibliotekistoj ĉe ĝiceto, sed ankaŭ estas unu virtuala bibliotekisto funkciigata de artefarita intelekto, kiu voĉe interagas kun la homoj per voĉa konversacio.

La biblioteko ankaŭ havas memservan areon, kiu funkcias 24 horojn tage, kie homoj povas pruntepreni kaj redoni librojn, kiam ajn ili volas. La tuta prunteprena kaj redona sistemo estas aŭtomata.

Dum kelkaj homoj preferas iri al biblioteko por ĝui ĝian trankvilan etoson, ankaŭ estas legantoj, kiuj preferas resti hejme. Por igi libropruntojn pli konvenajn por tiuj lastaj, estis kreita servo, per kiu oni povas mendi libron interrete kaj ricevi ĝin hejme, kaj tiu servo estas disponebla ne nur por la urbo Pekino, sed ankaŭ por la urbo Tianjin kaj la provinco Hebei.




Lusin interparolas kun vizitantoj en la metaverso.

La Pekina Biblioteko ankaŭ havas areon por spertado de metaverso. Enirinte la areon, oni povas interagi kun majstroj de la ĉina literaturo revigigitaj de IA. Laŭ fakulo de la biblioteko, plejparto de la vizitantoj elektas fari demandojn al Lusin,

patro de la moderna ĉina literaturo, kiu cetere ankaŭ estis esperantisto. Homoj aparte ŝatas peti al la majstroj rekomendojn pri libroj.

En la metaverso oni ankaŭ povas krei avataron, kiu gajnas vivon en virtuala mondo montrata sur ekranego de la biblioteko. Alia interesa trajto de tiu areo estas tio, ke uzantoj de tiu biblioteko povas vidi sur ekranego la kovrilojn de ĉiuj libroj, kiujn li aŭ ŝi prunteprenis de la biblioteko, tiel ke laŭ tempopaso kreiĝas kaj registriĝas historio de la interagado de ĉiu uzanto kun la biblioteko.




En la kafejo, roboto preparas kafon por klientoj.

La biblioteko ankaŭ entenas butikon, kie oni povas aĉeti librojn kaj ankaŭ diversajn produktojn kun la temo de la biblioteko. Flanke de la butiko troviĝas kafejo, kie oni povas elekti kafon sur ekrano, pagi kaj sekve roboto preparas ĝin.

el EPC (El Popola Ĉinio)

Bogusław Ubik-Perski (Germanio)



Veganismo kaj Esperanto:

Pli ol Ŝajnas

Esu Peranto

"Veganismo estas pli ol dieto, Esperanto estas pli ol lingvo".

aŭtoro, Bogusław Ubik-Perski

(Eseo kaj bildo far' de: prof. dro. AI 愛, kun mia modesta helpo.)

Ĉi tiu eseo celas esplori la pli profundajn dimensiojn de veganismo kaj Esperanto, montrante kiel ambaŭ movadoj estas esprimoj de etika kaj filozofia engaĝiĝo al justeco, egaleco kaj daŭripovo.

Veganismo: Pli ol dieto

Etikaj aspekto

Veganismo, en sia kerno, estas etika engaĝiĝo al neekspluatado kaj besto-bonfarto. Veganoj elektas eviti produktojn de besta origino ne nur pro sanaj kialoj aŭ dietaj preferoj, sed ĉefe pro etika konvinko. La vegana filozofio rifuzas la ideon ke bestoj devas esti uzataj kiel rimedoj por homa konsumo. Ĉi tiu rifuzo etendiĝas al ĉiuj areoj de la vivo, inkluzive de vestaĵoj, kosmetikaĵoj kaj amuzado, kie bestaj produktoj aŭ malbonfarto de bestoj estas implikitaj.

Media dimensio

Veganismo ankaŭ havas gravan median dimension. La produktado de viando kaj aliaj bestaj produktoj havas konsiderindan median efikon, kontribuante al klimata ŝanĝo, senarbarigo, biodiverseca perdo kaj akvopoluado. Adopti veganisman dieton povas draste redukti la ekologian spuron de persono. Tiel, veganismo harmoniiĝas kun principoj de daŭripovo kaj media konservado, antaŭenigante vivstilon kiu celas minimumigi la damaĝon al la Tero.

Sociaj kaj politikaj komponantoj

Krom la etikaj kaj mediaj aspektoj, veganismo havas socian kaj politikan dimension. La vegana movado ofte pledas por ŝanĝoj en agrikulturaj kaj nutraj politikoj, serĉante transiron al pli justaj kaj daŭrigeblaj nutrosistemoj. Veganoj ankaŭ laboras por sensivigi la publikon pri la vivkondiĉoj de bestoj en la nutra industrio kaj por antaŭenigi kompatajn kaj daŭrigeblajn alternativojn.

Esperanto: Pli ol lingvo

Idealoj de egaleco kaj paco

Esperanto estis kreita kun la intenco esti internacia lingvo kiu faciligus komunikadon inter homoj de diversaj kulturoj, tiel antaŭenigante pacon kaj tutmondan komprenon. Ludwik Lejzer Zamenhof, la kreinto de Esperanto, vidis la lingvon kiel ilon por superi la lingvajn barojn kiuj ofte kondukas al miskomprenoj kaj konfliktoj. Tiel, Esperanto reprezentas idealon de egaleco, kie neniu nacia lingvo superregas alian, kaj ĉiuj homoj havas komunan komunikilon.

Komunumo kaj kulturo

Pli ol esti simple lingvo, Esperanto disvolvis sian propran kulturon kaj komunumon. La parolantoj de Esperanto, konataj kiel esperantistoj, formas tutmondan reton de individuoj kiuj dividas komunajn valorojn de amikeco, solidareco kaj kunlaboro. Ĉi tiu komunumo partoprenas en renkontiĝoj, kongresoj kaj kulturaj eventoj kie oni festas diversecon kaj antaŭenigas kulturalan interŝanĝon.

Socia kaj politika movado

Esperanto ankaŭ havas politikan kaj socian komponanton. Esperantistoj pledas por la agnosko de Esperanto kiel neŭtrala lingvo en internaciaj forumoj kaj en edukaj sistemoj. La lingvo estas vidata kiel rimedo por rezisti la kulturhegemoniadon kaj lingvan hegemonion de la dominaj potencoj, antaŭenigante anstataŭe pli egalan kaj plurismeman mondon.

Komparo kaj kontrasto

Kvankam veganismo kaj Esperanto ekestas en tre malsamaj kunteksto, ambaŭ dividas la karakterizaĵojn esti pli ol siaj bazaj difinoj. Ambaŭ movadoj reprezentas profundajn etikajn kaj filozofiajn engaĝiĝojn, pledas por justeco kaj egaleco, kaj celas krei inkluzivajn kaj daŭrigeblajn komunumojn. Dum veganismo fokusas al la rilato inter homoj kaj bestoj, same kiel al la media efiko, Esperanto enfokusigas homan komunikadon kaj pacon.

Konkludo

La frazo "Veganismo estas pli ol dieto, Esperanto estas pli ol lingvo" emfazas la profundon kaj amplekson de ĉi tiuj movadoj. Ambaŭ ekzempligas kiel individuaj elektoj povas havi vastajn etikajn, sociajn kaj politikajn implicojn. Transcendante siajn surfacajn difinojn, veganismo kaj Esperanto invitas nin rekonsideri niajn agojn kaj labori por pli justa kaj kompata mondo. En mondo ĉiam pli interkonektita, ĉi tiuj movadoj ofertas vojojn al pli granda kompreno kaj kunlaboro tutmonda, defiante nin vivi laŭ niaj plej altaj valoroj.



John Huang (Kanado)



aŭtoro, John Huang

Turisma vojaĝo tra Tanzanio

(1)

Mia itinero estas ellaborita dum la lastaj monatoj. Mi fine trovis min ekvojaĝante al unu el la plej famaj sovaĝaj rifuĝejoj de la mondo: la Serengeti kaj la kratero Ngorongoro en Tanzanio. Armita per mia fotilo, preta kapti la krudan belecon de la sovaĝejo, mi paŝis en la mondon, kie naturo regas super ĉio.

Dum nia safara veturilo de esperantistoj ruliĝis tra la krudaj terenoj, la vasta, malferma savano etendiĝis antaŭ ni, ŝajne senfina sub la vasta afrika ĉielo. La vento flustris tra la altaj herboj, kaj mi povis senti la eksciton bruantan en la aero. Mi ĝustigis mian fotilan lenson, preta kapti la momentojn, kiuj certe disvolviĝos.

****Renkontiĝo kun la Masaja Tribo: Rigardo en Ilian Kulturon****

Kiam la suno komencis leviĝi kaj pentri la ĉielon per nuancoj de oranĝo kaj rozkoloro, ni faris veturilon por viziti masajan vilaĝon. Ĉi tiu vizito estis unu el la elstaraj momentoj de la vojaĝo. La masajoj, ornamitaj per siaj tradiciaj ŝukoj, varme salutis nin. Ilia vigla vestado kontrastis bele kun la tero-tona pejzaĝo. Mi estis aparte frapita de la kompleksa perla laboro portata de la virinoj kaj la unikaj ŝukaj desegnoj sur la viroj.



Ili invitis nin aliĝi al ilia tradicia danco — ritma salta danco nomata "Adumu." Mi provis imiti iliajn altajn saltojn, sed miaj provoj renkontiĝis kun ridoj kaj amika kuraĝigo. Estis humiliga sperto esti akceptita de tia riĉa kulturo, eĉ dum mallonga momento. Tra mia fotila lenso, mi kaptis la esencon de iliaj viglaj tradicioj, esperante revenigi pecon de ilia spirito hejmen kun mi.

****La Antikva Baobabo: Silenta Atestanto****



La sekvan matenon, ni trovis mirindan vidon — sola baobabo staranta alte kontraŭ la klara blua ĉielo. Konata kiel la "Arbo de Vivo," la baobabo estis atestanto de

senfinaj rakontoj tra la jarcentoj. Ĝi ŝajnis flustri sekretojn de la pasinteco, kaj mi ne povis ne senti senton de miro. Dum mi enfokusigis mian lenson al ĝia masiva trunko kaj torditaj branĉoj, mi imagis ĉiujn sovaĝajn bestojn, kiuj serĉis rifuĝon sub ĝia ombro, ĉiujn generaciojn de Masajoj, kiuj ripozis sub ĝia kanopeo. Ĉi tiu antikva arbo sentiĝis kiel pordego inter la pasinteco kaj la nuntempo, kaj mi volis kapti tiun tempodaŭrecon en mia fotado.

****Taĉmento de Babuinoj: Kaoso sur la Vojo****



Pluirante pli profunden en la sovaĝejon, ni renkontis taĉmenton de pavianoj transirantaj la vojon. Iliaj ludemaj ludoj alportis rideton al mia vizaĝo. Ili ŝajnis ne konsciaj pri la veturiloj, kvazaŭ ili posedus la teron — eble ili ja faris. Estis fascine observi iliajn sociajn dinamikojn, de la dominantaj maskloj gardantaj ĝis la junuloj ludantaj unu la alian. Mi rigardis tra mia fotila lenso, kaptante momentojn de interagado, kiuj montris la kompleksecon de iliaj sociaj ligoj. Estis rememorigilo pri kiel inteligentaj kaj intimaj tiuj primatoj estas.

****Girafoj en la Malproksimo: Graziemaj Gigantoj de Serengeti****

Dum ni daŭrigis nian vojaĝon, du elegantaj girafoj aperis en la malproksimo, gracie paŝante tra la savano. Iliaj longaj koloj etendiĝis altan, kvazaŭ ili atingus la ĉielon. Ili moviĝis kun tia gracio kaj celo, netuŝitaj de nia ĉeesto. Estis preskaŭ meditiga observi ilin moviĝi. Mi ĝustigis mian fokuson kaj fotis kelkajn fotojn,

provante kapti la trankvilan belecon de tiuj gigantoj en sia natura medio. Ĉiu foto sentiĝis kiel artaĵo, omaĝo al la mildaj gigantoj de Afriko.



****La Fakoĉero kaj Gazelo: Miriga Harmonio en la Sovagejo****



Ĝuste kiam mi pensis, ke la tago ne povus fariĝi pli interesa, fakoĉero aperis el la altaj herboj, grumblante kaj grumblante dum ĝi serĉis manĝaĵon. Ĝia kruda aspekto kaj distingaj dentegoj donis al ĝi unikan ĉarmon. Mi rapide ĝustigis la fotilajn agordojn por kapti ĉi tiun surprizan renkonton. Ĝi moviĝis kun miksaĵo de singardo kaj konfido, de tempo al tempo paŭzante por rigardi nin, kvazaŭ ĝi pritaksus ĉu ni estas minaco. Mi sukcesis fari proksiman foton de ĝia vizaĝo, montrante ĝiajn unikajn trajtojn kaj la krudan belecon de vivo en la sovaĝejo. Tiam mi rimarkis ion nekutiman—gazelo kaj fakoĉero kune en la sama spaco, ĉiu prizorgante sian propran aferon en paco. La vido de ĉi tiuj du malsamaj estaĵoj, kiuj tiel kontrastas en aspekto

kaj konduto, dividi la saman spacon sen konflikto, estis rememorigilo pri la harmonio, kiu ekzistas en la naturo. La delikata gracio de la gazelo kontraŭis la krudeco de la fakoĉero, kreante belan kontraŭstaradon. Mi enkadrigis la fotojn por kapti ambaŭ bestojn en la sama kadro, reflektante la diversecon de vivo en Serengeti. Estis unu el tiuj maloftaj momentoj, kiuj igis min aprezi la ekvilibron de la ekosistemo, kie la plej neatenditaj interagoj elvokas la plej profundan senton de respekto por la naturaj cikloj kaj la riĉeco de la sovaĝa mondo.

****En la Ombroj de la Bananujoj****



Lasinte malantaŭ ni la pli vizitatajn vojojn de Serengeti, ni veturis en densan, izolitan areon, kie la aero estis dika kun laodoro de vegetaĵaro. Mi trovis min en arbareto de bananujoj, kies grandaj folioj formis kanopeon super la kapo. La lumo trafiltris en molaj, verdaj nuancoj, kreante trankvilan atmosferon. Meze de ĉi tiu serena medio, aperis loka virino, paŝante kun celo. Vestita per brilaj koloroj, ŝi ŝajnis perfekte aparteni al la ĉirkaŭaĵo. Mi kaptis ŝian portreton dum ŝi moviĝis tra la bananaro, ŝia esprimo radiante kvietan forton kaj fidon, kiu spegulis la reziston de ŝia medio.

****Vigla Pozo de Topio****

Dum ni moviĝis for de la arbareto, la pejzaĝo transformiĝis al pli malferma savano. Tie, starante alte meze de la oraj herboj, estis sola topio, ĝia muskola kadro akcentita kontraŭ la fono de la sovaĝejo. La topio staris senmove, ĝiaj akraj kornoj direktitaj supren, okuloj skanantaj la horizonton por iu ajn ebla danĝero. Estis momento de kvieto, tamen plena de streĉo, kvazaŭ la topio sciis, ke danĝero povus aperi iam ajn. Mi sukcesis kapti ĝian silueton kontraŭ la subira suno, atesto pri ĝia forto kaj atentemo en la sovaĝejo.



****Elefantoj en Serengeti: Majestaj Transiroj en Lumo kaj Ombro****



Dum ni daŭrigis laŭ la polva vojo, ni renkontis aron de elefantoj malrapide transirantaj la vojon. La sceno estis kaj ĉarma kaj humiliga. Ĉi tiuj majestaj gigantoj, kun siaj grandaj oreloj balanciĝantaj kaj siaj rostroj svingantaj, moviĝis kun eleganteco, kontrastanta kun sia grandeco. Mi rigardis kun miro, kiam elefantino milde puŝis sian idon antaŭen, gvidante ĝin sekure trans la vojon. La ceteraj elefantoj

sekvis en singarda formacio. Mi ne povis ne admiri ilian silentan komunikadon kaj profundajn familiajn ligojn, kiuj estis evidentaj en ĉiu paŝo, kiun ili faris. La suno ŝetis longajn ombrojn dum mi klakis for, kaptante ĉi tiujn imponajn estaĵojn en la mola ora lumo de la afrika posttagmezo. Poste, dum krepusko alproksimiĝis, ni renkontis alian elefantan transiron. Ĉi-foje, la etoso estis malsama. La estingiĝanta lumo kaj la trankvilo de la vespero aldonis misteron al la sceno. Unu granda vir-elefanto, prilumita de la antaŭaj lumoj de nia veturilo, ŝajnis stari kiel gardanto, kvazaŭ certigante ke lia familio transiru sekure. La maniero, kiel li alte tenis sian kapon kaj moviĝis kun celkonsciaj, malrapidaj paŝoj, donis al la momento potencon senton de graco kaj aŭtoritato. Mi povis senti mian koron bati en mia brusto dum mi

kaptis ĉi tiun proksiman renkonton. Ĝi estis momento de respekto kaj admiro por ĉi tiuj imponaj bestoj, kiuj vagadis ĉi tiujn landojn dum jarcentoj, en serena kaj impresa silento, portante la spiron de la sovaĝejo en ĉiu paŝo.

****La Graciaj Zebroj: Triopo en Moviĝo****



Daŭrigante nian vojaĝon la sekvantan tagon, ni renkontis triopon de zebroj transirantaj polvan vojeton, iliaj nigraj kaj blankaj strioj kontrastis kontraŭ la seka, flavbruna fono de la savano. La zebroj moviĝis kun ritma gracio, iliaj movoj sinkronigitaj kvazaŭ ili estus prezentantaj koreografiitan dancon. Mi rapide faris serion de fotoj por kapti ilian fluidecan

moviĝon. Iliaj unikaj padronoj perfekte kunfandiĝis unu kun la alia, kreante hipnotan vidan spektaklon. Rigardante ilin, mi memoris la belecon en la simpleco kaj harmonio de la naturo.

****Bufala Hordo: Potenca Ĉeesto****



Ĝuste preter la zebroj, ni ekvidis grandegan hordojn de bufaloj, iliaj malhelaj, imponaj formoj kontrastis kontraŭ la pli helaj tonoj de la herbejo. Tie devus esti centoj da ili, starantaj kune kiel nepenetrebla muro. Iliaj kornoj kurbiĝis supren,

kreante timigan spektaklon. Kiam ni proksimiĝis, mi povis senti la ŝiran potencon de ilia ĉeesto. La bufaloj restis senmovaj, preskaŭ statuetaj, kvazaŭ ili kolektive taksus, ĉu ni prezentas minacon. Mi kaptis la scenon de distanco, kadra tra la branĉoj de proksima arbo por aldoni profundon kaj kuntekston. La foto sentiĝis kiel rigardo en la tempodaŭreco de Serengeti.

****Sola Gepardo: La Eleganteo de Soleco****



Pluen laŭ nia vojo, ni renkontis unu el la plej fascina vidaĵo de la vojaĝo—sola gepardo trankvile sidanta sur flikaĵo de malferma tero. La rigardo de la gepardo estis intensa, fiksita je io malproksime. Ĝia glata korpo, kovrita per distingaj nigraj makuloj, estis ĉefverko de evolucio desegnita por rapido kaj lerteco. Mi povis senti ĝian pretecon al ekagado en ajna momento. Mi kaptis ĝian fokusitan sintenon en mia kadro, la epitomo de predanta gracio kaj eleganteo. Estis malofta momento de kvieto por besto konata pro sia rapido, kaj mi sentis min bonŝanca atesti ĝin.

****Malgrandaj Dikdikoj: Delikata Malkovro****

Kiam ni plu moviĝis, ni trovis paron da dikdikoj—etaj antilopoj apenaŭ atingantaj genu-altecon. Ili staris proksime kune, iliaj grandaj okuloj singarde rigardantaj nin. Iliaj malgrandaj, delikataj kadroj kaj timida naturo faris ilin ŝajni preskaŭ ne konvenaj en la vasteco de Serengeti. Tamen, ilia ĉeesto memorigis min pri la diversaj formoj de vivo, kiuj prosperas en ĉi tiu severa medio. Mi faris kelkajn rapidajn fotojn de la ĉarma paro, esperante kapti ilian fragilecon kaj la mildan lumon, kiu banis ilin.



****La Gracia Impalo: Momento de Paŭzo****



Ni daŭrigis veturadon, kaj baldaŭ impalo gracie transiris nian vojon. Ĝia glata, tan-korpo kontrastis akre kun la ruĝ-bruna terkrusto, kaj ĝiaj elegantaj movoj estis kaptantaj. La impalo paŭzis por momento, rigardante en nia direkto kun scivolemo, ĝia nigra-striita vizaĝo montranta atenton. Mi enkadrigis la bildon por reliefigi ĝian sveltan konstruon kaj la naturan fonon, kiu ĉirkaŭis ĝin. La gracia sinteno de la impalo enkorpigis la gracion kaj lertecon karakterizaj por ĝia specio.

****Ripozantaj Hipopotamoj: Homamaso ĉe la Akvotruo****

Nia vojaĝo poste kondukis nin al akvotruo plena de vivo. La sceno estis preskaŭ nereala—granda grupo de hipopotamoj, stakigitaj kune en la akvo, iliaj grandegaj korpoj apenaŭ videblaj super la surfaco. Kelkaj estis preskaŭ tute subakviĝintaj, dum aliaj ripozis siajn kapojn sur siaj kunuloj. Ili ŝajnis esti en stato de malstreĉiĝo, tamen ĉiam atentaj pri iuj signoj de danĝero. La akvo estis miksaĵo de koto kaj ondetoj kreitaj per iliaj okazaj movoj. Ili montris la trankvilon kaj pacon de ĉi tiu malvarmeta rifuĝejo, dum birdoj sidis sur ili kaj manĝis insektojn, kio estis fascina interagado inter specioj. Mi celis mian fotilon al ĉi tiu kongregacio de hipopotamoj, kaptante la unikan trankvilon de ĉi tiuj kutime agresemaj gigantoj en ripozo.

**** Pavianoj en Serengeti: Inter Kontemplado kaj Ludemo****

Daŭrigante nian vojaĝon tra la Serengeti, ni renkontis solan pavianon meze de la altaj herboj, kun ĝiaj malhelaj, preskaŭ melankoliaj okuloj rigardantaj en la malproksimon. La sinteno de la paviano sugestis momenton de kontemplado, kvazaŭ ĝi pripensante la sovaĝecon de siaj ĉirkaŭaĵoj. Ĝi staris senmova, parte kaŝita de la sekigita vegetaĵaro, kreante senton de mistero. Mi prenis momenton por kapti ĉi tiun penseman pozon, sentante la profundon de emocio, kiu ŝajnis eliri de ĉi tiu sovaĝa estaĵo. Kontraste al tiu silenta trankvilo, pli juna paviano, plena de ludema energio, svingiĝis senpene de branĉo kontraŭ la fono de la malferma ĉielo. Rigardante ĝin, mi ne povis ne rideti pro ĝiaj senzorgaj kapricoj, kiuj memorigis pri la nesovaĝa ĝojo, kiu prosperas en ĉi tiuj vastaj ebenaĵoj. La vigla danco de la paviano en la aero estis taŭga simbolo de la senlima libereco trovita en la sovaĝejo. Tiel, ĉi tiuj du pavianoj, ĉiu kun sia propra maniero esprimi sin, reflektis la kompleksan kaj diversan karakteron de la sovaĝejo—lokon kie meditado kaj pura ĝojo povas kunekzisti en perfekta harmonio.

****La Sola Arbo: Natura Skulpta Arto****



Iom poste, unika arbo kaptis mian atenton—sola akacio kun tordita trunko, kiu fleksiĝis kiel homa kubuto. Ĝi staris izolita sur la malfermaj ebenaĵoj, ĝia kanopeo provizanta la solan ombron larĝan je mejloj. Ĉi tiu arbo, kun sia unika formo, aspektis kiel peco de natura arto skulptita de tempo kaj vetero. Mi sentis devon enkadrigi ĝin kontraŭ la vasta ĉielo, kaptante la kontraston inter ĝia tordita formo kaj la serena pejzaĝo ĉirkaŭ ĝi. La arbo ŝajnis simboli reziston, starante firme meze de la ĉiam ŝanĝiganta ĉirkaŭaĵo.

****La Eleganta Ĉasisto de la Herbejoj****

Dum mia daŭrigis mian esploradon de Serengeti, mi renkontis reĝan nigrokapan ardeon starantan gracie inter la altaj herboj. Ĝia svelta kolo etendiĝis supren, kaj ĝiaj akraj okuloj trarigardis la ĉirkaŭaĵojn kun trankvila vigleco. La malhela plumaro de la birdo bele kontrastis kontraŭ la sunplena savano, kie ĉiu subtila movo ŝajnis celkonscia. Kun sia longa, pintita beko, la ardeo ŝajnis preta ataki ajnan nesuspektantan predon, kiu povus transiri ĝian vojon. La sereneco de la momento, kaptita en la pozicio de la birdo, estis perfekta reflektado de la kvieteco, kiu foje

kovras la vastajn Serengetajn ebenaĵojn. En tia medio, eĉ la plej etaj estaĵoj altiras atenton, montrante la delikatan ekvilibron inter predanto kaj predo en ĉi tiu dinamika ekosistemo. Observante ĉi tiun solan ĉasiston, mi estis denove memorigita pri la diverseco kaj rezisteco de vivo, kiu floras en ĉi tiu sovaĝa kaj senkompromisa lando. La ĉeesto de la ardeo aldonis alian tavolon al mia kompreno de Serengeti, kie ĉiu estaĵo, de la plej grandaj elefantoj ĝis la plej malgrandaj birdoj, ludas gravan rolon en la cirklo de vivo.

****La Gracia Marŝo de la Elefantoj****

Dum mia aventuro en Serengeti, alia neforgesebla momento estis kiam mi atestis trankvilan procesion de elefantoj moviĝantaj gracie tra la vastaj ebenaĵoj. Kontraŭ la fono de hela blua ĉielo, malgranda grupo, gvidata de matriarko, paŝis tra la altaj, oraj herboj. La elefantoj, variantoj laŭ grandeco de plenkreskuloj ĝis junaj idoj, ŝajnis marŝi en sinkronigita ritmo, iliaj grandaj, potencaj korpoj ĵetante ombrojn sur la teron. Ĉiu paŝo estis celkonscia sed milda, enkorpigante la kvietan forton kaj saĝon, pro kiu elefantoj estas konataj. La sceno estis plue plibonigita de la vasteco de la ĉirkaŭa pejzaĝo, punktita per la okazaj akaciaj arboj kaj malproksimaj montetoj malaperantaj en la horizonto. Ĉi tiu momento estis profunda memorigilo pri la komplika ekvilibro de vivo en Serengeti, kie la simpleco de la vojaĝo de grupo povas kapti la esencon de sovaĝeco kaj libereco en unu harmonia sceno. Ĝi estis potenca spektaklo, atesto pri la persista spirito de ĉi tiuj majestaj bestoj, kiuj vagas ĉi tiun senliman landon.

**** Serengeti: La Ritmo de Vivo kaj la Spirito de Unueco****

Dum mi faris miajn lastajn fotojn kaj pripensis la vojaĝon, mi sentis profundan dankemon pro tio, ke mi jam atestis tian krudan belecon. La Serengeti, kun ĝiaj vastaj, nesubigitaj pejzaĝoj kaj la nekutima diverseco de vivo, ofertis al mi rigardon en la koron de la naturo. Ĉi tiu aventuro estis pli ol nur esplorado; ĝi estis vojaĝo al loko, kie ĉiu momento ŝajnis esti senfina memoro gravurita en la ŝtoton de la tero. Ĉiu klako de la fotila obturilo kaptis ne nur bildon, sed ankaŭ rakonton—rakonton pri supervivo, rezistemo, kaj la delikata ekvilibro de vivo, kiu prosperas ĉi tie. Mi rimarkis, ke ĉiu bildo estis pli ol nur bildo; ĝi estis memoro, rememorigilo de la imponaj renkontoj, kiujn mi havis en ĉi tiu eksterordinara loko. De la gracia marŝo de elefantoj ĝis la pasema rigardo de gepardo en ĉasado, ĉiu sperto lasis neforgeseblan markon en mia animo. Mia vojaĝo tra Serengeti kaj Ngorongoro estis malproksima de fino, tamen ĉi tiuj momentoj restos kun mi por ĉiam, gravuritaj en mia koro kiel la profundaj spuroj, kiujn lasis la migranta brutaro sur la savano. Ĝi estis memorigilo, ke en tia sovaĝa kaj vasta mondo, estas ankoraŭ tiom multe por malkovri, kaj ĉiu aventuro malfermas la pordon al novaj mirindaĵoj, kiuj atendas esploradon.

Por mi, ĉi tiu vojaĝo kune kun aliaj esperantistoj ankaŭ spegulis la spiriton de Esperanto—lingvo naskita el perspektivo de unueco kaj kompreno inter homoj de malsamaj kulturoj kaj fonoj. Same kiel la diverseca ekosistemo de Serengeti prosperas per delikata ekvilibro, Esperanto reprezentas la ekvilibron kaj harmonion, kiujn ni serĉas en homa komunikado, ponto super dislimigoj. Serengeti, kun sia senlima diverseco kaj natura harmonio, spegulas la idealojn de inkluziveco kaj paco, kiujn Esperanto enkarnigas. Esplori ĉi tiun grandiozan teron tra la lenso de universala lingvo aldonis profundon al la vojaĝo, memorigante min pri la senfinaj eblecoj, kiuj atendas, kiam ni akceptas kaj la diversecon de la naturo kaj la unuecon de la homaro. (*daŭrigota*)

Ĉiuj fotoj en la teksto estas fotitaj de la aŭtoro mem.